

Albana Esperanto-Asocio estas jure agnoskita laŭ decido nr 3503 dato 15/02/2013 de la Juĝejo de Tirana

Retpaĝo: <http://esperantoshqipria.weebly.com/index.html> aŭ [www.esperanto.net/al](http://www.esperanto.net/al)

## **BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO INSTITUTO**

**Nr. 115, oktobro 2014**

**Niaj proverboj**

Albana:

La homa vivo similas al tordita fadeno per felicxo kaj malfelicxo. Se gxi estus tordita nur per malfelicxo, certe gxi baldaux desxirigxus, se gxi konsistas nur el felicxo, gxi estus ege malmola kaj tute senutilus.

**Bona Volo: “*Ĉiu spaco konkerita de Amo estas perdita de malamo*”.**

Lernu — humile.  
Instruu — per ekzemploj.  
Administru — edukante.  
Obeu — serveme.  
Amu — edificante.  
Timu — vin mem.  
Suferu — kun profito.  
Parolu — konstruante.  
Aŭdu — bonvoleme.  
Helpu — altigante.  
Subtenu — levante.  
Trairu — servante.  
Preĝu — trankvile.  
Petu — saĝe.  
Esperu — laborante.  
Fidu — agante.  
Konfidu — gardante.  
Ricevu — disdonante.  
Akceptu — ĝentile.  
Kunlaboru — sen alligiteco.  
Komplezu — plibonigante.  
Esploru — savante.  
Klarigu — respekteme.  
Semu — sen aflikto.  
Studu — perfektigante.  
Marŝu — kun ĉiuj.  
Antaŭeniru — kun utileco.  
Agu — por ĝenerala bono.  
Korektu — bonkore.  
Pardonu — ĉiam.

(ĉerpita el Vizaĝlibro)

**Adreso de redakcio:** *p/a Bardhyl Selimi, Rr. Fortuzi 9/1/3 Tirana 1016 Albanio  
(00355682580758; [bselimi@gmail.com](mailto:bselimi@gmail.com))*

**Kunlaborantoj:** *Shaban Hasani 00355682080677, [shabanhasani@gmail.com](mailto:shabanhasani@gmail.com); Gjergji Gusho: 0035583222326, [gjergji\\_gusho@yahoo.com](mailto:gjergji_gusho@yahoo.com); Agim Peraj: (00355694472430, [agimperaj@yahoo.it](mailto:agimperaj@yahoo.it); Sajmir Beqiraj: (00355684030613, [s\\_beqiraj@yahoo.com](mailto:s_beqiraj@yahoo.com); Nehat Sokoli: 00355682587699, [sokolinehat@gmail.com](mailto:sokolinehat@gmail.com); Engjell Gusho: 00355692350111, [engjellgusho@yahoo.fr](mailto:engjellgusho@yahoo.fr); Rita Permeti: 0035542363 360; 00355686857800 ; Luan Jaupi: 00355682165870, [luanjaupi@hotmail.com](mailto:luanjaupi@hotmail.com); Enkela Xhamaj: 00355685135105, [xhamajkl@yahoo.com](mailto:xhamajkl@yahoo.com); Martha Otto, 00355697946646, [martha.otto@gmail.com](mailto:martha.otto@gmail.com)*

## La enhavo

**Ni kaj UEA, ILEI, AIS**

Raportoj pri ILEI Konferenco

60-jarigxo de UNESCO- deklario pri Esperanto kaj Albanio

**Vizito de pola esperantisto- Esperanto en Kosovo**

**Filmetoj el Pogradec**

Kotizoj

**Ni lernas**

Didaktikaj materialoj el Brazilo

**Nia propagando**

Tutnacia Televida Elsendo pri esperanto en Rumanio

Kie malaperis esperantistoj

**Informaĵoj**

Ian Fantom Eventoj kaj komentoj

Szilvási László Aplikado de scienco kaj tekniko

Jose Roberto Luiz Nova Esperanta Libro pri Radiestezo

Statistikajoj el la monda futbal- ĉampionato

Itala kongreso de Esperanto

Internacia festivalo en Germanio

**Artikoloj**

Fatbardha Demi Ĝoka atestas

Paivo Netto pri Muziko

Ylljet Aliĉka pri diplomato-verkisto

Afrore Shaipi Papo en Albanio

**Ni kondolencas**

Forpasis Andrzej Grzebowski

**Niaj leteroj**

Birgitta Anevik

Paolo Cezar

Andy Kuenzli

Martha Otto Vojaĝo en Usono

## **Beletraĵoj**

Gjergji Gusko Poezio pri aŭtuno

La lago de Pogradec- eseo

Nikola Uzunov Nova libro

Meri Lalaj La Senpekulo

## **Ni kaj UEA, ILEI, AIS**

### **ILEI akceptita de la urbestro de Montevideo, en la Nacia Parlamentejo**

En impona italstila palaco, longa, vasta salonego kun marmoraj kolonoj, alta plafono kun koloraj vitraj fenestroj -- jen la ejo de la Ĝenerala Kunsido de Unesko en novembro-decembro, 1954. Tiu salonego okupas la tutan larĝon de la 'Leĝa Palaco', la duĉambra parlamentejo de Urugvajo.

En tuj apuda, same impona salono ariĝis naŭdeko da anoj de la 47a Konferenco de ILEI plus gastoj kaj lokaj helpantoj. La prezidantino de ILEI, s-ino Mirejo Grosjean bonvenigis la konferencanojn, prezentis la podianojn kaj honorajn gastojn. Elstare inter tiuj estis la urbestro de Montevideo, s-ino Ana Olivera. Plie du reprezentantoj de la Regiona Oficejo de Unesko en Montevideo, inter kiuj la direktoro, s-ino Lidia Brito. Krome la Vic-ambasadoro de Svislando en Urugvajo.

La urbestro deziris al ni sukcesan kunvenadon kaj kore bonvenigis nin al Montevideo, ĉefurbo kun 1,4 milionoj da loĝantoj. Ŝi montris klaran simpatian por nia lingvo, klarigante, ke ŝi ekkonis ĝin jam en junaĝo, ĉar tre influa lernejestro de ŝia licoo deklaris: "Estus bone, se estus komuna lingvo, uzebla por ĉiuj personoj".

La direktorino de la Unesko-oficejo (kiu zorgas pri scienco tra la tuta Sud-Ameriko kaj Karibio, kaj prizorgas ĉion de Unesko en Urugvajo, Paragvajo kaj Argentino) emfazis la edukajn laborojn de Unesko kaj la grandecojn de la problemoj de malegaleco, malriĉeco kaj malpaco, kiuj eblas superi nur per pli fortaj programoj kaj klopodoj. Ŝi bone sentis la lingvan dimension en la evolulaboroj kaj konsentis, ke Unesko kaj la Esperanta movado dividas multajn komunajn valorojn.

Interese, ke nur en nia konferenco, la direktorino de la Unesko-oficejo en Montevideo unufoje renkontis kaj kore salutis sian urbestron.

Poste la vic-prezidanto de UEA en sia saluto diris la sekvon:

Nome de Universala Esperanto-Asocio mi kore dankas al la reprezentantoj de Urugvajo, de Montevideo, de Unesko kaj la diplomatoj pro la partopreno en nia solenaĵo kaj pro la digna kaj impona akcepto kiun ricevis la Konferenco de niaj instruistoj.

La rekonon de Unesko al la lingvo Esperanto antaŭ 60 jaroj ludis difinan rolon en la historio de nia lingvo. Ni refoje emfazas, ke temas pri vivanta, funkcia lingvo kun aktiva tutmonda parolkomunumo.

La lingvo kapablas ludi valoran rolon en interkulturaj kontaktoj; ĝi ne nur havas propran kulturon, ĝi plie efike servas kiel ponto inter plej diversaj kulturoj, kaj farante tion, kontribuas al la protektado de multlingveco en la mondo.

Dum nia Konferenco ni certe diskutos tiujn temojn. Nome de UEA mi deziras al ĝi plenan sukceson.

Tradukadon kapable faris tra la tuto Ana Montesinos de Gomis kaj Duncan Charters. La disponigo de la nacia parlamento kaj al altiro de tiom altrangaj gastoj estas la merito de la loka konferenca teamo, sub gvido de s-ino Sonia Risso. Antaŭ la pluiro al du dudekminutaj pritemaj prelegoj farotaj nur en Esperanto, la honoraj gastoj ricevis inviton forlasi la salonon, kaze de aliaj devoj. Laŭinde, ili ĉiuj restis, kaj laŭ la reagoj, evidente komprenis kaj aprezis multon.

Unue, Marija Jerković el Kroatio prizorgis lumbildan prezenton pri la preparlaboroj ekde la 7a Ĝenerala Konferenco de Unesko en Parizo en 1952, por veni al la punkto povi en Montevideo du jarojn poste akceptigi kunlaborajn rilatojn inter UEA kaj Unesko. Tio frue sukcesis, sed favora rezolucio pruviĝis pli defia. Necesis unue trovi subtenan delegacion. Post multa laboro, la meksika delegacio konsentis prezenti proponon, sed ĝi estis malakceptita, ĉefe pro la detrua kaj moka interveno de prof. Blinkenberg el Danlando, kiu i.a. aludis negative al urugvajaj menuoj. En tri-minuta reaga interveno, malfacilis restarigi seriozecon kaj favore prezenti Esperanton. Tio ŝajnis la fino. Sed ne. La loka helpa teamo laboregis, ĉiutage aperigis en la urugvajaj ĵurnaloj artikolojn favore al Esperanto, tiel ke la malakceptita rezolucio fariĝis nacia diskutpunkto. Lapenna mem donis radian intervjuon, persiste lobiis inter la delegacioj kaj aranĝis kunsidojn kun altranguloj. La lumbilda prezentaĵo donis, tra la lastaj tagoj antaŭ la konferenca fermo laŭhoran, poste laŭminutan resumon de la rimarkindaj eventoj kaj atingoj, kiuj kulminis en eksterordinara revoĉdonigo de la rezolucio en la fina ĝenerala asembleo, kun bele pozitiva rezulto.

La dua prelego provis doni pli vastan kuntekston al tiuj dramecaj momentoj. Mirejo Grosjean skizis la decidajn mejloŝtonojn de Esperanto ekde 1859 ĝis la nuntempo, en kiu 1954 evidente ludas grandan rolon. Ŝi tion klare kaj elokvente prezentis, fine tirante el la historio kaj de la agprincipoj de Lapenna mem, receptojn por nia estonta agado, interalie ĉe Unesko.

Post tiu duhora solenaĵo, la konferenco ricevis gviditan montradon de la parlamentejo, inkluzive de la imponaj kunvenejoj por la 99 deputitoj kaj la 33 senatanoj. Tuj ekstere de la palaca placo, sur herbejo apud trafikata avenuo, la konferenco rajtis kolektive planti gujavan arbeton, kiun esperantista ekologo jam kreskigis el semo. Antaŭ la arbo estis solene malkovrita digna ŝtonplako kun teksto: 'Esperanto kaj Unesko – ligitaj tra sesdek jaroj – 1954-2014.'

Memorinda mateno por ILEI kaj por Esperanto entute.

Stefan MacGill (UEA) kaj Mirejo Grosjean (ILEI)



### **60- jariĝo de la UNESCO- deklaracio pri Esperanto kaj Albanio**

Kvankam Esperanto movado estis tute paralizita dum 46 jaroj de komunisma reĝimo en Albanio (1944-1990) apartaj individuoj ekzercis ĝin en malvastaj neformalaj societoj. Tia klubeto neoficiala stariĝis en la ministrejo de konstruado kie deĵoris Ĉefo Fico, Vasil Pistoli, Gafur Muĉo kaj aliaj. Krome aktivis Zef Mjeda en Shkoder, Janko Pali en Piqerras, Hamdi Sulĉebe en Korĉa, Agim kaj Bahri Peraj en Shëngjin, Tonin Ĉobani en Lezhë, Luan Jaupi en Durrës, Bardhyl Mezini (Selimi), Rita

Permeti, Enkela Xhamaj kaj Astrit Leka en Tirana, Shaban Hasani kaj Nehat Sokoli en Kukës kaj aliaj. Ili eĉ provis kontakti UEA kaj korespondi kun alilandaj esperantistoj. Dum la jaroj 60 kaj 70 enlanden venadis ankaŭ revuoj kaj libroj en esperanto el Ĉinio, Vjetnamio, Laoso, kutime tradukaĵoj de la respektivaj organoj en aliaj grandaj lingvoj je celo de propagando.

La inĝenieroj de la supremenciita ministrejo sukcesis malfermi lernokursojn en la universitato kaj en la kulturdomo de Tirana. Tiel plurdekoj da tiamaj studentoj ekkonatiĝis kun la internacia lingvo.

S-ro Vasil Pistoli eldonis libron- tradukaĵon en Esperanto pri nia nacia heroo Skanderbeg, same dokumentaran turisman filmon pri la muzea urbo de Gjirokastër.

Dume la UNESCO deklaracio pri Esperanto apenaŭ aŭdiĝis en Albanio..

Nur post 1990, preter la ceteraj neregistaraj organizaĵoj fondiĝis ankaŭ la Albana Esperanto-Asocio (junie 1991) kiu serioze engaĝiĝis en la propagando pri Esperanto, en starigado de lernokursoj, eldonado de lernolibroj, komunikiĝado kaj kunlaboro kun la alilandaj esperanto- organizaĵoj, UEA, ILEI, AIS ks.

Albanoj volonte interesiĝis pri IL des pli ke en tio ili vidis novan alirebleon por la kontaktoj kun eksterlando, en la kondiĉoj kiam ankoraŭ ne funkciis la reĝimo de la libera moviĝo ilia en Eŭropo. Ĉirkaŭ 450 gestudentoj akiris la atestilon pri la elementa nivelo de la lingvo, dum kelkdekoj da studentoj akiris eĉ bakalaŭrecon en Bydgoszcz de Pollando ĉe Internacia Studumo pri Kulturo kaj Turismo. Post la jaro 2010, kiam albanoj povis libere moviĝi en Eŭropo la intereso draste falis, ankaŭ la edukaj institucioj ĝenerale estis ne favoraj



al Esperanto pro lingvopolitiko de la registaro.

En tiaj kondiĉoj nia asocio klopodas trovi novajn vojojn kaj manierojn por sentemigi la enlandan opinion. Ekde kelkaj jaroj ni entreprenis, helpe de polaj kaj aliaj samideanoj fremdaj, la tradukadon de almenaŭ 20 verkoj de la albana literaturo moderna en esperanton. Aperis ĝis nun kvin kaj aperados pluraj aliaj. Okaze de promociado de la libroj, ni altiras la atenton de la ĵurnaloj kaj televiziaj kanaloj kiuj raportas multe ĉiokaze. Kompreneble, dumtempe ni akiris multajn subtenantojn el la vicoj de la verkistoj ne nur en Albanio sed ankaŭ en Kosovo!

Niaj klopodoj por reenkonduki esperanton en la lernejoj tamen ne ĉesis. Ni esperas ke almenaŭ en kelkaj mezlernejoj ni proponos esperanton kiel laŭelekta fremda lingvo kaj helpos la ĝemeliĝon de diversaj lernejoj niaj kun la lernejoj en la landoj de EU, uzante, kiel komunikilon, esperanton. Eble baldaŭ ĉe la Fremdlingva Fakultato fondiĝos grupeto de studentoj kiuj eklernos esperanton por ke poste instruu tion en la mezlernejoj.

**Bardhyl Selimi**, sekretario de la Albana Esperanto-Asocio, 30/09/2014

## Vizito de la pola esperantisto Tomasz Chmielik en Albanio kaj Kosovo

(Propagande por Esperanto kun la albanaj esperantistoj)



Tomasz Chmielik

Ylljet Aliĉka

De la 2-a ĝis la 11-a de septembro 2014, kiel tio estis planite delonge, vizitis Albanion la pola esperantisto Tomasz Chmielik, akompanata de sia filo, esperantisto, kaj aliaj liaj amikoj neesperantistaj.

La celo de la vizito estis la promovigo de pliaj libroj el la albana literaturo tradukite al Esperanto kaj propagando per kaj por Esperanto.



En la motelo

- **La renkontiĝo en la Eŭropa Universitato de Tirana, la 3-an de**

## septembro, antaŭtagmeze

Ĉeestis la rektoro, sinjoro Tonin Gjuraj, la verkisto kaj lektoro Ylljet Aliĉka, Bardhyl Selimi kaj Shaban Hasani, respektive sekretario kaj prezidanto de la Albana Esperanto Asocio (AEA), profesoro de la Jida, Hanan Bordin el la universitato de Jeruzalemo, Tomasz Chmielik, pola ILEI - sekciestro kaj lektoro de la Germana kaj interlingvistiko en la universitato de Lublin kaj Poznan, lia filo, la verkistoj Naun Kule, Bajram Karabolli, Bedri Alimehmeti, la gestudentoj esperantistoj Ili Gerdupi kaj Anisa Gjini.

Post kiam s-ro Tomasz parolis al la ĉeestantoj pri la valoro de Esperanto en la demokrateca komunikiĝo internacia kaj kiel pontlingvo por la lernado de la fremdlingvoj naciaj pli facile kaj pli firme, li aprecis la rakontaron "Sloganoj el ŝtonoj" de Ylljet Aliĉka kaj sciigis ke jam pretas la ties traduko en la germana pere de Esperanto-versio kaj estas trovite ankaŭ la germana eldonisto. Li aldonis ke jam estas fintradukita en Esperanto alia romano de s-ro Ylljet "Rakontoj pri internaciuloj". (ambaŭ lastaj danke al sindediĉeco de s-ro Edmond Ludwig, el Alzaso, esperantisto)

La rakontaro de s-ro Ylljet baldaŭ tradukiĝos ankaŭ en la brazila portugalo helpe de la tiea esperantista profesoro.

Estas jam tradukite al Esperanto ĉirkaŭ 20 romanoj el la albana moderna literaturo, kiel ekzemple la romano "La senfina funebra procesio" de Visar Zhiti, poeziaĵoj de Mimoza Ahmeti, alia poeziaro de Luljeta Lleshanaku, akompanite per DVD.

Li prikonsideris la eblecon de la eldono dulingva de la poeziaro de Bedri Alimehmeti (albane-esperante) kaj invitis la aliajn verkistojn oferti iliajn verkojn por

enesperantiĝo.



En la Europa Universitato

Krom la romano "La Hunda Haŭto" de Fatos Kongoli, "La lundo en sep tagoj" de Luljeta Lleshanaku, la novelo "La Polino" de Bajram Karabolli, "La mondo estas pejzaĝo kun brilaj koloroj" de Eqrem Basha, kiuj estas jam eldonitaj, baldaŭ aperos "La Perdinto" de Fatos Kongoli, kaj "La palaco de la sonĝoj" de Ismail Kadare.

Oni lanĉis la ideon ke venontjare oni organizu renkontiĝon ĉe ĉi tiu universitato, kie oni prelegu antaŭ la gestudentoj pri Esperanto kiel lingvo-kandidato por EU, kaj kiel pontlingvo por diskonigi la albanan kulturon en la mondon.

Sinjoro Tomasz proponis ke la universitato entreprenu la eldonon en la albana de la monografio de Viktor Ŝelazni "Ludoviko Lazaro Zamenhofo- pensaro, sekvoj kaj konsideroj".

Oni sugestis pri la eblecoj de magistriĝo kaj doktoriĝo ĉe la universitato Adam Mickieviĉ en Poznano surkampe de interlingvistiko.

Konklude, la rektoro sinesprimis preta



prikonsideri ĉiujn ideojn pridiskutitaj.

- **La renkontiĝo ĉe la ministrejo de Edukado, la 4-an de septembro**

Ĉeestis la sinjorino Tatiana Vuĉani, fakulo ĉe la direktorio de la antaŭuniversitata edukado, Tomasz Chmielik, Bardhyl Selimi, Shaban Hasani, Hanan Bordin.

La sinjorino Tatiana, diris ke ŝi konas la aferon ekde la jaro 2006 kaj konsentis unuavice je la ideo por interligi kelkajn albanajn mezlernejojn kun du mezlernejoj el EU, uzante kiel lingvo-komunikilon Esperanton. Tiel, akcentis ŝi, formiĝos kerno de esperantistaj instruistoj tre utilaj por la estonto.

Ŝi sugestis ke AEA insistu ĉe la Fremdlingva Fakultato en Tirana ke oni starigu tie grupeton de studentoj studentaj Esperanton kiel kroman lernoobjekton.



En la ministrejo de Edukado

- **La renkontiĝo ĉe la Ministerio de Kulturo, samtage**


Ĉeestis s-ro Gentian Ĉoĉoli, direktoro pri la

libroj kaj eldonado, Tomasz Chmielik, Bardhyl Selimi, Shaban Hasani, Hanan Bordin.

La s-ro Gentian, kiu estas samtempe tradukisto kaj eldoninto, konsentis pri la ideo de sponsorado de la tradukoj ankaŭ de tiu ministerio. Tiucele, li sugestis ke AEA apliku en februaro kaj junio 2015, petante almenaŭ 30 % de la mono necesa por la eldono en Esperanto de la albana literaturo.

- **Renkontiĝo kun la ĵurnalistino de la "Shekulli" (la Jarcento)**

Ĉeestis la ĵurnalistino Luella Myftari, Bardhyl Selimi, Shaban Hasani, Hanan Bordin, Tomasz Chmielik



Kun Luella Myftari

La ĵurnalistino intervjuis s-ran Tomasz rilate la projekton de la albana antologio en Esperanto, liajn impresojn pri Albanio, malfacilaĵojn en la tradukado.

- **La renkontiĝo en la Nacia Biblioteko de Prishtina (Kosovo), la 5-an de septembro**

Ĉeestis la direktoro de tiu biblioteko, samkiel la verkistoj el Kosovo: Adem Demaçi (laŭreato de la premio Saĥarov por la paco en la jaro 1990), Sali Bashota, Eqrem Basha, Sanie Gashi, Flora Brovina (prezidanto de la Ligo de verkistoj de Kosovo), Skënder Zogaj, Tomasz Chmielik, Bardhyl Selimi, kaj ĉiuj

akompanantoj polaj.

Tie okazis la promovigo de la volumo kun poeziaĵoj “La Mondo estas pejzaĝo kun brilaj koloroj” de Eqrem Basha.

Poste oni parolis pri la proceso de tradukado de la verkoj de Sali Bashota, Adem Demaçi, Flora Brovina, Ali Podrimja.

La sinjorino Sanie kaj s-ro Eqrem konigis la ĉeestantojn interalie ke dum ilia junaĝo ili aŭdis pri Esperanto de iliaj instruistoj sed bedaŭrinde la instruado ne daŭris longe.



Sali Bashota, Adem Demaçi, Eqrem Basha, Sanie Gashi, Skender Zogaj, Bardhyl Selimi kaj Tomasz Chmielik

Eqrem Basha promesis akiri de la vidvino de Ali Podrimja la permeson pro la eldono en Esperanto de la poeziaĵoj de Ali, kiuj estas jam pretpretaj por eldono. Dum la sinjorino Flora enmanigis sian libron kun poeziaĵoj “Mat e çmat” (Mezuru kaj malmezuru) por traduko en Esperanto.

S-ro Adem Demaçi aprecis multe la inventon de Esperanto-lingvo kaj konsideris ĝin geniaĵon de geniulo Zamenhof pro kiu

Pollando rajtas fieri. Li esprimis sian kredon grandan ke ankaŭ ĉi tiu lingvo helpas por plimildigi la interretajn malamojn, same al la socia progreso.

Estis konsentite, dum la konversacio kun Adem Demaçi, ke lia romano “La sangovenĝaj serpentoj” eldoniĝu en la versio plej internacia.

S-ro Sali Bashota konsentis entrepreni la eldonon en la albana de poeziaĵoj de la pola poeto Jan Leńczuk, helpe de la esperanta versio “Mi forĝesis vin miaj arboj”. La libro estos promovigote poste ankaŭ en Bjalistoko kie Jan deĵoras kiel bibliotekstro kaj kie Sali estos invitita. Rekompence la biblioteko de Bjalistoko entreprenos la sponsoradon de la eldono en Esperanto de la volumo de Sali Bashota.

Por la gastoj oni ofertis tagmanĝon en la renoma restoracio “La Sinfonio”.



Dum la tagmanĝo

- La renkontiĝo en la Municipo de Lipjan (Kosovo)

Ĉeestis la sinjoroj Imri Ahmeti, municipestro, Heset Sahiti, direktoro, Behadin Rexhepi aferisto, Tomasz Chmielik kun akompanantoj kaj Bardhyl Selimi

Oni pridiskutis la eblecon de ĝemeliĝo de la urbo de Lipjan kun la urbo de Lublin, samkiel la partnerecon de la teknika mezlernejo “Adem Gllavica” de Lipjan kun teknika mezlernejo en Lublin.



## Filmetoj el Pogradec

<http://youtu.be/jNfpxx3>

<http://youtu.be/iFrmDejrInc>

[http://youtu.be/hHh\\_zjinyAk](http://youtu.be/hHh_zjinyAk)

[http://youtu.be/EMShw0kR\\_uo](http://youtu.be/EMShw0kR_uo)

S-ro Tomasz promesis peradi ĉe la respektivaj strukturoj en Pollando.

La gastoj poste pluvojaĝis al Kllokot (municipo de Gilan) por viziti la renoman termobanejon tie.

La aliajn tagoj la polaj gastoj ekskursis al la urboj de Kruja, Durrës, Berat, Elbasan, Pogradec, Vlora, Saranda, Gjirokaŝtër.

Ili vizitis ankaŭ turismejojn en Tirana kaj apud ĝi. Kompreneble ili frandis ankaŭ la karakterizajn albanajn kuiradojn.

Raportis

**Shaban Hasani**

## **Atendante la polajn amikojn cxe la statuo de Lasgush Poradeci**

Video filmita de s-ro Engjell Gusho la 7an de septembro 2014

<http://youtu.be/jQ84xrXmFTc>

<http://youtu.be/y6gQe09G0z8>

## **Kotizoj**

La revuo IPR

Por AL mi havas jenajn atendatajn pagojn de reta IPR por:

Enkela        XHAMAJ  
Sajmir        BEQIRAJ  
Gjergji Tasi   GUSHO  
Agim         PERAJ  
Bardhyl       SELIMI  
Adem  
Nehat MexhitSOKOLI

Krom Enkela ĉiuj ricevis retajn IPR-ojn, krome Bardhyl, kiel sekciestro, reklamcele, du paperajn IPR-ojn.

Ĉe Enkela mi havas rimarkon, ke mi kune kun la tria reta numero kunsendu ankau la unuajn du. Mi ne plu memoras, surbaze de kio mi en majo nur povis enskribi ŝin, sed certe kauzo estis oftaj ŝanĝoj de membronomoj en la albana sekcio. Ankau kun la nomaro de pasinta jaro mi havis problemojn...

Se albanoj rajtas pagi po unu euro, bone, mi ne protestas! Sed pri tio ne mi decidas, por mi nur gravas konfirmo de pago. Ĝis nun ĉe ĉiuj menciitaj nomoj estas "KONFIRMOTA" kaj konfirmo de la pagoj de 5 euroj estis atendataj flanke de mi...

Tamen, venontjare mi rekomendas, ke albanoj oficiale petu pri subteno el Koleghelpa Kaso.

amike, korsalutante  
Fejfi

**Ni lernas**



Kaj jen multaj interesaj materialoj el Brazilo:

## TABELO DE LA PERSONAJ KAJ POSESIVAJ PRONOMOJ

(AŬ ADJEKTIVAJ PRONOMOJ)

PERSONAJ PRONOMOJ	NOMINATIVAJ SINGULARAJ POSESIVOJ	NOMINATIVAJ PLURALAJ POSESIVOJ	AKUZATIVAJ SINGULARAJ POSESIVOJ	AKUZATIVAJ PLURALAJ POSESIVOJ
MI	MIA	MIAJ	MIAN	MIAJN
CI	CIA	CIAJ	CIAN	CIAJN
LI	LIA	LIAJ	LIAN	LIAJN
ŜI	ŜIA	ŜIAJ	ŜIAN	ŜIAJN
ĜI	ĜIA	ĜIAJ	ĜIAN	ĜIAJN
SI	SIA	SIAJ	SIAN	SIAJN

NI	NIA	NIAJ	NIAN	NIAJN
VI	VIA	VIAJ	VIAN	VIAJN
ILI	ILIA	ILIAJ	ILIAN	ILIAJN
SI	SIA	SIAJ	SIAN	SIAJN
ONI	ONIA	ONIAJ	ONIAN	ONIAJN

### TABELO DE LA KARDINALAJ KAJ ORDAJ NOMBROJ

KARDINALAJ NOMBROJ	
1	UNU
2	DU
3	TRI
4	KVAR
5	KVIN
6	SES
7	SEP
8	OK
9	NAŬ
10	DEK
20	DUDEK
30	TRIDEK
40	KVARDEK
50	KVINDEK
60	SESDEK
70	SEPDEK

ORDAJ NOMBROJ	
1-a	UNUA
2-a	DUA
3-a	TRIA
4-a	KVARA
5-a	KVINA
6-a	SESA
7-a	SEPA
8-a	OKA
9-a	NAŬA
10-a	DEKA
20-a	DUDEKA
30-a	TRIDEKA
40-a	KVARDEKA
50-a	KVINDEKA
60-a	SESDEKA
70-a	SEPDEKA



80	OKDEK
90	NAŮDEK
100	CENT
200	DUCENT
300	TRICENT
400	KVARCENT
500	KVINCENT
600	SESCENT
700	SEPCENT
800	OKCENT
900	NAŮCENT
1000	MIL

80-a	OKDEKA
90-a	NAŮDEKA
100-a	CENTA
200-a	DUCENTA
300-a	TRICENTA
400-a	KVARCENTA
500-a	KVINCENTA
600-a	SESCENTA
700-a	SEPCENTA
800-a	OKCENTA
900-a	NAŮCENTA
1000-a	MILA

## **VORTARETO**

**AĈETI** = akiri per mono.

**AĴO** = substantiva sufikso indikanta konkretan aferon faritan el la koncerna radiko.

**ALIA** = ne la sama; ne identa, diferenca. *Paŭlo ne loĝas en tiu ĉi strato, sed li loĝas en alia strato.*

**ALLOGA** = plaĉa, agrabla, plezuriga.

**AMBAŬ** = la du.

**ANKAŬ** = plie, krome, tiel same.

**ANTA** = adjektiva aktiva prezenca participo.

**BO** = prefikso montranta peredziĝan aŭ peraminduman parencecon.

**BONVOLU** = Esperanta etikedo por peti ion al iu. Ĝi samvaloras kiel la portugala “*por favor*”. Ĝi uzas la finiĝan paron –u –i (*Bonvolu atenti; bonvolu preni*).

**DO** = konklude, kiel konkludo; kiel konkludon...; dedukte, kiel dedukto; kiel dedukton...

**EDZO** = viro kiu kunvivas kun virino per juĝa kontrakto. *Tarcísio Meira estas la edzo de Glória Menezes, kiu estas la edzino de li.*

**ESTULO** = estaĵo; homo aŭ individuo ekzistanta.

**ĜI** = neŭtra singulara tria persona pronomo (por bestoj kaj objektoj). Eventuala neŭtra persono, pri kiu mi parolas al vi.

**HAVI** = posedi. *Ĉu vi havas (aŭ posedas) aŭtomobilon?*

**HOMA** = adjektivo de homo.

**ILI** = maskla, femala aŭ neŭtra plurala tria persono. La plurala tria pronomo persono, pri kiu mi parolas al vi. (*li + li = ili; ŝi + ŝi = ili; li + ŝi = ili; li + ĝi = ili; ŝi + ĝi = ili; ĝi + ĝi = ili*).

**KIA (KORELATIVO)** = Demando aŭ rilato pri tipo, speco, kvalito.

**KIAJ (KORELATIVO)** = Demando aŭ rilato pri tipoj, specoj, kvalitoj.

**KIES** = Demando aŭ rilato pri posedo, haveco, propeco, proprieteco.

**KIU (KORELATIVO)** = demando aŭ rilato pri nomo, individueco, en la nombro singularo kaj en la kazo nominativo (kiel subjekto).

**KIUJ (KORELATIVO)** = demando aŭ rilato pri nomo, individueco, en la nombro pluralo kaj en la kazo nominativo (kiel subjekto).

**KIUJN (KORELATIVO)** = demando aŭ rilato pri nomo, individueco, en la nombro pluralo kaj en la kazo akuzativo (kiel rekta objekto).

**KIUN (KORELATIVO)** = demando aŭ rilato pri nomo, individueco, en la nombro singularo kaj en la kazo akuzativo (kiel rekta objekto).

**KORO** = ♥.

**LAŬTVOĈE** = parolante laŭte, per alta sono.

**LI** = maskla singulara tria persona pronomo. Eventuala maskla persono, pri kiu mi parolas al vi.

**MAL** = antonimo, kontraŭo de adjektivoj kaj adverboj.

**MASTRO** = Tiu, kiu posedas, kiu havas ion materian aŭ kiu havas povon super alia.

**MI** = singulara unua persona pronomo. La persono, kiu skribe parolas al vi en tiu ĉi momento.

**NASKI** = akuŝi; generi.

**NEK... NEK...** = ne io kaj ankaŭ ne alio; "kaj ankaŭ ne". *Rozo estas nek frukto nek folio, sed ĝi estas floro.*

**NI** = plurala unua persona pronomo (*mi kaj vi; mi kaj li; mi kaj ŝi; mi kaj ĝi; mi kaj ni; mi kaj vi; mi kaj ili*).

**ONI** = ne difinita persona pronomo, iu ajn, iuj ajn; *Oni studas multe en la fakultato. Oni diris, ke hodiaŭ Jozefo volas brakumi onin. Kiam oni estas amantaj, tiam oni estas pli belaj.*

**PRI KIU** = rilate al kiu, koncerne al kiu.

**SED** = kontraŭiga konjunkcio; kontraŭe; male. *Hodiaŭ ne pluvas, sed sunbrilas.*

**SCII** = Posedi, havi en la menso. *Ni devas scii Esperanton. Ĉu vi scias, kie situas la strato...?*

**SI** = plurala tria refleksiva persona pronomo. Ĝi okazas tiam, kiam la plurala tria persono (ili) agas kontraŭ si mem. *Ili (Paŭlo kaj Kreŭza) amas sin (ili amas unu la duan reciproke). Ili (la knabo kaj la knabino) banas sin en la naĝejo.*

**SI** = singulara tria refleksiva persona pronomo. Ĝi okazas tiam, kiam la singulara tria persono (li, ŝi aŭ ĝi) agas kontraŭ si mem. *Ŝi lavas la harojn de si (mem). Gustavo aĉetis aŭtomobilon al si.*

**ŜI** = femala singulara tria persona pronomo. Eventuala femala persono, pri kiu mi parolas al vi.

**TIAL (KORELATIVO)** = demonstrativo pri kaŭzo. Ĝi demonstras aŭ indikas kaŭzon aŭ sekvon post la ago de la subjekto. *Hodiaŭ sunbrilas; tial mi iras al la plaĝo.*

**TIUJ** = pluralo de demonstrativa pronomo indikanta individuecon, specifajn individuojn, grupojn, parojn, homojn aŭ objektojn.

**TIU** = singularo de demonstrativa pronomo indikanta individuecon, specifan individuon, grupon, paron, homon aŭ objekton.

**VI** = plurala dua persona pronomo. La personoj, kiuj legas tion ĉi en tiu ĉi momento. (vi + vi = vi).



### **Unua bilda-vorta teksto**

[Estas bone, kiel plia ekzerco, ke vi kopiu ankaŭ sur kajeron la kolorajn frazojn kaj legu ilin laŭtvoĉe.]



**Li estas Georgo.  
Li estas  
urbanizisto.**

**Li nomiĝas  
Georgo.  
Li laboras kiel  
urbanizisto.**

**Li estas nomata  
Georgo.  
La profesio de li  
estas urbanizisto.**

[Bonvolu respondi per ĉiuj manieroj, parole kaj skribe. Vi povas inversii la manieron. Ekzemple, por la demando “*Kiu estas li?*”, vi povas respondi “*Li nomiĝas...*”.]

- 1) Kiu li estas aŭ kiu estas li? Ĉu li estas Georgo, aŭ ĉu Alfredo?
- 2) Ĉu li nomiĝas Gardelo aŭ Georgo? Kiel vere li nomiĝas?
- 3) Kiel li estas nomata?
- 4) Ĉu vi scias, kio estas li aŭ kio li estas? Ĉu li estas arkitekto, aŭ ĉu urbanizisto? Kio?
- 5) Denove: kiel li laboras? Ĉu vi scias, kiel? Ĉu li laboras kiel dentisto?
- 6) Kiu estas lia profesio? Ĉu ŝoforo aŭ agronomo? Lia profesio (aŭ la profesio de li) estas nek ŝoforo nek agronomo, sed lia profesio estas \_\_\_\_\_.
- 7) Kiu estas vi? Kiel vi nomiĝas?
- 8) Kiel vi estas nomata?
- 9) Kio estas Neymar?
- 10) Kiu estas la profesio de Dilma Rouseff?
- 11) Kiel (per kiu profesio) laboras virino, kiu kuracas dentodoloron?



**Ŝi estas Sinjorino**    **Ŝi estas nomata**  
**Analia, la patrino**    **Analia. Ŝi estas**  
**de Georgo.** ←    **lia patrino.**

**Ŝia nomo estas**  
**Analia. Ŝi naskis**  
**Georgon.**

- 12) Kiu estas ŝi aŭ kiu ŝi estas?
- 13) Kiel ŝi estas nomata?
- 14) Kiu estas ŝia nomo?
- 15) Kies patrino ŝi estas aŭ estas ŝi?
- 16) Kiun ŝi naskis? \_\_\_\_\_-n.
- 17) Kiu estas ŝia filo?
- 18) Kiel nomiĝas ŝia filo?
- 19) Kiel ŝi nomiĝas?
- 20) Kiel nomiĝas via patrino?
- 21) Kiu estas la viro, kiun ŝi naskis?





**Li estas nomata**  
**Sinjoro Karlo.**  
**Li estas la patro**  
**de Georgo.**

**Lia nomo estas**  
**S-ro Karlo. Lia filo**  
**estas Georgo.**

**Li nomiĝas Karlo.**  
**Li naskigis**  
**Georgon.**

- 22) Kiu estas li aŭ kiu li estas?
- 23) Kiel li estas nomata?
- 24) Kiu estas lia nomo?
- 25) Kies patro li estas aŭ estas li?
- 26) Kiun li naskigis? \_\_\_\_\_-n.
- 27) Kiu estas lia edzino?
- 28) Kies edzo li estas?
- 29) Kiel nomiĝas lia edzino?
- 30) Kiel li kaj lia filo nomiĝas? \_\_\_\_\_kaj \_\_\_\_\_.
- 31) Kiel nomiĝas vi kaj via patro? \_\_\_\_\_kaj \_\_\_\_\_.
- 32) Kiu estas la viro, kiun li naskigis?



**Ŝi estas Rita.**  
**Ŝi estas**  
**dekoraciistino.**  
**Ŝi estas la**  
**amatino de**  
**Georgo.**

**Ŝi estas nomata**  
**Rita. Ŝi laboras**  
**kiel**  
**dekoraciistino.**  
**Ŝi estas la**  
**amindumantino**  
**de Georgo.**

**Ŝi nomiĝas Rita.**  
**Ŝi havas la**  
**profesion de**  
**dekoraciistino.**  
**Ŝia amato estas**  
**Georgo.**

- 33) Kiu estas ŝi aŭ kiu ŝi estas? Ĉu Tereza? Kiu?
- 34) Per alia maniero: kiel ŝi estas nomata?
- 35) Kiel nomiĝas ŝi? Ĉu ŝi nomiĝas Katarina, aŭ ĉu Eleonora? Nek \_\_\_\_\_ nek \_\_\_\_\_, sed \_\_\_\_\_.
- 36) Kio estas ŝi? Ĉu ŝi estas profesorino aŭ bibliotekistino?
- 37) Kiel ŝi kaj Georgo laboras? Ŝi laboras kiel \_\_\_\_\_ kaj li laboras kiel \_\_\_\_\_.
- 38) Kiun profesion Rita havas?
- 39) Kiun profesion havas Georgo?
- 40) Kiujn profesiojn Georgo kaj Rita havas? Ili havas la profesiojn de \_\_\_\_\_ kaj de \_\_\_\_\_.
- 41) Kies amatino Rita estas aŭ kies Rita estas amatino?
- 42) Ĉu Rita estas la amindumantino de Georgo? Jes aŭ ne?
- 43) Kiun ŝi amindumas?




**Ĝi estas Babiko,  
la hundo de  
Georgo.**

**Ĝi nomiĝas  
Babiko.  
Ĝi estas la hundo  
de Georgo.**

**Ĝi estas nomata  
Babiko. Ĝia  
mastro estas  
Georgo.**

- 44) Ĉu vi scias ĝian nomon? Kiu estas ĝi?
- 45) Ripete, kiel ĝi nomiĝas?
- 46) Denove, ĉu vi scias, kiel ĝi estas nomata?
- 47) Kiu estas ĝia mastro?
- 48) Kies besto ĝi estas?
- 49) Kies hundo ĝi estas?
- 50) Kies hundo Georgo estas mastro?
- 51) Kiun beston havas Georgo? Ĉu hundon, aŭ ĉu porkon?
- 52) Kiun hundon havas Georgo?
- 53) Kio estas Georgo kaj Babiko? Ĉu planto kaj objekto? Ili estas nek planto nek objekto, sed ili estas \_\_\_\_\_ kaj \_\_\_\_\_.
- 54) Kiu besto Babiko estas? Ĉu kato, aŭ ĉu ĉevalo? Nek kato, nek ĉevalo, sed \_\_\_\_\_.

## GRUPO DE HOMOJ



**Ili estas plaĉaj homoj.**

**Tiuj grupanoj estas agrablaj personoj.**

**La homgrupanoj estas ĉarmaj homaj estuloj.** 🔊

- 55) Ĉu ili estas plaĉaj (agrablaj) homoj?
- 56) Denove: kiaj ili estas?
- 57) Ĉu tiuj homoj estas malagrablaj?
- 58) Kiu estas plaĉaj?
- 59) Kiu plaĉas?
- 60) Ĉu S-ro Karlo estas plaĉa homo?
- 61) Ĉu estas agrabla la bofilino de S-ro Karlo?
- 62) Kiu personoj estas plaĉaj?
- 63) Kiu grupanoj estas agrablaj?
- 64) Kiu homgrupanoj estas agrablaj?
- 65) Ĉu ĉiuj ili estas agrablaj, plaĉaj, allogaj, bonaj homoj?




Ili estas  
geamantoj.

Tiu paro  
amas sin.

Ili ambaŭ  
amindumas unu  
la duan.




- 66) Kiun Georgo amindumas?
- 67) Kies Georgo estas amato?
- 68) Kiu estas lia amatino?
- 69) Kiu estas ŝia amato?
- 70) Ĉu ili amas unu la duan (aŭ unu la alian)? Jes aŭ ne?
- 71) Kies amindumantino ŝi estas?
- 72) Kies amindumanto estas li?
- 73) Ĉu tiu juna paro amas sin reciproke?
- 74) Ĉu ili estas geedzoj, aŭ ĉu nur geamatoj?



- 75) Kiu estas ili?
- 76) Kies gepatroj estas ili?
- 77) Ĉu vi scias, kies patrino kaj patro ili estas?
- 78) Kies filo estas Georgo?
- 79) Kies edzo S-ro Karlo estas?
- 80) Kies edzino S-ino Analia estas?
- 81) Kiun filon la geedza paro havas?
- 82) Kiu estas la gepatroj de Georgo?
- 83) Kiujn gepatrojn Georgo havas?
- 84) Kiu estas la filo kaj la edzino de S-ro Karlo?
- 85) Kiu estas la filo kaj la edzo de S-ino Analia?
- 86) Kies filo aŭ filino vi estas?
- 87) Ĉu vi havas filon aŭ filinon? Se jes, kiu estas via filo aŭ filino?
- 88) Ĉu vi havas filojn kaj filinojn? Se jes, kiujn nomojn havas viajn gefilojn?





**Ili estas  
boparencoj.**

**Ŝi (Analia) estas  
ŝia (de Rita)  
popatrino kaj ŝi  
(Rita) estas ŝia  
(de Analia)  
bofilino.**

**Ili ambaŭ havas  
boparencecon.**

- 89) Rita estas la amatino de Georgo; tial ŝi diras, ke S-ino Analia estas ŝia bopatrino. Do respondu: kiu estas la bopatro de Rita?
- 90) Ankaŭ S-ino Analia diras, ke Rita estas ŝia bofilino, kaj ke ili estas boparencoj.
- 91) Do kies Rita estas bofilino? De \_\_\_\_\_ kaj de \_\_\_\_\_.
- 92) Kies S-ro Karlo estas bopatro?
- 93) Kies bopatrino estas S-ino Analia?
- 94) Kiuj estas la bogepatroj de Rita?
- 95) Kiun bofilinon la patrino de Georgo havas?
- 96) Kiun bofilinon havas la patro de Georgo?
- 97) Kiun bofilinon havas la geedza paro S-ro Karlo kaj S-ino Analia?
- 98) Ĉu vi estas bopatro aŭ bopatrino? Se jes, kies bopatro aŭ bopatrino vi estas?
- 99) Ĉu vi estas bofilo aŭ bofilino? Se jes, kies bofilo aŭ bofilino vi estas?




**Ili estas tre afablaj  
unu kun la dua.**


**Li kaj ĝi tre  
afablas unu al la  
alia.**

**Estas multa  
afableco inter ili  
ambaŭ.**

- 100) Ĉu ili estas vivantaj estaĵoj? Jes, \_\_\_\_\_.
- 101) Ĉu Babiko estas homo aŭ besto?
- 102) Kio estas Georgo? Ĉu homo aŭ besto?
- 103) Kio estas Babiko?
- 104) Ĉu ili ambaŭ estas homaj estaĵoj (aŭ homaj estuloj)? Ne. Georgo estas homa estaĵo (aŭ homa estulo), sed la hundo, ne. La hundo estas vivanta estaĵo, besta estaĵo, sed ne homa estaĵo/estulo. El ili du nur Georgo estas homa estaĵo aŭ homa estulo.
- 105) Kiu inter ili du estas homo?
- 106) Kiu inter ili estas besto?
- 107) Kiaj ili estas unu kun la dua? \_\_\_\_\_aj.
- 108) Ĉu ili afablas unu al la alia?
- 109) Kio estas ili ambaŭ? \_\_\_\_\_aj \_\_\_\_\_oj.
- 110) Ĉu vi havas beston? Se jes, kiun beston vi havas? Kia ĝi estas?



- 1) Kiuj estas ili?
- 2) Kies gepatroj estas ili?
- 3) Ĉu vi scias, kies patrino kaj patro ili estas?
- 4) Kies filo estas Georgo?
- 5) Kies edzo S-ro Karlo estas?
- 6) Kies edzino S-ino Analia estas?
- 7) Kiun filon la geedza paro havas?
- 8) Kiuj estas la gepatroj de Georgo?
- 9) Kiujn gepatrojn Georgo havas?
- 10) Kiuj estas la filo kaj la edzino de S-ro Karlo?
- 11) Kiuj estas la filo kaj la edzo de S-ino Analia?
- 12) Kies filo aŭ filino vi estas?
- 13) Ĉu vi havas filon aŭ filinon? Se jes, kiu estas via filo aŭ filino?
- 14) Ĉu vi havas filojn kaj filinojn? Se jes, kiujn nomojn havas viajn gefilojn?



**Ili estas  
boparencoj.**

**Ŝi (Analia) estas  
ŝia (de Rita)  
popatrino kaj ŝi  
(Rita) estas ŝia  
(de Analia)  
bofilino.**

**Ili ambaŭ havas  
boparencecon.**

- 15) Rita estas la amatino de Georgo; tial ŝi diras, ke S-ino Analia estas ŝia bopatrino. Do respondu: kiu estas la bopatro de Rita?
- 16) Ankaŭ S-ino Analia diras, ke Rita estas ŝia bofilino, kaj ke ili estas boparencoj.
- 17) Do kies Rita estas bofilino? De \_\_\_\_\_ kaj de \_\_\_\_\_.
- 18) Kies S-ro Karlo estas bopatro?
- 19) Kies bopatrino estas S-ino Analia?
- 20) Kiuj estas la bogepatroj de Rita?
- 21) Kiun bofilinon la patrino de Georgo havas?
- 22) Kiun bofilinon havas la patro de Georgo?
- 23) Kiun bofilinon havas la geedza paro S-ro Karlo kaj S-ino Analia?
- 24) Ĉu vi estas bopatro aŭ bopatrino? Se jes, kies bopatro aŭ bopatrino vi estas?
- 25) Ĉu vi estas bofilo aŭ bofilino? Se jes, kies bofilo aŭ bofilino vi estas?



**Ili estas tre afablaj  
unu kun la dua.**

**Li kaj ĝi tre  
afablas unu al la  
alia.**

**Estas multa  
afableco inter ili  
ambaŭ.**

- 26) Ĉu ili estas vivantaj estaĵoj? Jes, \_\_\_\_\_.
- 27) Ĉu Babiko estas homo aŭ besto?
- 28) Kio estas Georgo? Ĉu homo aŭ besto?
- 29) Kio estas Babiko?
- 30) Ĉu ili ambaŭ estas homaj estaĵoj (aŭ homaj estuloj)? Ne. Georgo estas homa estaĵo (aŭ homa estulo), sed la hundo, ne. La hundo estas vivanta estaĵo, besta estaĵo, sed ne homa estaĵo/estulo. El ili du nur Georgo estas homa estaĵo aŭ homa estulo.
- 31) Kiu inter ili du estas homo?
- 32) Kiu inter ili estas besto?
- 33) Kiaj ili estas unu kun la dua? \_\_\_\_\_aj.
- 34) Ĉu ili afablas unu al la alia?
- 35) Kio estas ili ambaŭ? \_\_\_\_\_aj \_\_\_\_\_oj.
- 36) Ĉu vi havas beston? Se jes, kiun beston vi havas? Kia ĝi estas?

## TABELO DE LA PARTICIOPOJ

			AKTIVA	PASSIVA					
PREZENC	A		NT	T	O	SUBSTANTIVO			
PRETERITO	I				A	ADJEKTIVO			
FUTURO	O				E	ADVERBO			
O	NT	O					O	T	O
O	NT	A					O	T	A
O	NT	E					O	T	E
A	NT	O					A	T	O
A	NT	A					A	T	A
A	NT	E					A	T	E
I	NT	O					I	T	O
I	NT	A					I	T	A
I	NT	E					I	T	E



<b>MARDO</b>	<b>MERKREDO</b>		<b>ĴAŬDO</b>
	<b>MATENO</b>	<b>VESPERO</b>	<b>NOKTO</b>

1. Estas la mateno en la merkredo. Trinkinte kafon kun lakto, Georgo diras, ke en la vespero li aĉetos la aŭtomobilon.

Georgo estas aĉet**onta** la aŭtomobilon.

La aĉet**onta** Georgo deprenas monon en banko.

Georgo estas la aĉet**onto**.

Aĉet**onte**, Georgo deprenas monon en banko.

Aĉet**onte** la aŭtomobilon, Georgo deprenas monon en banko.

- 1) *Matene en la merkredo kia ankoraŭ estas GEORGO? Ĉu li estas aĉet**onta**, aŭ ĉu li estas aĉet**ota**? [En tiu ĉi tuta ekzercaro ni konsideru la a-finiĝan participon kiel adjektivon].*
- 2) *Matene en la merkredo, se Georgo ankoraŭ deprenas monon en bankoficejo, li estas \_\_\_\_\_.*
- 3) *Matene en la merkredo kial Georgo deprenas monon en banko? (respondu, uz**ante** participon). R.: Li deprenas monon en banko, ĉar li estas \_\_\_\_\_.*
- 4) *Matene en la merkredo kio estas Georgo? Ĉu li estas la aĉet**onto**, aŭ ĉu li estas la aĉet**oto**? [En tiu ĉi tuta ekzercaro ni konsideru la o-finiĝan participon kiel substantivon].*
- 5) *Matene en la merkredo kiel Georgo deprenas monon en la banko? Ĉu li deprenas monon aĉet**onte**, aŭ ĉu li deprenas monon, aĉet**ote**? [En tiu ĉi tuta ekzercaro ni konsideru la e-finiĝan participon kiel manieran adverbbon.]*
- 6) *Depren**ante** monon en banko, kia estas Georgo?*
- 7) *Enir**ante** en la bankon, kio estas Georgo?*
- 8) *Enbankiĝ**ante**, kia estas Georgo?*
- 9) *Enir**onte** en la aŭto-revendejon, kia estas Georgo?*
- 10) *Kia Georgo estas, se li ankoraŭ ne deprenis la monon? R.: Li estas depren\_\_\_\_\_ la monon.*

2. Ankoraŭ en la merkredo matene.

La aŭtomobilo estas aĉetota.

La aĉetota aŭtomobilo ricevas benzinon (specon de fuelo).

La aŭtomobilo estas la aĉetoto.

Aĉetote, la aŭtomobilo ricevas benzinon.

Aĉetote de Georgo, la aŭtomobilo ricevas benzinon.

- 11) *Matene merkrede kia estas la aŭtomobilo?*
- 12) *Se la aŭtomobilo ankoraŭ ricevas benzinon, kio estas ĝi?*
- 13) *Kiel la aŭtomobilo estas ricevanta benzinon?*
- 14) *Kia estas la aŭtomobilo, dum Georgo ankoraŭ estas deprenanta monon en la banko?*
- 15) *Kiel la aŭtomobilo estas, se Georgo ankoraŭ ne estas enirinta en la aŭto-revendejon?*
- 16) *Kio estas la aŭtomobilo, se la aĉetonto ankoraŭ ne eniris en la aŭto-revendejon?*
- 17) *Se la aŭtomobilo estas ricevanta benzinon, kia estas tiu, kiu estas eniranta en bankoficejon?*
- 18) *Se la aĉetonto estas deprenanta monon, kia estas la benzin-ricevanto? R.: Ĝi estas aĉet \_\_\_\_\_.*
- 19) *Se la aŭtomobilo, kiu ricevas fuelon, ankoraŭ estas la aĉet \_\_\_\_\_, Georgo, kiu deprenas monon, estas la aĉet \_\_\_\_\_.*
- 20) *Se la aŭtomobilo ankoraŭ adiaŭos (aŭ estas adiaŭonta) la aŭto-revendejon, tio signifas, ke ĝi estas aĉet \_\_\_\_\_ de Georgo, kaj ke Georgo estas aĉet \_\_\_\_\_ ĝin.*

3. Estas la vespero en la merkredo. Georgo aĉetas la aŭtomobilon.

Georgo estas aĉetanta la aŭtomobilon.

La aĉetanta Georgo donas la monon al la vendisto.

Georgo estas la aĉetanto.

Aĉetante, Georgo donas la monon al la vendisto.

Aĉetante la aŭtomobilon, Georgo donas la monon al la vendisto.

- 21) *Se estas la merkredo vespere, kia estas GEORGO?*
- 22) *Kiel Georgo donas la monon al la vendisto?*
- 23) *Farante kion Georgo donas monon?*
- 24) *Kio estas Georgo en la merkreda vespero?*
- 25) *Kio estas la vendisto en la merkreda vespero? R.: Li estas la mon-ricev \_\_\_\_\_ aŭ li estas la vend \_\_\_\_\_.*
- 26) *Kion donas la donanto, kiam li aĉetas la aŭtomobilon?*
- 27) *Kia estas la vendisto, kiam li vendas la aŭtomobilon? Li estas ricev \_\_\_\_\_ la monon kaj vend \_\_\_\_\_ la aŭtomobilon.*
- 28) *Kiel la vendisto vendas? R.: li vendas, ricev \_\_\_\_\_ la monon.*
- 29) *Se io estas adiaŭanta la aŭto-revendejon, kio ĝi estas?*
- 30) *Se Georgo estas la mon-donanto, kio estas la vendita vendisto?*

#### 4. Ankoraŭ en la merkredo vespere.

La aŭtomobilo estas aĉetata.

La aĉetata aŭtomobilo adiaŭas la aŭto-revendejon.

La aŭtomobilo estas la aĉetato.

Aĉetate, la aŭtomobilo adiaŭas la aŭto-revendejon.

Aĉetate de Georgo, la aŭtomobilo adiaŭas la aŭto-revendejon.

- 31) *Merkrede vespere kia estas la aŭtomobilo?*
- 32) *Kio estas la aŭtomobilo en la merkreda vespero?*
- 33) *Se la aŭtomobilo adiaŭas la aŭto-revendejon, kia ĝi estas estanta?*
- 34) *Kiel la aŭtomobilo estas vendata de la vendisto?*
- 35) *Kiel la vendisto donas la vendaton?*
- 36) *Kiu estas adiaŭ \_\_\_\_\_ la aŭto-revendejon?*
- 37) *Kiuj estas la mon-don \_\_\_\_\_, la mon-ricev \_\_\_\_\_ kaj la vend \_\_\_\_\_?*
- 38) *Kiel la aŭtomobilo adiaŭas la aŭto-revendejon? R.: Ĝi adiaŭas la aŭto-revendejon, vend \_\_\_\_\_ de la vendisto kaj aĉet \_\_\_\_\_ de Georgo.*
- 39) *Kia estas la aŭto-revendejo en la vespero merkrede? R.: Ĝi estas adiaŭ \_\_\_\_\_.*
- 40) *Kio estas la ploranta aŭto-revendejo dum la merkreda vespero? Ĝi estas la adiaŭ \_\_\_\_\_.*

5. Nun estas la nokto en la merkredo. Memoru, ke en la vespero Georgo aĉetis la aŭtomobilon.

Georgo estas aĉetinta la aŭtomobilon.

La aĉetinta Georgo veturas sur la ŝoseo.

Georgo estas la aĉetinto.

Aĉetinte, Georgo veturas sur la ŝoseo.

Aĉetinte la aŭtomobilon, Georgo veturas sur la ŝoseo.

- 41) Supozante, ke ni estas denove en la merkredo vespere, kia estas tiu eliriĝinta el la bankoficejo?
- 42) Supozante, ke ni estas denove en la merkredo matene, se Georgo estas la paganto, kio li estas nun en la bankoficejo? R.: Li estas la aĉet\_\_\_\_\_.
- 43) Supozante, ke ni estas denove en la merkredo vespere, se Georgo estas la paganto, kio li estas nun en la aŭto-revendejo? R.: Li estas la aĉet\_\_\_\_\_.
- 44) Se nun, en la nokto, Georgo estas la paginto, kio li estas sur la ŝoseo? R.: Li estas la aĉet\_\_\_\_\_.
- 45) En la merkreda nokto, kio estas la mon-doninto? R.: Li estas la vend\_\_\_\_\_.
- 46) En la merkredo nokte kia estas tiu eliriĝinta el la aŭto-revendejo?
- 47) Doninte la monon, kio estas Georgo?
- 48) Aĉet\_\_\_e kion, Georgo veturas sur la ŝoseo?
- 49) Se Georgo jam veturas sur la ŝoseo, kion tio signifas? R.: Tio signifas, ke li jam estas aĉet\_\_\_ la aŭtomobilon.

6. Ankoraŭ en la merkredo nokte.

La aŭtomobilo estas aĉeti**ta**.

La aĉeti**ta** aŭtomobilo iras sur la ŝoseo.

La aŭtomobilo estas la aĉeti**to**.

Aĉeti**te**, la aŭtomobilo iras sur la ŝoseo.

Aĉeti**te** de Georgo, la aŭtomobilo iras sur la ŝoseo.

- 50) *En la merkreda nokto, kia estas la aŭtomobilo?*
- 51) *Kial la aŭtomobilo jam iras sur la ŝoseo? R.: Ĉar ĝi jam estas aĉet\_\_\_\_\_.*
- 52) *Jam for de la aŭto-revendejo, kio estas Georgo kaj la aŭtomobilo?*
- 53) *Kiel la aŭtomobilo iras sur la ŝoseo?*
- 54) *Kiel de kiu la aŭtomobilo adiaŭis la aŭto-revendejon?*
- 55) *Kio estas la veturilo, nun konduk**ate** de Georgo?*
- 56) *Kia estas la adiaŭ**into** de la aŭto-revendejo?*
- 57) *Kiu pagis kaj kiu adiaŭis respektive? R.: La pag\_\_\_\_\_ kaj la adiaŭ\_\_\_\_\_, aŭ la aĉet\_\_\_\_\_ kaj la vend\_\_\_\_\_ respektive.*
- 58) *Jam for de la revendejo, kiu estas stir**anta** kaj kiu estas stir**ata**? R.: Respektive la aĉet\_\_\_\_\_ kaj la aĉet\_\_\_\_\_.*
- 59) *En la nokto, kies la aĉet\_\_\_\_\_ estas la aŭtomobilo? Kaj kies la aĉet\_\_\_\_\_ estas Georgo?*

7. Atentu! Mi parolas al vi matene en la merkredo.

Nun, matene, Georgo estas aĉet**onta** kaj la aŭtomobilo estas aĉet**ota**. Georgo estas la aĉet**onto** kaj la aŭtomobilo estas la aĉet**oto**.

Hodiaŭ vespere, Georgo estos aĉet**anta** kaj la aŭtomobilo estos aĉet**ata**. Vespere Georgo estos la aĉet**anto** kaj la aŭtomobilo estos la aĉet**ato**.

Hodiaŭ nokte, Georgo estos aĉet**inta** kaj la aŭtomobilo estos aĉet**ita**. Nokte Georgo estos la aĉet**into** kaj aŭtomobilo estos la aĉet**ito**.

- 60) *Se estas la merkredo matene, kia estas Georgo kaj kia estas la aŭtomobilo?*
- 61) *Se Georgo estas en la banko, kio li estos en la vespero kaj kio la aŭtomobilo estos en la nokto?*
- 62) *Se la aŭtomobilo adiaŭas la aŭto-revendejon, kia ĝi estis matene kaj kia ĝi estos nokte?*
- 63) *Se noktiĝis en la merkredo, kio Georgo kaj la aŭtomobilo estis matene?*
- 64) *Se estas la mateno en la merkredo, kio la aŭtomobilo kaj Georgo estos en la nokto?*
- 65) *Ni imagu, ke ankoraŭ estas la mateno de la merkredo: kia Georgo estos en la vespero kaj en la nokto?*
- 66) *Se estas la merkredo vespere, kia la aŭtomobilo estas nun (en ĉi tiu momento) kaj kia ĝi estos en la nokto?*
- 67) *Ni estas en la merkreda vespero: en la merkreda nokto kio estas la aŭtomobilo? Kaj en la merkredo matene kio estis Georgo?*
- 68) *Kio Georgo estis en la merkreda mateno rilate al la vespero?*
- 69) *Se Georgo deprenas monon en la mateno, kio estos la aŭtomobilo en la vespero kaj en la nokto?*

8. Estu atenta! Mi parolas al vi merkrede vespere.

Nun, vespere, Georgo estas aĉetanta kaj la aŭtomobilo estas aĉetata. Nun, Georgo estas la aĉetanto kaj la aŭtomobilo estas la aĉetato.

Hodiaŭ matene, Georgo estis aĉetanta kaj la aŭtomobilo estis aĉetata. Matene Georgo estis la aĉetanto kaj la aŭtomobilo estis la aĉetato.

Hodiaŭ nokte en la merkredo, Georgo estos aĉetanta kaj la aŭtomobilo estos aĉetata.

- 70) *Se estas vespere, kio estas la mon-donanto kaj kio estas la adiaŭanto?*  
71) *Se Georgo kaj la aŭtomobilo ankoraŭ estas en la aŭto-revendejo, kio estas la vendisto?*  
R.: *Li estas la vend\_\_\_\_\_.*  
72) *Kio estis la aŭtomobilo, dum ĝi estis ricevanta fuelon?*  
73) *Kio estis Georgo, dum li estis deprenanta monon?*  
74) *Kio estis la vendisto, dum li atendis la klienton?*  
75) *En la mateno, kia estis Georgo dum li estis atendanta alviciĝinte (aŭ alirinte en la vicon) en la banko?*  
76) *Ni imagu, ke estas la vespero: kiel la aŭtomobilo estas adiaŭanta?*  
77) *Matene kia estis Georgo kaj la aŭtomobilo respektive?*  
78) *Vespere kia estos la adiaŭanto en la nokto?*  
79) *Post la noktiĝo, kiel Georgo kondukas (stiras, gvidas) la aŭtomobilon?*



9. Estu tre atenta! Mi parolas al vi nokte en la merkredo.

Hodiaŭ matene, Georgo estis aĉet**onta** kaj la aŭtomobilo estis aĉet**ota**. Matene Georgo estis la aĉet**onto** kaj la aŭtomobilo estis la aĉet**oto**.

Hodiaŭ vespere, Georgo estis aĉet**anta** kaj la aŭtomobilo estis aĉet**ata**. Vespere Georgo estis la aĉet**anto** kaj la aŭtomobilo estis la aĉet**ato**.

Nun, nokte, Georgo estas aĉet**inta** kaj la aŭtomobilo estas aĉet**ita**. Nokte, Georgo estas la aĉet**into** kaj la aŭtomobilo estas la aĉet**ito**.

- 80) En la merkredo matene kia estis la enbankiĝ**into** kaj enaŭtorevendejiĝ**onto**?
- 81) Nun, en la merkreda nokto, kio estas la mon-doni**into** kaj la adiaŭ**into**?
- 82) En la merkreda mateno, kia estis la fuel-ricev**anto** kaj elaŭtorevendejiĝ**onto**?
- 83) En la merkreda vespero, kiaj estis la elhejmiĝ**into** kaj la benzin-ricev**into**?
- 84) En la merkredo matene kio estis Georgo kaj kio estis la aŭtomobilo?
- 85) En la vespero de la merkredo kia estis la adiaŭ**anto** kaj kia estis la elhejmiĝ**into**?
- 86) Ni imagu, ke vesperiĝis: kia estas la vetur**onto** kaj kia estas la ir**onto** sur la ŝoseo?
- 87) Ni imagu, ke noktiĝis: kia estas la pag**into** kaj kia estas la adiaŭ**into**?
- 88) En tiu ĉi merkreda nokto kiaj kaj kio la mon-depren**into** kaj la benzin-ricev**into** estis en la mateno kaj poste en la vespero? [Faru ses participajn respondojn kun la radiko "aĉet".]
- 89) Nun (en la merkreda nokto) kio estas la enaŭtomobiliĝ**into** kaj vetur**anto**, kaj kio estas la antaŭe adiaŭ**inta** kaj nun la surŝoseiĝ**into** (aŭ ir**anto** sur la ŝoseo)?

10. Atenton! Mi parolas al vi en la mardo, la antaŭa tago

Morgaŭ, en la merkredo, matene, Georgo estos aĉet**onta** kaj la aŭtomobilo estos aĉet**ota**. Morgaŭ matene Georgo estos la aĉet**onto** kaj la aŭtomobilo estos la aĉet**oto**.

- 90) *Morgaŭ (en la merkredo) matene kio estos Georgo kaj kio estos la aŭtomobilo?* [Bonvolu ĉiam respondi uz**ante** participojn kun la radiko “aĉet”. Rimarku, ke la demando temas pri futuro de futuro.]
- 91) *En la morgaŭa tago (merkredo), matene, kio estos la enbankiĝ**onta** kaj mon-depren**onta** elhejmiĝ**onto**?*
- 92) *Morgaŭ matene kio estos la pag**onta** enaŭtorevendejiĝ**onto**?*
- 93) *Merkrede frue (tuj post la mateniĝo) kiel Georgo estos enir**anta** en la bankon?*  
[Respondu, uz**ante** la futuran aktivan adverbajn participojn kun la verba radiko “aĉet”.]
- 94) *Merkrede frue (tuj post la mateniĝo) kiel la aŭtomobilo estos ricev**anta** benzinon?*  
[Respondu, uz**ante** la futuran pasivan adverbajn participojn kun la verba radiko “aĉet”.]
- 95) *Se nun estas la mardo, kio estos la fuel-ricev**onto** morgaŭ en la mateno?*
- 96) *Kion Georgo estos depren**onta**, kiam li ankoraŭ estos enbankiĝ**onta**?*
- 97) *Kion la aŭtomobilo ricevos, kiam ĝi estos adiaŭ**onta** la aŭto-revendejon morgaŭ matene?*
- 98) *Morgaŭ matene, Georgo estos depren**anta** monon. Al kiu tiam li estos don**onta** tiun monon?*
- 99) *Morgaŭ matene, dum la aŭtomobilo estos adiaŭ**onta** la aŭto-revendejon, de kiu tiam la vend**onto** estos ricev**onta** monon?*

11. Atenton! Mi parolas al vi en la ĵaŭdo, la posta tago.

Hieraŭ, en la merkredo, nokte, Georgo estis aĉetinta kaj la aŭtomobilo estis aĉetita. Hieraŭ nokte Georgo estis la aĉetinto kaj la aŭtomobilo estis la aĉetito.

- 100) Hieraŭ (en la merkredo) nokte kio estis Georgo kaj kio estis la aŭtomobilo? [Bonvolu ĉiam respondi uzante participojn kun la radiko "aĉet". Rimarku, ke la demando temas pri preterito de preterito aŭ pluskvamperfekta preterito.]
- 101) Hieraŭ (merkrede) en la nokto kio estis la adiaŭinto?
- 102) Hieraŭ nokte kio estis la paginta elaŭtorevendejiĝinto?
- 103) Jam en la merkredo vespere kiel Georgo estis enirinta en la bankon matene? R.:  
Hieraŭ (merkrede) vespere li estis enirinta en la bankon matene, aĉet\_\_\_\_. [Respondu, uzante la futuran aktivan adverban participon kun la verba radiko "aĉet".]
- 104) Merkrede frue (en la mateno) kiel la aŭtomobilo estis ricevanta benzinon?  
[Respondu, uzante la futuran pasivan adverban participon kun la verba radiko "aĉet".]
- 105) Hieraŭ en la nokto kio estis la fuel-ricevinto?
- 106) Kion Georgo estis depreninta hieraŭ frue, kiam li ankoraŭ estis iranta al la aŭto-revendejo (aŭ kiam li ankoraŭ estis enaŭtorevendejiĝonta)?
- 107) Kion la aŭtomobilo ricevis hieraŭ matene, kiam ĝi estis ankoraŭ adiaŭonta la aŭto-revendejon?
- 108) Hieraŭ nokte, jam veturante, Georgo estis depreninta monon en la mateno. Al kiu li estis doninta tiun monon en la vespero?
- 109) Hieraŭ nokte, la aŭtomobilo estis adiaŭinta la aŭto-revendejon en la vespero. De kiu la vendinto estis ricevinta monon en la vespero?

12. Mi parolas al vi en diversaj momentoj de la merkredo.

- 110) *Paginte*, sed ankoraŭ en la revendejo, kia estas Georgo? R.: Li estas vetur \_\_\_\_\_ sur la ŝoseo.
- 111) *Pagante* nun, merkrede vespere, kio Georgo estos morgaŭ, en la ĵaŭdo? R.: Li estos la \_\_\_\_\_into, la \_\_\_\_\_into kaj la \_\_\_\_\_into.
- 112) *Pagite* nun, merkrede vespere, kio la aŭtomobilo estos morgaŭ, en la ĵaŭdo? R.: Ĝi estos la \_\_\_\_\_ito, la \_\_\_\_\_ito kaj la \_\_\_\_\_ito.
- 113) Kiam la \_\_\_\_\_anta \_\_\_\_\_onto estos \_\_\_\_\_inta, \_\_\_\_\_inta kaj \_\_\_\_\_inta?
- 114) Kiam la \_\_\_\_\_ata \_\_\_\_\_oto estos \_\_\_\_\_ita, \_\_\_\_\_ita kaj \_\_\_\_\_ita?
- 115) *Plenigu la blankojn:*

Hodiaŭ estas mardo:

- a) Morgaŭ (en la merkredo) matene Georgo estos aĉet \_\_\_\_\_ a la aŭtomobilon.
- b) Morgaŭ (en la merkredo) vespere Georgo estos aĉet \_\_\_\_\_ a la aŭtomobilon.
- c) Morgaŭ (en la merkredo) nokte Georgo estos aĉet \_\_\_\_\_ a la aŭtomobilon.
- d) Ankoraŭ aĉet \_\_\_\_\_ e morgaŭ vespere, Georgo veturos morgaŭ nokte.
- e) Ankoraŭ aĉet \_\_\_\_\_ e la aŭtomobilon morgaŭ vespere, Georgo veturos morgaŭ nokte.
- f) Morgaŭ (en la merkredo) matene la aŭtomobilo estos aĉet \_\_\_\_\_ a de Georgo.
- g) Morgaŭ (en la merkredo) vespere la aŭtomobilo estos aĉet \_\_\_\_\_ a de Georgo.
- h) Morgaŭ (en la merkredo) nokte la aŭtomobilo estos aĉet \_\_\_\_\_ a de Georgo.
- i) Ankoraŭ aĉet \_\_\_\_\_ e de Georgo morgaŭ vespere, la aŭtomobilo iros sur la ŝoseo morgaŭ nokte.
- j) Ankoraŭ aĉet \_\_\_\_\_ e morgaŭ vespere, la aŭtomobilo iros sur la ŝoseo morgaŭ nokte.

Hodiaŭ estas merkredo. Ni estas en la vespero:

- k) Hodiaŭ (en la merkredo) matene Georgo estis aĉet \_\_\_\_\_ a la aŭtomobilon.
- l) Nun, merkrede vespere, Georgo estas aĉet \_\_\_\_\_ a la aŭtomobilon.
- m) Hodiaŭ (en la merkredo) nokte Georgo estos aĉet \_\_\_\_\_ a la aŭtomobilon.
- n) Aĉet \_\_\_\_\_ e nun, en la vespero, Georgo veturos hodiaŭ nokte.
- o) Aĉet \_\_\_\_\_ e nun, en la vespero, la aŭtomobilon, Georgo veturos hodiaŭ nokte.
- p) Hodiaŭ (en la merkredo) matene la aŭtomobilo estis aĉet \_\_\_\_\_ a de Georgo.
- q) Nun, merkrede vespere, la aŭtomobilo estas aĉet \_\_\_\_\_ a de Georgo.
- r) Hodiaŭ (en la merkredo) nokte la aŭtomobilo estos aĉet \_\_\_\_\_ a de Georgo.
- s) Aĉet \_\_\_\_\_ e nun, en la vespero, de Georgo, la aŭtomobilo iros sur la ŝoseo hodiaŭ nokte.
- t) Aĉet \_\_\_\_\_ e nun, en la vespero, la aŭtomobilo iros sur la ŝoseo hodiaŭ nokte.

Hodiaŭ estas ĵaŭdo:

- u) Hieraŭ (en la merkredo) matene Georgo estis aĉet \_\_\_\_\_ a la aŭtomobilon.
- v) Hieraŭ (en la merkredo) vespere Georgo estis aĉet \_\_\_\_\_ a la aŭtomobilon.
- w) Hieraŭ (en la merkredo) nokte Georgo estis aĉet \_\_\_\_\_ a la aŭtomobilon.
- x) Jam aĉet \_\_\_\_\_ e hieraŭ matene, Georgo veturis hieraŭ nokte.

- y) Jam aĉet \_\_\_\_\_ e la aŭtomobilon hieraŭ matene, Georgo veturis hieraŭ nokte.  
 z) Hieraŭ (en la merkredo) matene la aŭtomobilo estis aĉet \_\_\_\_\_ a de Georgo.  
 aa) Hieraŭ (en la merkredo) vespere la aŭtomobilo estis aĉet \_\_\_\_\_ a de Georgo.  
 bb) Hieraŭ (en la merkredo) nokte la aŭtomobilo estis aĉet \_\_\_\_\_ a de Georgo.  
 cc) Jam aĉet \_\_\_\_\_ e de Georgo hieraŭ matene, la aŭtomobilo iris sur la ŝoseo hieraŭ nokte.  
 dd) Jam aĉet \_\_\_\_\_ e hieraŭ matene, la aŭtomobilo iris sur la ŝoseo hieraŭ nokte.

## DEK-KVARA LECIONO



En la lasta junio, dum siaj ferioj, **Georgo kaj Rita decidis, ke ili faros vizitojn al ses el la urboj-sidejoj** de la Tutmonda Futbalkokalo 2014.

Dum la lasta monato junio, feriante, **Georgo kaj Rita decidis viziti ses urbojn, kie okazis partioj de la Pokalo de la Mondo pri Piedpilko en 2014.**

En la lastjuna libertempo, **Georgo kaj Rita interkonsentis viziti ses el la dek du urbojn, kiuj gastigis ludojn de la piedpilka Pokalo de la Mondo en 2014.**



- 1) Kion Georgo kaj Rita interkonsentis fari dum siaj komunaj ferioj (aŭ libertempo), lastjunie?
- 2) Kiu monda sporta konkurso okazis dum ilia periodaj ferioj?
- 3) Kion ili decidis viziti libertempe?
- 4) Kiom da urboj sidejis (aŭ sidejigis, aŭ gastigis) la 32 selektitarojn en la futbala Pokalo de la Mondo (evento organizata de FIFA (Federacio Internacia de Futbalo Asocia), ĉiun kvaran jaron)?
- 5) Kial tiu pokalo ĉi-jare okazis en Brazilo? Kie ĝi okazis lastfoje, tio estas, antaŭ kvar jaroj?
- 6) Ĉu vi ĉeestis persone en kelkaj el la stadionoj de tiu turniro, por spekti la koncernajn matĉojn? Aŭ ĉu vi spektis ilin nur televide?
- 7) Se vi estas brazilano, ĉu en via loĝurbo okazis partioj de tiu sportkonkurso? Se ne, kiu urbo plej proksima al la via okazigis ilin?
- 8) Se vi ne estas brazilano, ĉu via lando partoprenis en tia turniro?
- 9) Kiun pilkludon vi plej preferas? Ĉu piedpilkon (aŭ piedpilk-ludon, aŭ futbalon), korbopilkon (aŭ basketbalon), retpilkon (aŭ volejbalon), manpilkon (aŭ handbalon) aŭ tenison?
- 10) Kien vi vojaĝis lastfoje for de via urbo aŭ for de via lando, en ferioj?

- 11) Kien vi planas libertempe vojaĝi venontfoje?
- 12) Kiom da tagoj vi kutime restas libertempe, sen laboro aŭ studo, dum la jaro? Ĉu 30? 20? 15?
- 13) Ĉu vi jam pensis rezervi monon en via bankkonto, kaj ankaŭ la monaton januaron 2015 en via kalendaro, por libertempi kaj partopreni la venontan brazilan esperantan kongreson en Rio-de-Ĵanejro, la ĉefurbo de la brazila federacia ŝtato Rio-de-Ĵanejro?
- 14) Aŭ ĉu vi preferos rezervi monon en la banko kaj ankaŭ la monaton julio 2015 en via kalendaro, por libertempi kaj partopreni la venontan universalan esperantan kongreson, la 100-an, en Francujo?

Ili eksciis, ke **gastigos ludojn** de tiu sportkonkurso **12 urboj**. **Sciinte tion**, ili faris vojaĝ-planon, por viziti 6 el la dekduo da urboj.

La paro estis informita, ke **estos partioj de tiu internacia turniro en 12 grandurboj**. **Sciinte, kiuj estos ili**, ili ambaŭ preparis la itineron de vojaĝoj, por koni seson da urboj el ĉiuj dek du.

Laŭ ili **informiĝis, okazos matĉoj** de tiu pokalo en dek du ĉefurboj. **Kun la tabelo en la mano**, ili kune organizis la vetur-planon, por turismi en 6 el tiuj dek du urboj.



Jen estas la futbal-stadionoj de la ses urboj vizititaj de la paro Georgo-Rita

- Georgo preferis koni nur ilin, sed ne ĉiujn 12 stadionojn, pro tio, ke, laŭ li nur tiuj ses estas vere belaj laŭ arkitektura vidpunkto. Ĉu vi opinias same kiel li?



## La stadionoj de la aliaj urboj, kiujn ili ne vizitis, estas


- **Itakerano (en San-Paŭlo)**
- **Areno de la Dunoj (en Natalo)**
- **Areno Pantanalo (en Kuiabao)**
- **Areno Amazonio (en Manaŭso)**
- **Riverbordo (en Portoalegro)**
- **kaj Areno de la Ebenaĵo (en Kuritibo).**




- 15) Kiom da grandurboj la geamatoj eksciis, ke ili gastigos ludojn de la Monda FutbalPokalo?
- 16) Surbaze de kio ili preparis la vojaĝ-planon?
- 17) Pri kio estis la tabelo, kiun ili havis mane, por pretigi la vojaĝ-itineron?
- 18) Se en la unua fazo de la pokalo estis ok grupoj da teamoj kaj kvar teamoj en ĉiu grupo, kiom da partioj necesis, por ke ĉiu teamo ludu kontraŭ ĉiuj aliaj teamoj en ĉiu grupo? Kaj kiom da matĉoj okazis entute en la unua fazo, se konsideri la ok grupojn?
- 19) Kie okazis la unua ludo de la aludita turniro, kaj inter kiuj?
- 20) Ĉu vi spektis aŭ telespektis la lastan ludon, inter Germanio kaj Argentino? Kion vi opiniis pri la rendimentoj de ambaŭ skipoj?
- 21) Kiuj sin alfrontis en la partioj okazintaj en Braziljo?
- 22) Kiu teamo plej multe elpoentis (aŭ faris pli da goloj) en la tuta pokalo?
- 23) Kiu selektitaro havis la plej malbonan rendimenton kaj plej desapontis sian fanaron en ĉiuj matĉoj de la pridemandata sportkonkurso?
- 24) Kiu teamo plej multe elpoentis (aŭ plej multe enpafis aŭ enŝotis golojn) en la kvar-teama fina interbatalado?



## Jen estas la ses brazilaj urboj vizititaj de la paro Georgo-Rita:



BRAZILJO



RIO-DE-JANEIRO



BEL-HORIZONTO



RECIFO



FORTALEZO



SALVADORO


La ideo de Georgo estis **fotografi** ĉiujn arkitektajn detalojn de la 6 stadionoj, ĉar li intencis **projekti** komunan ununuran maketon pri ili, **presi ĝin** per 3D-presilo kaj **ekspozicii ĝin en sia urbo** en la fino de la futbala mondpokalo de 2014, **okazinta inter junio kaj julio. Rita celis interagi socie dum la veturspertoj.**

Lia deziro estis **foti** la konstruajn aspektojn de la 6 stadionoj, pro tio, ke li havis la ideon, **desegni** solan etmodelon kun miksitaj detaloj pri ili, **poste printi ĝin per printilo 3D kaj eksponi ĝin tie, kie li vivas**, fine de la futbala mondpokalo, **kiu okazis junio kaj julio. Rita intencis koni kelkajn sociajn aferojn.**


Lia volo estis **fari** **fotojn** de la **inĝenieriaj fasonoj** de la 6 stadionoj, ĉar li planis **ellabori** unusolan maketon kun diversaj detaloj pri ili, **poste presi ĝin per presilo 3D kaj fine fari ekspozicion de ĝi siaurbe** en la fermiĝo de la futbala mondpokalo, kiu havis lokon en la monatoj junio kaj julio. **Rita diris, ke ŝi preferos viziti kelkajn sociaĵojn.**

- 25) Kiun ideon havis Georgo rilate fotografion dum sia foresto de la loĝurbo, kie li vivas?  
26) Kion li volis fotografi?

- 27) Por kio li volis foti detalojn de la stadionoj?
- 28) Per kio li intencas konstrui maketon pri la stadionoj?
- 29) Ĉu vi povas kredi, ke post kvar ou kvin jaroj preskaŭ ĉiaj objektoj nuntempe mane konstruitaj povos esti konstruitaj per la freŝ-teknologiaj presiloj 3D?
- 30) Kiam Georgo volis inaŭguri la ekspozicion pri sia etmodelo, kiu estis 3D-prese konstruota?
- 31) Kiu internacia futbala evento havis lokon en Brazilo ĉi-jare?
- 32) Kion Rita profitis, por fari dum la vojaĝo kun la amato?
- 33) Ĉu vi opinias utile vojaĝi en periodo de ferioj, sed profiti ankaŭ la vojaĝon, por studi, esplori aŭ labori volontule? Kion vi pensas prie?
- 34) Kiam kaj kien vi veturis lastfoje je volontula servo?



**BRAZILJO**



**RIO-DE-JANEIRO**



**BEL-HORIZONTO**



**RECIFO**



**FORTALEZO**



**SALVADORO**


# BRAZILJO - BRAZILJO



**LA DU KANDANGOJ**



**PANORAMA VIDAJO**



**LA KATEDRALO**

**Unue ili veturis al la metropola urbo Braziljo, la ĉefurbo de Brazilo, kie okazis la inaŭgura matĉo de Brazilo kun Kroatio. Vespere, profitante la okazon, Georgo promenis tra la tuta nomata “pilota plano”, kiu estas la centra avenuaro de la urbo, kaj Rita aŭskultis paroladon pri Fengŝuo en dom-mastrina grupejo el la satelita urbo Tagvatingo.**

**Komence ili vizitis la metropolon Braziljo, kiu estas la ĉefurbo de Brazilo, kaj kiu okazigis la komencan partion inter Brazilo kaj Kroatio. Vespere, profitokaze, Georgo vizitis la tutan nomatan pilotan planon, kiu estas la nuklea strataro de la urbo, dum Rita ĉeestis prelegon pri Fengŝuo, en asocio de hejmmastrinoj, en la satelita urbo Tagvatingo.**

**En la komenco ili haltis en Braziljo, kiu estas la ĉefurbo de Brazilo. Tie okazis la premiera ludo inter Brazilo kaj Kroatio. Posttagmeze, profitante la oportunun, Georgo konis la tiel nomatan pilotan planon, kiu estas la centra parto de la urbo, sed Rita partoprenis en prelego pri Fengŝuo, okazinta al grupo el mastrumantinoj el la satelita urbo Tagvatingo.**

- 35) Kiun unuan grandurbon vizitis la geamatoj en siaj ferioj?
- 36) Kio Braziljo estas de Brazilo?
- 37) Kiuj matĉoj de la Pokalo de la Mondo havis lokon en tiu metropolo?
- 38) Kiu venkis tiun ludon?
- 39) Per kiom da poentoj (aŭ goloj) Brazilo superis la rivalon Kroation en la inaŭgura partio?
- 40) Kion Georgo, certe kiel urbanizisto, preferis viziti en la posttagmezo, en Braziljo?
- 41) Kion Rita, certe kiel dekoraciistino, preferis ĉeesti aparte?
- 42) En kiu satelita urbo (aŭ ĉirkaŭbrazilja urbo) ŝi partoprenis prelegon pri Fengŝuo?
- 43) Kie en Tagvatingo ŝi ĉeestis la prelegon?



# RIO-DE-JANEIRO - RIO-DE-JANEIRO



## MONTO SUKERPANO

En la sekvinta tago ili flugis al la rio-de-janejria ĉefurbo Rio-de-Janeiro, kie okazis la partioj inter Argentino kaj Bosnio-Hercegovino, Hispanio kaj Ĉilio, Belgio kaj Rusio, Kolombio kaj Urugvajo, Francio kaj Germanio kaj Germanio kaj Argentino. Vidinte la stadionon matene, vespere ili vizitis la monton Korkovadon kaj nokte ili gastis ĉe amiko de Rita, en la vasta komunumo Alemano, kie ili sambis ĝis noktomeze.

## KRISTO LA SAVINTO

En la posta tago ili veturis al Rio, ĉef-urbo de la ŝtato Rio-de-Janeiro. Tie okazis la matĉoj de Argentino kun Bosnio-Hercegovino, Hispanio kun Ĉilio, Belgio kun Rusio, Kolombio kun Urugvajo, Francio kun Germanio kaj Germanio kun Argentino. Vizitinte la stadionon en la mateno, en la vespero ili konis la monton Korkovadon, kaj fine ili noktis ĉe amiko de Rita, en la kvartalego Alemano, kie ili dancis sambon ĝis la noktomezo.

## BOTANIKA ĜARDENO

En la sekvanta tago ili vojaĝis al Rio-de-Janeiro, ĉefurbo de Rio-de-Janeiro, kie havis lokon la ludoj inter la argentina kaj la bosnio-hercegovina, la hispana kaj la ĉilia, la belga kaj la rusa, la kolombia kaj la urugvaja, la franca kaj la germana kaj la germana kaj la argentina selektitaroj. Fotinte Marakanaon matene, dum la vespero ili iris al la monto Korkovado. Fine ili tranoktis ĉe amiko de Rita, en la granda komunumo Alemano, kie ili partoprenis rondon pri sambo ĝis noktomeziĝis.

44) Kies Rio-de-Janeiro estas ĉefurbo?

45) Kiuj partioj prezentigis en la stadiono Marakanao?

- 46) Kio Marakanao estas en la mondo?
- 47) Fotografinte la tradicie plej grandan futbalstadionon el la mondo, kien iris nia konata paro posttagmeze?
- 48) Kio tre fama situas supre sur la monto Korkovado?
- 49) Kiu konstruigis kaj inaŭguris la Botanikan Ĝardenon el Rio-de-Ĵanejro, kaj en kiu jaro?
- 50) Kie Georgo kaj Rita noktis (aŭ tranoktis) tiam?
- 51) Kion ili faris, antaŭ ol endormiĝi, kaj ĝis kiam?
- 52) Kia kurioza, interesa kaj utila aera veturilo servas al la loĝantaro el la komunumo de la monto Alemano?

# RECIFO - PERNAMBUKO



PLAĜO BONA VOJAĜO



VIDAĴO DE LA KVARTALO SANKTA ANTONO



HALO SANKTA JOZEFO

Du tagojn poste ili estis en Recife, la ĉefurbo de la federacia ŝtato Pernambuko. Tie interbatalis la ebur-borda kun la japana, la itala kun la kostarika, la kroata kun la meksikia, la usona kun la germana kaj la kostarika kun la greka teamoj. Posttagmeze Georgo fotis la pontojn super la famaj urbaj riveroj Kapibaribo kaj Beberibo, dum Rita ĉeestis poezian rendezuon en la periferia kvartalo Braziljo-Tejmozo.

Post du tagoj ili alvenis en la pernambukan ĉefurbon Recifon, kie Ebur-bordo ludis kontraŭ Japanio, Italio batalis kontraŭ Kostariko, Kroatio alfrontis Meksikion, Usono ludis kun Germanio kaj Kostariko frontis kontraŭ Grekio. En la posttagmezo Georgo fotografis la pontojn de la multkonataj urbaj riveroj Kapibaribo kaj Beberibo, sed Rita partoprenis en poezia renkontiĝo en la suburbo Braziljo-Tejmozo.

Sekvis plia tago. Nun ili estis en Recife, ĉefurbo de la pernambuka ŝtato. Tie frontis unu la duan la elektitaroj de Ebur-bordo kaj Japanio, Italio kaj Kostariko, Kroatio kaj Meksikion, Usono kaj Germanio kaj Kostariko kaj Grekio. Post la tagmanĝo Georgo faris fotografiaĵojn de la pontoj super la famaj riveroj Kapibaribo kaj Beberibo, dum Rita ĉeestis en poezia evento en la antaŭurbo Braziljo-Tejmozo.

- 53) Kiam la gepromenantoj alvenis en Recifon?
- 54) Kies ĉefurbo estas Recife?
- 55) Kion Georgo fotis dum la posttagmezo, tie?
- 56) Kial li nepre volis fari tiajn registraĵojn?
- 57) Kiun promenon tiam Rita preferis fari?
- 58) Kial ŝi decidiĝis favore por vizito al poeziejo?
- 59) Kie okazis tiu poezia afero?
- 60) Kie en Recife situas la kvartalo Braziljo-Tejmozo?
- 61) Kiu estas la plej granda kvartalo en la ĉirkaŭaĵo (aŭ suburbo, aŭ antaŭurbo, aŭ periferio, aŭ ĉirkaŭurbo) de via loĝurbo?

# BEL-HORIZONTO – MINAS-ĜERAJSO



PREĜEJO DE PAMPULJO

PANORAMA VIDADO

PLACO DE LA LIBERECO

En la sekvinta mateno ili flugis al Bel-Horizonto, la ĉefurbo de la ŝtato Minas-Ĵerajso. Tie lude batalis Kolombio kun Grekio, Argentino kun Irano, Kostariko kun Anglio, Brazilo kun Ĉilio kaj Brazilo kun Germanio. Vespere, la paro vizitis la arkitektan monumentaron de Pampuljo kaj en la nokto ili amindumis en la Placo de la Libereco.

En la sekvanta mateno ili veturis al la minasa ĉefurbo Bel-Horizonto, kie la la kolombiaj, argentinaj, kostarikaj, brazilaj kaj brazilaj piedpilkludistoj ludis kontraŭ la grekaj, Iranaj, anglaj, ĉiliaj kaj germanaj ludantoj, respektive. Vespere la geamatoj promenis inter la arkitektaj konstruaĵoj de Pampuljo, kaj nokte ili brakumadis kaj kisadis unu la duan sur benko de la Placo de la Libereco.

En la posta mateno ili saltis en Bel-Horizonto, ĉefurbo de la ŝtato Minas-Ĵerajso, kie frontis unu la duan naŭ landoj, nome: Kolombio kun Grekio, Argentino kun Irano, Kostariko kun Anglio, Brazilo kun Ĉilio kaj Brazilo kun Germanio. Vespere, ili konis la arkitektajn monumentojn de Pampuljo, kaj post la noktiĝo ili karese amis unu la alian sur la Placo de la Libereco.

- 62) Al kiu ĉefurbo ili flugveturis en la sekvinta mateno?
- 63) En kiu regiono de Brazilo situas Minas-Ĵerajso (aŭ simple Minaso, kiel ĝi ankaŭ estas konata populare)?
- 64) Kies monumentojn ili vizitis vespere?
- 65) Kiuj partioj havis lokon en la stadiono Minejrano?
- 66) Kio okazis al la niĝeriaj ludistoj, tiel ke ili preskaŭ ne venis, por partopreni la pokalon? Ĉu vi legis pri ĉi en la gazetararo? Kio okazis al tiu sporta evento, se Niĝerio lasthore rezignus definitive partopreni ĝin?
- 67) Kion Georgo kaj Rita faris nokte sur la Placo de la Libereco?
- 68) Ĉu vi kutimas promeni trankvile ĉirkaŭ la placo proksima al la via domo, kiel iam? Ĉu vi kutime amindumas mano en mano, aŭ simple konversacias, sidante sur placa benko, ĝis malfrue en la nokto, sub la brilo de la steloj kaj inspirite de la kora varmo?






# FORTALEZO - CEARAO



PLACO FEHEJRO



PANORAMA VIDADO DE LA AVENUO AKVANAMBIO



PONTO DE LA ANGLOJ

**Noktomeze ili vojaĝis kun grupo da gajaj matĉospektontoj al Fortalezo, la ĉefurbo de la ŝtato Cearao. Tie okazis la partioj inter Urugvajo kaj Kostariko, Brazilo kaj Meksikio, Germanio kaj Ganao, Grekio kaj Eurbordo, Nederlando kaj Meksikio kaj Brazilo kaj Kolombio. Ili fintranoktis ĉe la gastigema esperantisto Vandembergo, amiko de Georgo. Matene ili tri plaĝumis ĉe la strando Iracema kaj poste ili tagmanĝis en la placo Fehejro.**

**Kiam venis la noktomezo, ili flugis kune kun aro da verdaj-flavaj partizanoj al la cearaa ĉefurbo Fortalezo, kie havis lokon la matĉoj de Urugvajo kontraŭ Kostariko, Brazilo kontraŭ Meksikio, Germanio kontraŭ Ganao, Grekio kontraŭ Eurbordo, Nederlando kontraŭ Meksikio kaj Brazilo kontraŭ Kolombio. Ili fin-noktis en la domo de la akceptema e-isto Vandembergo, amiko de Georgo. En la mateno ili baniĝis ĉe la plaĝo Iracema kaj poste ili tagmanĝis triope en la placo Fehejro.**

**En la noktomezo, meze inter multaj bruemaj fanoj de la brazila selektitaro, ili ekveturis cele al Fortalezo, la cearaa ĉefurbo, kiu gastigis la ludojn de Urugvajo kun Kostariko, Brazilo kun Meksikio, Germanio kun Ganao, Grekio kun Eurbordo, Nederlando kun Meksikio kaj Brazilo kun Kolombio. Ili restis la finon de la nokto ĉe la gastigema e-isto Vandembergo, amiko de Georgo. Matene ili tri iris al la plaĝo Iracema kaj poste ili bankedis en la placo Fehejro.**

- 69) Kune kun kiuj la ĉefpersonoj de niaj lecionaj historioj fluge vojaĝis al Fortalezo?
- 70) Kio karakterizas la brazilaj futbal-fanoj? Ĉu la brazila futbal-publiko ordinare konsistas el sobraj simpatiantoj de piedpilko, aŭ ĉu ĝi konsistas el fanatikaj bruemaj fanoj aŭ partizanoj? Kia estas vi en tiu kadro?
- 71) Ĉu vi kredas pri la tezo, ke la iama arta futbalo influe modifis tiel funde la animon de la popolo ĝis nuntempe, malgraŭ tio, ke nuntempe ne plu ekzistas arto en la futbalo, sed nur la eblaj daŭrantaj efikoj de tiuj magiaj tempoj en la nekonscio de la amantoj de la futbalarto?

- 72) Kiuj interbatalis en la futbal-scenejo Kastelano, en Fortalezo?
- 73) Kia estis la defendado de la brazila golulo Julio Cezaro en la matĉoj?
- 74) Kiel plaĉis al vi la taktikoj elpensitaj de la brazila trejnisto (aŭ gvidisto, aŭ taktikisto) Ludoviko Filipino Skolaro por la ludoj de siaj gviditoj?
- 75) Ĉe kiu la veturanta paro fin-noktis en Fortalezo?
- 76) Kien ili du, kune kun la nokta amfitriono (aŭ gastiginto), iris en la mateno?
- 77) Kaj tagmeze? Kie ili bankedis trioje?
- 78) Ĉu vi kutimas tagmanĝi for de via loĝejo, en restoracioj? Kiel plaĉas al vi la rapidservaj manĝejoj en la urbocentroj? Kie vi plej preferas manĝi? Ĉu en tradiciserva restoracio aŭ en memserva (aŭ laŭpeza) restoracio? Aŭ nur hejme?



HALO  
MODELO

## SALVADORO – BAHIO



PILORIO



PREĜEJO BONFINO

La lasta urbo vizitita de ili estis Salvadoro, la ĉefurbo de la ŝtato Bahio, kiu sidejgis la matĉojn de Hispanio kun Nederlando, Germanio kun Portugalio, Svisio kun Francio, Bosnio-Hercegovino kun Irano, Belgio kun Usono kaj Nederlando kun Kostariko. Tie la paro profitis, por promeni matene en Pilorio kaj por viziti en la posttagmezo la Preĝejon Bonfino. Nokte ili ĉeestis faman rondon pri kapoejro angolao, meze inter la palafitoj apud la duoninsula kvartalo Itapajipo.

La lasta urbo, kiun ili vizitis, estis Salvadoro, la bahia ĉefurbo, kiu gastigis la partiojn inter Hispanio kaj Nederlando, Germanio kaj Portugalio, Svisio kaj Francio, Bosnio-Hercegovino kaj Irano, Belgio kaj Usono kaj Nederlando kaj Kostariko. Ili profitis la okazon, por koni, antaŭtagmeze, la historian kvartalon Pilorio, kaj por viziti, posttagmeze, la Bazilikon Bonfino. En la nokto ili spektis konatan rondon pri kapoejro angolao, meze de la superakva loĝejo ĉe la duoninsulo Itapajipo.

La lasta urbo de ilia vizit-itinero estis Salvadoro, la ĉefurbo de la ŝtato Bahio, kie okazis la hispana-nederlanda, germana-portugala, svisa-franca, bosnio-hercegovina-irana, belga-usona kaj nederlanda-kostarika piedpilkuludoj. Profitokaze, en la mateno la paro promenis en la tradicia urboparto Pilorio, kaj posttagmeze ili vizitis la Preĝejon Bonfino. Kiam venis la nokto, ili vizitis tradicion rondon pri kapoejro angolao, meze en la surfosta domaro de Itapajipo.

79) Kiun ĉefurbon la libertempa paro vizitis laste en sia vojaĝ-itinero?

80) Kies Salvadoro estas ĉefurbo?

- 81) Ĝis kiu jaro Salvadoro funkciis kiel sidejo de la Ĝenerala Registaro de Brazilo antaŭ la Portugala Krono?
- 82) Kiom da ludistaroj sin prezentis en la stadiono Areno Fonto Nova?
- 83) Kiu nacia selektitaro plej efike batalis sur la gazono de la bahia futbal-scenejo?
- 84) Kiun urboparton Georgo kaj Rita vizitis en la antaŭtagmezo?
- 85) Ĉu povas esti, ke tagmeze ili gustumis pladojn el la tipe bahia kulinara arto, kiel ekzemple vatapao, karuro kaj efoo? Kiel plaĉas al vi tiaj manĝaĵoj?
- 86) Kion ili vizitis posttagmeze?
- 87) Ĉu povas esti, ke ili aŭ unu el ili supreniris surgenu la deklivon direkte al Bonfino, por plenumi eventualan promeson?
- 88) Ĉu ankaŭ vi jam faris promeson al iu sanktulo? Se jes, al kiu kaj por kio? Se ne, pro kio?
- 89) Kien ili iris en la nokto?
- 90) Ĉu vi ŝatas spekti rondon pri kapoejro? Kian stilon vi plej preferas rigardi? Ĉu angolaon (pli planke rampan) aŭ la regionalan (pli aere piedobatan)?
- 91) Ĉu vi scias, ke multaj bahianoj ludas kapoejron ne per la kruroj, sed per la parolo? Kiel tio estas ebla?



**Fine de ĉiuj itiner-vizitoj, ili revenis hejmen, fotografinte milojn da enurbaj vidindaĵoj, krom 6 el la stadionoj, kie la naciaj selektitaroj ludis en la Futbala Pokalo de la Mondo. Ili alvenis ankoraŭ ĝustatempe, por adiaŭi la onklon de Georgo, kiu forflugis plena de ĝojo pro la kelkatempa interago kun la familio, fin-dirinte al ĉiuj:**  
- Ĝis alia fojo!

**Fininte ĉiujn urbajn vizitojn, ili hejmenrevenis, farinte multegajn fotojn pri enurbaj mirindaĵoj, krom pri seso da stadionoj, kie sin alfrontis la 32 naciaj teamoj en la Monda Futbalkalo. Alveninte hejmen, ili ankoraŭ povis vidi kaj adiaŭi S-ron Fredon, kiu foriris plenĝoje, pro tio, ke li kunvivis kun sia familio dum kelka tempo. Adiaŭante, li diris:**  
“Ĝis la revido!”

**Kiam ili finvizitis ĉiujn urbojn laŭplane, ili revenis al sia loĝurbo, kun miloj da fotoj faritaj pri enurbaj belaĵoj, krom pri ses stadionoj, kie piedpilkludis la 32 nacioj en la Monda Turniro pri Futbalo. Kiam ili alvenis en la hejmon, ili ankoraŭ sukcesis brakumi kaj adiaŭi S-ron Fredon, kiu hejmenrevenis tre kontente pro la dumtempa restado kun sia familio. Ĉe la adiaŭo li parolis:**  
“Ĝis la venonta fojo!”

- 92) Kiom da fotoj la paro faris dum tiu plur-urba rapida ekskurso?
- 93) El ĉiuj nacioj ludintaj en la futbala Pokalo de la Mondo, kiuj el ili sukcesis atingi la duonfinalan fazon?
- 94) Kiuj du teamoj sin alfrontis en la finalo?
- 95) Kiu fine levis la pokalon de ĉampiono de la turniro?
- 96) Kion Georgo kaj Rita rapidis fari, apenaŭ ili alvenis hejmen post la vojaĝo?
- 97) Kia estis la onklo de Georgo ĉe la fino de sia gastado? Kial?



- 98) Kiomlonge (aŭ dum kiom da tempo) eble li gastis kun sia familio?
- 99) Kiam en la lasta fojo vi gastigis parencon ĉe vi? El kie li/ŝi venis?
- 100) Ĉu vi jam gastis en unu el la tutmonde konataj junulargastejoj dum viaj foraj vojaĝoj? Ĉu vi scias, ke per ili vi povas ankaŭ ŝpari multan monon, ĉar ili pagpostulas minimuman prezon por gastigi, konsiderante, ke ili apartenas al nemonprofita internacia organizo?
- 101) Se vi eventuale kongresos en Rio-de-Ĵanejro venontjare, ĉu vi plej preferos resti en hotelo, aŭ ĉu vi nepre volos kunresti en la nomata «komuna loĝejo» de la kongres-sidejo mem?
- 102) Ĉu vi estas gastigama (aŭ gastigema) homo?
- 103) Kiam vi lastfoje engastiĝis ĉe parenco aŭ amiko? Ĉu vi memoras? Kie tio okazis? Kiomlonge vi restis?
- 104) Ĉu vi intencas membri en tiu internacia programo Pasporta Servo, kiu zorgas pri intergastigado de esperantistoj?
- 105) Fine, ĉirkaŭbrakite kaj ĉirkaŭbrakinte, kion S-ro Fredo diris al la familio ĉe la adiaŭo?

## Nia propagando

### Esperanto – de ĉefurbo ĝis ĉiu lasta vilaĝo: unuafoja atuto

La oka tridek en sabata vespero. Salonpleno rigardas projekcian ekranon. Komenciĝas la kutima kaj konata raportaĵa programo en la ĉefa televida kanalo de Rumanio TVR1. Kiel kutime, la 20-minuta programo prezentas nur unu temon: en la 27a de septembro, la temo estis Esperanto. Tiu kanalo kaj programo estas spektata en ĉiu lasta vilaĝo de la lando; tiom ampleksa diskonigo per publika komunikilo estas unika kaj unuafoja en la historio de la rumana movado.

La tuto fontis el postsekvoj de la OSIEK-konferenco en Braŝovo julie, iel la produktista teamo mem elektis trakti tiun temon kaj kontaktis s-inon Rodica Todor, kiu donis pliajn kontaktojn; baldaŭ la ĵurnalisto ricevis buntan dosieron da faktoj, argumentoj, kontakt-personoj kaj svarmo da retej-adresoj. La filma kaj munta procezo daŭris ĉ. du semajnojn. Aldone al vivaj intervjuoj kun deko da rumanoj – la plej konataj el tiuj gimanzia profesoro Mihai Trifoi, la prezidanto de EAR, kaj Rodica Todor, prezidantino de IFEF. Plie okazis skajpaj intervjuoj kun s-roj Sean O’Riain el Irlando (pri la kostoj de interpretado en internaciaj forumoj) kaj Ionel Oneț el Nederlando (pri la lernfaciligaj kvalitoj de Esperanto).

La raporto estis profesinivele kunmetita (laŭ fakula prijuĝo), kovris rapide multajn terenojn kaj entiris amason da konvinka materialo el la reto: ĉina TV-raportado, klas-interŝanĝoj, la Eo-parolanta infaneto kaj multo pli. Ĝia tono estis esence pozitiva, emfazante la kulturajn valorojn, kiujn la lingvo malŝlosas. La juna prezentanto, Lucian Pirvoiu dum la intervjuoj ekaŭdis la lingvon kaj konstatis ĝian funkciadon, interalie inter anoj de la Braŝova klubo ‘Amikeco’. Kun iom da preparhelpo li fermis la prezentaĵon per du-tri frazoj en tute konvinka Esperanto. La raporto estis registrita, kaj estas rigardebla ĉe:

[http://stiri.tvr.ro/vorbiti-esperanto--intre-ciudatenie-lingvistica-si-sistem-international-de-comunicare\\_50604.html](http://stiri.tvr.ro/vorbiti-esperanto--intre-ciudatenie-lingvistica-si-sistem-international-de-comunicare_50604.html)

La elsendo estos ripetita plurfoje en frata sed pli specialigita kanalo: TVR-News.

Tiu salonpleno da spektantoj rigardintaj la raportaĵon estis kunvenintoj en Rascruci, apud Cluj-Napoca por la ĉiujara simpozio de la rumana Landa Asocio. Tuj post la elsendo koruso da poŝtelefonoj sonis, ĉirpis kaj blekis – alportantaj gratulojn al ĉiu koncerno. La bonetosa simpozio traktis multajn temojn; nelaste, kion oni faru por pli efike posttrakti la interesiĝon de intervjuo kiel tiu ĵus vidita.

## Kien malaperis la esperantistoj?

Se ni sumus partoprenantojn de ĉiuj internaciaj aranĝoj en Eŭropo ĉi-somere, ni ne atingus la ciferon de mil partoprenantoj...

Ne nur la Universala Kongreso ĉi-jare estis rekorde malgranda. Nur okdeko de esperantistoj el la tuta Eŭropo ekster Kroatio partoprenis la Eŭropan Esperanto-Kongreson en Rijeka, al la 10-a jubilea kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio aliĝis 146 aliĝintoj, inter kiuj 59 el Kroatio, sekve el aliaj 20 landoj aliĝis nur iom pli ol 80 esperantistoj. Estis granda seniluziigo...

Kaj aliaj aranĝoj en Eŭropo same ne imponas, diversaj naciaj kongresoj ankaŭ ne kreskas. Kien malaperis la esperantistoj?

En interesa artikolo Zlatko Tišljar pripensas la kialojn de la ŝrumpo kaj donas du proponojn por vigligi la movadon... Ĝi estas legebla en la reta bulteno Libera Folio ĉe: <http://www.liberafolio.org/2014/kien-malaperis-la-esperantistoj>



-----  
*Lingvo-Studio, L.S.*  
[www.eventoj.hu](http://www.eventoj.hu)

## Informaĵoj

Analiza novaĵletero de la grupo 'Keep Talking', kaj la Veromovado de Berkshire, Britio, por junio-julio 2014 (2014-07-30)

### \* Islamofobio kaj la falsita Troj-Ĉevala letero

La duan de marto, The Sunday Times publikigis novaĵon titolitan 'Islamistoj komplotas por transpreni lernejojn', kaj subtitolitan 'Likitaj paperoj malkaŝas laŭdiran planon celitan al lamantaj lernejoj por elpuŝi la estrojn kaj konverti klasojn al islamaj principoj' (<http://www.islamophobiawatch.co.uk/wp-content/uploads/Sunday-Times-Islamist-plot-article.png>). Tio baziĝis sur anonima letero laŭdire malkovrita, kiu skizis la planon, konatan kiel 'Operacio Troja Ĉevalo' (<http://www.islamophobiawatch.co.uk/wp-content/uploads/Trojan-Horse-document.pdf>). La naŭan de marto la Direktoro de Edukado de Birminham, Tahir Alam, kiu laŭdire estis malantaŭ la konspiro, eldonis publikan malkonfeson, atentigante faktajn malĝustaĵojn, kiuj malkaŝis, ke la dokumento estis ruzo (<http://www.islamophobiawatch.co.uk/wp-content/uploads/Refutation-of-Allegations-in>



[Trojan-Horse.pdf](#)). La 11an de marto The Times raportis, ke la letero estis falsita (<http://www.islamophobiawatch.co.uk/times-discovers-that-trojan-horse-letter-is-a-crude-forgery/>).

Tiu fakto ne malhelpis, ke estu furoro en la ĉefaj amaskomunikiloj pri islama radikaligo kaj terorismo en niaj lernejoj, kuraĝigita de kabineta edukministro Michael Gove. Ofsted – la organizaĵo por kontroli la kvaliton de lernejoj – reaprezis la lernejojn menciitajn, kaj metis ses lernejojn en Birmingham en kategorion 'specialaj rimedoj' (<http://www.telegraph.co.uk/education/educationnews/10776607/Islamist-plot-six-schools-face-Ofsted-special-measures.html>), eĉ kvankam kvin el ili antaŭe estis juĝitaj kiel bonaj aŭ bonegaj (<http://www.dailymail.co.uk/news/article-2652887/Five-Trojan-Horse-schools-placed-special-measures-combat-Islamic-fanatics-Ofsted-chief-warns-children-risk-radicalisation-extremism.html>). Michael Gove enoficigis eksan landan estron pri kontraŭ-terorismo ĉe la londona metropola polico, Peter Clarke, por gvidi la enkenton, por la Ministrejo de Edukado de Gove (<http://www.bbc.co.uk/news/uk-england-birmingham-27031941>). Klare, se estis implico de terorismo, tiu devus esti submetita al la Enlanda Ministro, Theresa May.

Theresa May asertas, ke ŝi avertis Michael Gove antaŭ kelkaj jaroj. "Ĉu estas la vero, ke la urba magistrato de Birmingham avertis pri tiuj akuzoj en 2008? Ĉu estas la vero, ke la Ministrejo por Edukado estis avertita en 2010? Se jes, kial neniu agis?", ŝi skribis en likita letero al Michael Gove (<http://www.independent.co.uk/news/uk/politics/michael-gove-and-teresa-may-go-to-war-over-alleged-islamic-extremist-plot-to-take-over-birmingham-schools-9485294.html>). La ombra eduka ministro, Tristram Hunt, akuzis Gove pri 'kruda neglektemo' (<http://www.independent.co.uk/news/education/education-news/gross-negligence-tristram-hunt-challenges-goves-handling-of-trojan-horse-schools-crisis-9503534.html>). Ankaŭ, ĉefinspektoro de Ofsted, Michael Wilshaw, dubigis pri la supervido de iuj lernejoj fare de la Ministrejo de Edukado de Michael Gove, rilate al la afero Troja Ĉevalo (<http://www.theguardian.com/politics/2014/jun/10/gove-michael-wilshaw-playground-spat>). La implico laŭ mi estas, ke Michael Gove permesis al iu relative malgranda kultura afero fermenti, tiel ke li povu poste eksplodigi la aferon kiel eventualan teror-minacon per falsita letero.

Eksa Konservativa ministro pri malliberejoj, Crispin Hunt, elparolis, akuzante Michael Gove, ke li propagandis Neokonajn ideojn (<http://www.theguardian.com/politics/2014/jun/04/michael-gove-national-security-council-neocon-ideas-theresa-may>). George Galloway, kiu reprezentas Okcidenta Bradford, forte islama regiono, raportis en sia programservio Sputnik en RT la 14an de junio, ke li ne povis trovi eĉ unu islamanon por elparoli pri la afero Troja Ĉevalo, pro sento de timigo, kaj de li antaŭeniris en raportado pri la afero en la ĉeesto de malplena seĝo (<http://rt.com/shows/sputnik/165716-al-qaeda-iraq-war/> - dua parto).

Estas en iuj sociaj retoj sento, ke Ofsted estas politikigata. En Januaro Michael Gove anoncis, ke li ne renovigos la kontrakton kun la prezidanto de Ofsted. Baronino Sally Morgan, kaj Sally Morgan diris, ke ŝia forigo estis parto de serio da eventoj, en kiuj ne-Konservativuloj en organizaĵoj kiaj Arta Konsilio kaj Bonfara Komisiono estis anstataŭigataj de lojalaj Konservativuloj (<http://www.independent.co.uk/news/education/education-news/exclusive-michael-gove-sacks-ofsted-chief-baroness-sally-morgan-9100273.html>). Eksplodis kabineta kverelo pri tio, kiam David Laws, la Liberal-Demokrata eksterkabineta eduk-ministro, diskonigis sian koleron kontraŭ Michael Gove, pri la maldungo de Baronino Morgan (<http://www.telegraph.co.uk/education/educationnews/10612696/Coalition-row-over-sacking-of-Ofsted-chief-Baroness-Morgan.html>). En marto, Policy Exchange publikigis raporton, kiu asertis, ke Ofsted "ne taŭgas por sia celo" (<http://www.policyexchange.org.uk/media-centre/in-the-news/category/item/ofsted-not-fit-for-purpose>). La 4an de julio The Independent raportis: "'Konflikto de interesoj': Elkrio pri plano enoficigi milionulan donacinton al la Konservativa Partio David Ross kiel estron de Ofsted" (<http://www.independent.co.uk/news/uk/politics/conflict-of-interest-outcry-at-plan-to-put-tory-donor-in-charge-of-ofsted-9585747.html>).

Ĉu do Policy Exchange, la pensokomisiono kiu falsigis kvitancojn de libroj, estas malantaŭkulise malantaŭ la Operacio Troja Ĉevalo kaj politikigo kaj misuzo de Ofsted por subteni la planojn Novkonservativajn?

\* Premo intensiĝas por maldungi Tony Blair kiel Mez-Orientan Pac-Reprezentanton

En aprilo ĉi-jare, Tony Blair, kiel la Speciala Reprezentanto en la Mez-Oriento de la Kvarteto de UN, laŭdire por alporti pacon al la regiono, prelegis ĉe la centra oficejo de Bloomberg en Londono (<http://www.bloomberg.com/video/tackling-radical-islam-needs-religious-focus-blair-UbeH6eo0SKyXrTz0~rvWew.html>). Foje por kompreni kion vere diras oratoro oni plej bone legu la tekston (<http://www.tonyblairoffice.org/news/entry/why-the-middle-east-matters-keynote-speech-by-tony-blair/>).

En tiu prelego, Tony Blair demonstiris sian kapablon, aŭ la kapablon de sia prelegverkisto, de lingva mensomanipulado. Ofte ne estis klare, ĝuste pri kiu li parolas; unu tekniko uzata por tio nomiĝas 'kaŝi sin malantaŭ la pasiva voĉo', sed estas ankaŭ aliaj teknikoj. Li diris ekzemple, "Ĉe la radiko de la krizo kuŝas

radikaligita kaj politikigita vidpunkto de Islamo, ideologio kiu distordas kaj fleksas la veran mesaĝon de Islamo". Pri kies vidpunkto do li parolas? Tio ja povus signifi la propran. Plua ekzemplo estas: "Plejparte, tre ofta sento estas, ke la regiono povus esti grava, sed estas neregebla kaj do neebla kaj do ni devus lasi ĝin prizorgi sin mem". Grava al kiu? Neregebla de kiu? La plej lastaj vortoj implicas, ke ĝi estas neregebla de ni, kaj ke ni devus lasi al ĝi regi sin mem. Sed al kiu li aludas, kiam li skribas "ni"? Li estas la supozata pac-reprezentanto, kiu reprezentas neniun flankon.

Ne estis eĉ unu vorto pri la suferado de la homoj de Gazao. La antisemitaj progromoj en Gazao daŭris plenforte, kaj oni devas scivoli, kiel la palestinanoj kaj la rusoj estis tiom longe akceptemaj pri Tony Blair en tiu rolo. Spirorabe, li asertis: "Israelo sukcese restis aparta de la ŝtormo ĉirkaŭ ĝi". Kaj tiel la parolado daŭris, kun parolo pri "unu tre klara kaj senambigua lukto: inter tiuj kun moderna vidpunkto de la Mez-Oriento, vidpunkto de pluralismaj socioj kaj malfermaj ekonomioj, kie la sintenoj kaj modeloj de tutteriĝo estas brakumataj; kaj aliflanke tiuj kiuj deziras trudi ideologion naskitan el ia kredo, ke ekzistas unu ĝusta religio kaj kun ĝusta vidpunkto pri ĝi, kaj ke tiu vidpunkto devus ekskluzive determini la esencon de la socio kaj de la politika ekonomio". Kiu estas kiu, en tiu klara kaj senambigua lukto? La Mez-Oriento estis iam pluralisma, kun ŝioj, sunioj, judoj kaj kristanoj loĝantaj flank-al-flanke, ĝis alvenis la Eŭropanoj kun sia ideo de unu ĝusta religio, kristanismo, kun escepto de Palestino, ke ĝi nun estas judismo.

Se oni nur aŭskultus lian prelegon, sen legi ĝin, oni povus facile esti lulita en pasivan senton de memcertiĝo, ke la Pac-Reprezentanto havas ĉion en ordo, kaj ke necesas al ni nur lasi lin gvidi nin en la bombadon de la tuta tereno por elfosi la ekstremismon. Estas la sama speco de retoriko uzata de lia plejŝatata pensokomisiono Demos, kiun ni en Keep Talking defiis, post kiam ili publikigis raporton asertantan, ke ili trovis korelacion inter 'konspirteoriaj grupoj' kaj terorismo, per aserto, ke ambaŭ estas 'ekstremistoj'. Tiu estas bela retoriko, sed ĝi ne estas tiom lerta kiel tiu de Winston Churchill; li povis dismeti tiujn duoblajn signifojn en ŝajne perfekte klara kaj senambigua lingvaĵo.

Tiu estis ege grava prelego, ĉar ĝi estis evidentege partieca, kun diroj kiaj, "Sed kio absolute necesas estas, ke ni unue liberigu nin de niaj propraj sintenoj. Ni devas preni flankojn", kaj "Tiu ne estas kaĉo en kiu ĉiu estas same malbona kiel ĉiuj aliaj. Alivorte, gravas, kaj estas unu flanko, kiun ni fieru subteni", kaj "Sed ni devas esti klaramensaj, kiun flankon ni prenas kaj kial ni prenas ĝin. Do kion tio signifas?"

Nu, tio signifas, ke multe da homoj nun diras la evidenton: ke Tony Blair ne devus esti pas-reprezentanto, kaj ke ili nun petskribas por lia forigo (<http://www.change.org/en-GB/petitions/ban-ki-moon-sack-tony-blair-as-the-middle-east-peace-envoy>). La petskribo estas adresita al Ban Ki-moon, Ĝenerala Sekretario de UN; Catherine Ashton, Alta Reprezentanto de EU pri Eksterlandaj Aferoj kaj Sekurec-Politiko, John Kerry, Eksterlanda Ministro usona; Sergej Lavrov, Eksterlanda ministro rusa, kaj ĝi diras simple: "Bonvolu forigi Tony Blair kiel la Reprezentanton de la Kvarteto kun tuja efiko".

Kvazaŭ por emfazi sian partiecon en la Mez-Oriento, Tony Blair la 14an de junio publikigis eseon, vokantan por milito kontraŭ Sirio, argumentante, ke la ribelo de ISIS estis planita kaj organizita en Sirio. "Por argumenti alie estas volema", li diris. Kompreneble ĝi estas! Kontraŭ la kritikon, ke estis neniu risko de amasdetruaj armiloj de Sadam, kaj ke la militkaŭzo de estis malĝusta, li skribis, nekredeble, "Kion ni nun scias pri Sirio estas, ke Asad, sen esti detektata de la Okcidento, fabrikadis ĥemiajn armilojn". La ulo provas la samon DENOVE!

Li liberigas sin kaj la Okcidenton de respondeco per: "La realo estas, ke la tuto de la Mez-Oriento kaj pretere trairas grandegan angoran kaj daŭran transiron. Ni devas liberigi nin de la nocio, ke 'ni' kaŭzis tion. Ni ne faris". Tiu estas la parto kiu gajnis publicon, kaj verŝajne instigis la petskribon.

En sia programero Sputnik, en la televidkanalo RT, George Galloway la 28an de junio intervjuis registaran ministron Crispin Blunt, kiu estis unu el la subskribintoj de la petskribo (<http://rt.com/shows/sputnik/169052-national-consensus-crystallizes-uk/>). Estis bone vidi kernan Konservativ-partian politikiston, kiu voĉdonis por la iraka milito en 2003, en konversacio kun malortodoksa maldekstrega frenezulo, kiel oni iam konsideris George Galloway, efektive interkonsenti pri io tiom kerne grava.

Plua subskribinto de tiu petskribo estis la komediulo Russell Brand. Lia ne estas mia speco de humuro, sed li ja pensigas al junuloj pri aferoj aktualaj, kaj same faras Max Keiser en sia pensiga Keiser Report [Raporto de Keiser], kiu dissendiĝas regule en RT. Tiu estas neverŝajna kombino, sed ĝi funkcis, kiam Russell Brand estis gasto en Keiser Report la 28an de junio, parolante pri revolucio (<http://rt.com/shows/keiser-report/168924-russell-brand-austerity-headlines/>). Mi ricevis komenton de iu, kiu kutime havas nenian ideon pri kio parolas Max Keiser, dirante, "Tiu estis interesa". Mi aparte ŝatis la diron de Max Keiser (post 26 minutoj), kiam li diris pri la angloj, "Se iu havas grandan sukceson, ŝajnas ke la publiko – la angloj – iel elmetas la manon kaj provas iomete retiri ilin". "Tio estas la anglaj amaskomunikiloj. La angloj estas en ordo", diris Russell Brand. Nu, tion

instigas misteruloj, kiuj parolas kiel MI6. Ĝuste tion mi rimarkis en 2003, kaj ĝi povas esti signo de regata opozicio.

Oni devas ankaŭ scivoli, kial tiuj kiuj volas jure akuzi Tony Blair pri militkrimoj parolas nur pri liaj miskredigoj pri Irako. The Daily Mail kriĉis per unuapaĝaj ĉeflinioj pri tiu afero dum pluraj jaroj, tamen restis silenta pri la nekongruaĵoj kiuj kondukis al la invado de Afganio en 2001. Tamen la mensogo de Tony Blair al la malsupra ĉambro de la parlamento, kiu kondukis nin en tiun militon, estis multe pli facile pruvebla ol liaj mensogoj pri la amasdetruaj armiloj en Irako. En sia parolado al la parlamento sekve de 9-11, li asertis, ke li havas pruvon, ke kulpis Osama bin Laden, kaj ke li deponos la pruvon en la Bibliotekon de la malsupra parlamenta ĉambro. Li ne faris. Surbaze de tio, li sukcesis subigi kritikon de tiu milito.

Kiel do povas esti, ke iuj el tiuj voĉoj kiuj kriĉas por la jura akuzo de Tony Blair pro militkrimoj rilate al Irako, ne nur silentas pri lia mensogo, kiu enigis nin en militon kun Afganio, sed malestimas tiujn kiuj pridemandas tiun mensogon, kaj pridemandas la oficialan rakonton, kiun ni volas kredi al ni rilate al 9-11?

La esenca diferenco laŭ mi estas, ke la parlamento voĉdonis por la milito en Irako, sed ke neniam estis voĉdono por militi kontraŭ Afganio. Pri Irako, parlamentanoj kaj la ĵurnalistoj bezonis senkulpigon, ke oni mensogis al ili. Mi certas, ke estas la vero, ke oni mensogis al ili, kaj ke Tony Blair devus esti juĝita pri militkrimoj, sed estas ankaŭ sendube la vero, ke multaj parlamentanoj kaj ĵurnalistoj konscie kuniris kun tiu mensogo. Ili bezonas kulpoportanton por senkulpigi sin de tio. En la kazo de Afganio, ili povas aserti, ke tio neniel rilatis al ili, ĉar ne estis voĉdono. Tio kompreneble estas falsa defendo, ĉar ili povus esti kontraŭintaj la invadon, atentigintaj al la publiko pri la mensogo de Tony Blair, kaj verŝajne malebligintaj, ke la brita registaro entiru Brition en tiun specifan militon, kiel faris pli posta parlamento rilate al Sirio. Eĉ se ili kredis la skizon de la oficiala rakonto, ili ankoraŭ havis respondecon prilumi la fakton, ke Tony Blair ne plenumis sian promeson, kaj por pridemandi, kio vere okazas. Sed ili ne faris.

Kio do faris la decion, ke Britio partoprenu en tiu invado de Afganio? La respondo estas, ke estis la ĉefministro sub 'Reĝa Prerogativo', kio signifas, ke Tony Blair kaj Reĝino Elizabeth la Dua decidis kune. Se oni ĝenerale kredus, ke Tony Blair mensogis, tio dubigus pri la honesteco de la reĝino. Neniu en la brita socio pridemandas la honestecon de la reĝino. Tion fari povus facile ĵeti Brition en konstitucian krizon.

#### **\* ISIS-krizo ebligas al Usono invadi Sirion, sed blokas Israelon en bombado de Irano**

La subita apero kaj spektaklaj militaj sukcesoj de ISIS, la Islama Ŝtato de Irako kaj Sirio, devas levi kelkajn demandojn, kiu vere estas ISIS, kaj kiuj povus esti iliaj financistoj. Miaj unuaj pensoj estis, ke la sola milita forto en la regiono kapabla pri tio estus Usono, kaj ke tiu povus esti plua Gladio-stila operacio, kaj mi supozas, ke multaj aliaj verŝajne venis al la samaj pensoj.

'Usono trejnigis ISIS ĉe sekreta jordana bazo' raportis Global Research la 17an de junio (<http://www.globalresearch.ca/u-s-trained-isis-at-secret-jordan-base/5387532>). SCG News afiŝis bonegan videon 'La falo de Irako – Kion oni ne diras al vi' (<http://scgnews.com/the-fall-of-iraq-what-youre-not-being-told>), kiu montras, kiel la tuta operacio estis antaŭplanita. La leviĝo de ISIS kaj en Sirio kaj en Irako povas provizi al Usono rimedon pravigi estontan milit-agadon en Sirio, kiel invadon aŭ bombadon, efektive malebligita de la manko de brita subteno, sekve de kontraŭa voĉdono en la parlamento.

Bizare, estis raportoj en la tradiciaj amaskomunikiloj, ke Irano helpas al Irako kontraŭbatali ISIS. 'Irananoj atakas jetaviadilojn por helpi al Irako kontraŭbatali Isis' raportis BBC la duan de julio (<http://www.bbc.co.uk/news/world-middle-east-28125687>). Tio metas Iranon kaj Usonon flank-al-flanke en Irako. Ĉu aŭ ne tiuj raportoj estas veraj, tio signifas, ke estus ege malfacile por Netanyahu bombi Iranon, kiel li volis fari. La demando de bombado de Irano estis disputpunkto inter Obama kaj Netanyahu-subtenata AIPAC en Usono, kiel mi raportis en mia antaŭa novaĵletero, kaj mi devas scivoli, ĉu tiuj raportoj reprezentas iom da lerta manovrado fare de la Obama-teamo en forteno de la Neokonoj. Israelo do reagis en la sola maniero konata al ĝi: per masakrado de la homoj de Gazao.

\* Ukrainio: MH17 "estas la nederlanda 9-11"

La mortigado daŭras en Ukrainio, plejparte neraportita de la Okcidentaj amaskomunikiloj. Jam en du monatoj mortis laŭdire 250 civitanoj, dum la bombado daŭras. La Okcidentaj tradiciaj amaskomunikiloj ankoraŭ kulpigas Putin pro la rezisto de la rus-parolantoj en Orienta Ukrainio al la Okcidente subtenata puĉo, kiu renversis la demokratie elektitan registaron en Kievo. Sed kian sencon havas por Kiev bombi la proprajn homojn, prefere ol eniri kun sia armeo, eble kun aviadila protekto, por subpremi la reziston? Se trupoj surgrunde tion ne povas fari, tiukaze bombado havos nenian strategian gravecon alie ol terorigi la populacion.

Aleksandr Nekrasov antaŭe estis konsilisto al Kremlo, kaj nun estas la plej racia voĉo en Londono rilate al orient-eŭropaj aferoj. En Cross Talk, programero de RT, en aprilo, kiam la temo estis 'Rusofobio', li diris, ke la nuna ukraina ofensivo ne havas sencon (<https://www.youtube.com/watch?v=2gYusnoalZQ>). Se la celo estas milita, tiukaze li ja povus pravi, do ni devas serĉi aliajn eventualajn celojn. Unu ebleco estas, ke Kievo provas provoki Rusion milite aktivi en Ukrainio. Se okazus tio, la Okcidentaj misgvidantoj havus nenian malfacilon eĉ pli demonigi Putin. Tio ebligus al Usono akcepti inviton de Kievo ensendi siajn armitajn fortojn por invadi Orientan Ukrainion.

La 17an de julio mi estis en Londono, organizanta kunvenon de la grupo Keep Talking, kiam mi aŭdis onidirojn pri flugmaŝino faligita super Orienta Ukrainio. Ekaŭskultante la novaĵon en la radiostacio BBC Radio 4 la postan matenon tuj estis al mi evidente, ke Okcidentaj gvidantoj kulpigos Putin. Ene de sekundoj ĝuste tion mi ekaŭdis, venanta de Obama. Tiaj akuzoj fare de politikaj gvidantoj tuj post tiaspeca evento, antaŭ ol estas tempo por establi ajnajn faktojn aliajn ol la komencaj raportoj, ĝenerale estas fordonajo de la vero pri fals-flaga terorismo; aŭ la gvidantoj fabrikas sian rakonton, aŭ ili havis antaŭscion aŭ internajn informojn. Se tiu informo venis de la spionservoj, ili estus zorge korelaciantaj ĝin kaj alirantaj la rilatajn instancojn. Se ili tuj aliras la amaskomunikilojn kun akuzoj, ke kulpis iliaj politikaj kontraŭuloj, tiukaze ili celas la gazetaron kaj la publikon per rakonto, kiun ili volas dismeti en la mondo antaŭ ol iu ajn havas tempon pensi por si mem. Ĵurnalistoj tiam abortas ajnan enketan esploradon, tuj kiam ili scias, kio estas la partia linio, kaj unuaj impresoj inter la publiko estas poste malfacile forigeblaj. Tio tuj ŝovas la probablon en la direkton de falsflaga atako.

Ni do venas al la demando: 'Cui bono?' – Al kiu la profito? Mi ne vidas, ke la Orientaj Ukrainiaj 'separatistoj' – la secesiistoj – vidus ajnan kialon faligi flugmaŝinon je alto de 10 000 metroj, dum bombado estus plenumata multe malpli alte. Ĉiukaze oni supozus, ke flugmaŝino je tiu alto plejverŝajne estus civila flugmaŝino. Mi ne vidas, ke Putin iel ajn gajnus, kaj ke li scius, ke li ĉiukaze ricevus la kulpigon. Sed se mia hipotezo pri la intenco estas ĝusta, pri la Kieva militagado en Orienta Ukrainio, tiukaze Kievo kaj Vaŝingtono entute profitus. La kreskigo de 'kontraŭ-teroraj' aktivecoj en la regiono povus nun simili al tiuj kiuj sekvis 9-11.

La intenco povus esti, por unuigi EU en sia subteno de la usona linio pri Ukrainio. Aleksandr Nekrasov atentigis, ke Germanio aparte ne deziras malbonajn rilatojn kun Rusio. Oleo trapasis Ukrainion al EU-landoj, kaj se Ukrainio ne povas pripagi la oleon, kiun ĝi konsumas, tiukaze Rusio plejverŝajne detranĉos ilian provizon. Se Ukrainio ŝtelus oleon de la transporttubo, tiukaze transporttuboj povus esti entute detranĉitaj. Ankaŭ Francio povus havi problemojn, ĉar ĝi provizas Rusion per milit-ekipaĵo, kaj malvolonte konformiĝos kun la usonaj sankcioj. Eksa analizisto de CIA, Ray McGovern, klarigis en posta numero de Cross Talk pri la divido inter Usono kaj EU (<http://rt.com/shows/crosstalk/171292-poroshenko-green-light-ukraine/>). Ankaŭ tiurilate la ratoj turnas sin unu kontraŭ la alian. Ray McGovern efektive diris, ke li vidas "multe da taglumo nun". Nun ke oni rekte defiis al Rusio, la rusoj estos pli elparolemaj pri tiu afero ol ili estis rilate al 9-11, kaj tio signifas, ke la tuta afero de NATO kaj falsflaga terorismo povus esti tirate en la lumon. Estas mensokapta debato.

Informoj kaj interpretoj pri tio nun envenas lavange. Intertempe, Nick Kollerstrom ĵus okupiĝis pri kompilado de ege interesa klarigo pri tio kio ĝis nun aperis, en sia retejo 'Terror on the Tube' [Teroro en la subtero], sub titolo 'Ukrainio: 777 kaj ŝtate fabrikata terororo' (<http://terroronthetube.co.uk/2014/07/19/ukraine-777-and-state-fabricated-terror/>). Unu interesa observajo estas, ke MH17 similis al flugmaŝino, kiu portis Prezidenton Putin reen de la pintokonferenco de BRICS, kaj kiu laŭdire sekvis similan vojon, kio sugestas, ke le intenco povus esti por celi Putin. Mi devas tamen scivoli pri la flugvojoj. Dum alvenis noktomezo, li retleteris al ni, por diri: "Is [vi estas] konfuzitaj, vi eble deziras relegi mian artikolon; mi ĝisdatigis ĝin tuttage – [mi] ĵus faris sesion kun Jim Fetzer. Certe estas miriga la maniero en kiu la rakonto evoluas – flugmaŝino 777, en tago 07-17, flugo 17". Jes ja; iuj mirigaj aferoj nun evidentiĝas, sed sekvu tion por vi mem; mi devas dissendi tiun ĉi novaĵletonon.

La 22an de julio Vica Defendministro Anatoly Antonov metis dek demandojn al Kievo (<http://rt.com/news/173976-mh17-crash-questions-ukraine>), sekvataj mallonge poste de de pluaj demandoj (<http://rt.com/news/174496-malaysia-crash-russia-questions>).

Ni devas demandi, kial Malaysian Airlines estis celita por la dua fojo ĉi-jare. Ankoraŭ ne estas solvita la mistero de MH370; certe ni devas demandi, ĉu ambaŭ incidentoj povus havi la saman fonton. Ĉu Kiev povus esti respondeca pri la malapero de MH370? Tio estus bizara; ĉio ŝajne montras al iliaj subtenantoj en Vaŝingtono. Do kion faris Malajzio por malkontentigi Vaŝingtono?

Nu, Malajzio estas la hejmo de 'The Kuala Lumpur Foundation to Criminalise War (KLFCW)' [La Fondaĵo por Krimigi Militon de Kuala Lumpur], neregistara organizaĵo starigita de iama malajzia ĉefministro Minister Mahathir Mohamed (<http://criminalisewar.org/>), kaj kiu en 2012 konviktis usonan prezidenton George W. Bush kaj antaŭan britan ĉefministron Tony Blair, pro "krimoj kontraŭ la paco" ([https://en.wikipedia.org/wiki/Kuala\\_Lumpur\\_War\\_Crimes\\_Commission](https://en.wikipedia.org/wiki/Kuala_Lumpur_War_Crimes_Commission) , <http://rt.com/news/court-bush-blair->



[iraq-043/](#)). La dekan de septembro, 2011, la irana Press TV raportis blogon de Mahathir Mohamed, en kiu li asertis "por iuj usonanoj, la morto de preskaŭ 3 000 homoj ne estis la plej timiga afero pri 9-11. Estis la konstato, kiu plenumis la atakon: jes, la usona registaro" (<http://www.presstv.ir/detail/198361.html>). In April he wrote that the West are the worst censors in the world (<http://english.astroawani.com/news/show/the-west-are-the-worst-censors-in-the-world-33515>).

La korespondanto en Nederlando de Channel 4 News, de kie venis multaj el la pasaĝeroj en MH17, diris, ke tiu estis "la nederlanda 9-11". Jes ja; iasence li pravis.

### \* 9-11 – Ĉu eblas trarompo en 2014?

'9-11-Vero en 2014: Ĉu eblas trarompo?' demandis la Novaĵ-Horo de Global Research en epizodo 59 la 24an de marto (<http://www.globalresearch.ca/911-truth-in-2014-is-a-breakthrough-possible/5374524>). La dua duono de la programo enhavis intervjuon kun Richard Gage, kiu nome de la grupo Arĥitektoj kaj Inĝenieroj por 9-11 faras prelegvojaĝon de 17 urboj en Kanado. Pri la 15-sekundaj reklamoj en ĉiu vagonara stacidomo en Toronto, li diris, "Tiu kreas belan kirladon".

Lia grupo produktis novan videon, "Anatomy of a Great Deception" [Anatomio de Granda Trompo], kiu haveblas en septembro, kaj kiun ili ofertas "je fenomenantaŭ-venda rabato kun garantio de frua livero antaŭ ol la DVD eĉ vendiĝos al la ĝenerala publiko!" (<http://www.ae911truth.org/en/news-section/41-articles/903-the-ultimate-red-pill-film-to-awaken-skeptical-family-a-friends-everywhere.html>). Ili invitas al vero-aktivistoj pensi kreeme pri distribuo de la video inter la publiko. Ilia ĉefpaĝo montras multe da progreso rezulte de iliaj aktivecoj en norda Ameriko. Ilia nuna kampanjo havas sian propran retejon (<http://rethink911.org/>).

En Londono, Britio, la teatraĵo 'Seven Seconds' [Sep Sekundoj] de Peter Neathey, ankoraŭ allogas aŭskultantarojn, kvankam malgrandajn, sed sufiĉe grandajn por ke li planu ankoraŭ pluan prezenton ĉe la teatro Et Cetera Theatre en Camden, por la 5a, 6a kaj 7a de septembro (<http://etceteratheatre.com>). Lia teatra grupo prezentos la teatraĵon ankaŭ ĉe lia tenisklubo, Elmwood Tennis Club, en norda Londono, la 10an kaj 11an de septembro (Holland Road, NW10 5AJ – telefonu al Peter per [+44 \(0\)7957 391534](tel:+44(0)7957391534)). La reklamfilmeto estas afiŝita en la Interreto en du partoj (<https://www.youtube.com/watch?v=b5JajR7aopQ> kaj <http://youtu.be/GwPJadLmAFU>).

Parto du de la reklamfilmeto temas pri psikologio, kaj mi komence preparis detalan priskribon de la reagoj de psikologoj pri 911-vero, sed tion forĵetis dum envenis pli kaj pli da hororaj novaĵoj, kiuj prenis precedencon. Tamen la unua parto de la supra radio-elsendo de Global Research prezentas bonegan paroladon fare de kondukta neŭrosciencisto Laurie Manwell, prenitan de la 'Toronto Hearings' [Ekzamensesioj en Toronto] de 2011, kaj ja valoras tion aŭskulti. Temas pri kiel homoj akiras falsajn kredojn, kaj de tio mi eksciis la mirigan fakton, ke vid-signaloj de la okuloj iras unue al la limba regiono de la cerbo – ne analiza regiono, sed emocia regiono. "Ne necesas, ke opinioj estu bazitaj sur faktoj . . .", ŝi diris. Se iu ajn sekvas la argumentojn de 911-Vero sed tutsimple ne povas kredi, ke tiaj aferoj eblas, tiukaze ili aŭskultu al tiu radioelsendo. Ankaŭ, se iu el miaj legantoj ĉeestis la jarkunvenon en 2006 de Esperanto-Asocio de Britio, ili bonvolu aŭskulti la paroladon de Laurie Manwell, ĉar en ĝi ŝi klarigas, kiel mia dumviva reputacio en tiu grupo estis simple inversita en unusola kunveno.

## Nova retpagxo

Leginte pri multaj antauxjugxoj (aux prijugxoj) pri Esperanto, aux pro videbla nescio, mi konstruis retpagxon por informi pri la valoro de Esperanto. Tiu retpagxo ekzistas en esperanta, angla, kaj hispana versioj.

20 Kialoj por lerni kaj uzi Esperanton:

<http://esperantofre.com/faktoj/kiale.htm>

Claude Piron verkis anekdoton pri li mem, pli la valoro de la uso de Esperanto. Li verkis cxi tiun rakonto pri lia vivo speciale por mi, la 5-an de januaro, 2006:

<http://esperantofre.com/book/index.htm#piron>

Li sendis al mi la originalon en la angla lingvo. Mi bezonis tion en 3 lingvoj. Cxu mi tradukus gxin al Esperanto kaj diri ke tio estis laboro de Claude Piron? ... Mi petis al Claude Piron, bonvolu traduki gxin al Esperanto. Li faris:

<http://esperantofre.com/book/booke.htm#piron>

---

Mi trovis kelkajn repagxojn kiuj rekte respondas al kelkaj el la menciitaj antauxjugxoj:

---

For / against Esperanto ? de Remush,  
Raymond Alexis Pierre GERARD  
En la angla, cxirkaux 250 eroj.  
In English, about 250 items.  
<http://remush.be/rebuttal>

---

Claude Piron  
<http://claudepiron.free.fr/>

Psikologiaj reagoj al Esperanto - Claude Piron (en Esperanto)  
<http://claudepiron.free.fr/articlesenesperanto/reagoj.htm>

Nefermitaj leteroj: france, angle, hispane:  
<http://claudepiron.free.fr/lettresouvertes.htm>

Articles, Artikoloj en Français, Esperanto, English, Nederlands, Italiano, Português, kaj multaj aliaj lingvoj:  
<http://claudepiron.free.fr/articles.htm>

Quelques questions et réponses  
<http://claudepiron.free.fr/lettresouvertes/questionsreponses.htm>

Ĉu la tuta mondo suferas pro afazio?  
<http://claudepiron.free.fr/articlesenesperanto/lingvoj2.htm>

Linguistic Communication - A Comparative Field Study  
<http://claudepiron.free.fr/articlesenanglais/communication.htm>

Some Comments on Ignorance About Esperanto by Claude PIRON  
<http://www.esperanto-sat.info/article607.html>

Réponses à certaines questions sur l'espéranto (libro)  
[http://books.google.com/books/about/R%C3%A9ponses\\_%C3%A0\\_certaines\\_questions\\_sur\\_l\\_e.html?id=bbLLXwAACAAJ](http://books.google.com/books/about/R%C3%A9ponses_%C3%A0_certaines_questions_sur_l_e.html?id=bbLLXwAACAAJ)

---

30 questions et réponses sur l'espéranto  
<http://esperanto-france.org/30-questions-reponses-sur-l-esperanto>  
<http://www.esperanto.qc.ca/fr/questions#Foire%20aux%20questions>

Questions et réponses - Esperanto 24  
<http://esperanto.24.free.fr/question.htm>

Bonnes questions - Mauvaises réponses  
<http://www.esperanto-sat.info/article205.html>

On a déjà l'anglais, pourquoi l'espéranto ?  
<http://vortareto.free.fr/argumentaire/pourquoi.htm>

Questions - réponses sur l'espéranto  
<http://vortareto.free.fr/argumentaire/citations.htm>

---

B – \_CONFRONTATION DE L'IMAGE ET DE LA RÉALITÉ\_  
<http://www.esperanto-sat.info/article642.html>

---

“Questions and Answers about Esperanto” by David T. Wolff

<http://www.esperanto-usa.org/posters/QA.pdf>

---

Thierry Salomon

<http://internacilingvo.ini.hu/>

<http://interpopolalingvo.inf.hu/>

#### \* Britaj islamofobiaj pensokomisionoj financataj de Likud-Novkonservativuloj

Tiaj miskredigoj pensigas pri miskredigoj fare de la ĉefa pensokomisiono de la Konservativa Partio, Policy Exchange, pri terorista literaturo en britaj moskeoj, kaj ligoj inter terorismo kaj multkulturismo, pri kiu mi skribis en antaŭaj novaĵletero. En mia junio-julia novaĵletero ĉijare mi demandis pri la fonto de financado por Policy Exchange. Nun mi ĵus trovis detalan raporton de SpinWatch [Propagando-Gardo], eldonitan en septembro 2011, titolitan 'The Cold War on British Muslims: An examination of Policy Exchange and the Centre for Social Cohesion' [La Malvarma Milito kontraŭ britaj islamanoj: ekzameno de 'Policy Exchange' kaj la 'Centre for Social Cohesion'] ([http://www.SpinWatch.org/images/SpinWatchReport\\_ColdWar.pdf](http://www.SpinWatch.org/images/SpinWatchReport_ColdWar.pdf)). Tiu enhavas amason da informoj pri la aktivecoj de tiuj du pensokomisionoj, kaj pri ties financado. Klare evidentiĝas signifaj sponsoroj ligitaj al la kampanjo de nuntempa cionismo aŭ la israela ŝtato.

Ili konkludas: "Tiu ĉi raporto priskribis, kiel du el la plej influhavaj dekstraj pensokomisionoj en Britio uzis la timon de terorismo kaj de islamo por antaŭenigi aŭtoritatan politikan planon. Iliajn penojn oni komprenu kiel reagon al al reviviĝo de progresemaj politikaj movadoj, kiuj defiis al la militismo de Usono, Britio kaj Israelo, keil ankaŭ al la modelo de tutteriĝo, kiun ĉampionis tiuj ŝtatoj. Financataj de bonhavaj komercistoj kaj financistoj, kaj konservativaj kaj por-israelaj fondusoj kaj fondoĵoj, tiuj britaj novkonservativuloj estas inspiritaj de operacioj kontraŭ pac-aktivistoj kaj sindikatistoj dum la Malvarma Milito, kaj eksplicite strebas revivigi tiun tradicion de politika kontraŭ-subfosado. Iliaj modernaj celoj estas la politike enplektitaj islamanoj, liberaloj kaj maldekstruloj, kiel ankaŭ liberalaj institucioj kiaj lernejoj, universitatoj kaj publikaj bibliotekoj".

Mi opinias, ke tiu ĉi raporto devas esti unu el la plej signifaj raportoj pri la brita politiko en nia epoko, ĉar ĝi prilumas, kiu efektive akaparis la britan politikon.

#### \* Kiu regas ISIS?

La komento pri man-elmeto de Obama al Irano kontraŭ la deziroj de Israelo eble ĵetas iom da lumo sur la bizaran situacion rilate al ISIS (antaŭe konata kiel ISIL, kaj nun pli kaj pli konata kiel IS). Mi prilumis en mia novaĵletero de junio-julio la bizaran kuniĝon de Usono kaj Irano en kontraŭado de ISIS. Multo en mia novaĵletero atentigis pri ŝajna diplomacia interna milito inter la tradicia Anglo-Usona Establaĵo kaj ekstremista Neokonservativa-Lukuda frakcio, kiu ŝajnis transpreni la potencon. La kontrastaj sintenoj de Obama kaj Netanyahu tion ilustras. Intertempe la situacio fariĝis eĉ pli bizara, dum diversaj karakteroj de la Brita Establaĵo elparolis pri la neceso enplektiĝi kun Prezidento Assad de Sirio en kontraŭbatalado de ISIS. Tiuj inkluzivas Sir Malcolm Rifkind – kunvenestro de la parlamenta komitato pri spioninformoj kaj sekureco – Richard Dannatt, antaŭa estro de la brita armeo, kaj diversaj naciaj ĵurnalistoj. La ironion de tio emfazis bonega analizo, kiu aperis en Global Research, titolita 'Media Disinformation: The Islamic State (ISIS), Syria's President Bashar Al Assad and the Bombing of Iraq' [Amaskomunikila falsa informado: La Islama Ŝtato (ISIS), Prezidento Assad de Sirio kaj la bombado de Irako] (<http://www.globalresearch.ca/media-disinformation-damascene-conversions-isis-assad-and-the-bombing-of-iraq/5398901>). Mi supozas, ke Obama strebas al du aferoj en kontraŭbatalado de ISIS: enirvojon en Sirion per la malantaŭa pordo, kaj honorkonservan eliron el sia embaraso pro la nesukceso forigi Assad. Per paciĝo kun Assad, li povas limigi la agreson de Likud-Novkonservativuloj en la Meza Oriento.

Kiu do regas ISIS? Potenca armilo, pri kiu neniu antaŭe aŭdis, ekaperas kaj rapidege supervenkas grandajn teritoriojn en du landoj, montrante potencajn kaj altkapablajn armilojn kaj celtrafajn propagandajn rimedojn. Ĝi tiam daŭrigas, publikigante intence provokajn filmetojn de senkapigoj. Tiam oni aŭdas, ke ili estis financataj per bankoraboj, kaj ke ili faras tion por provoki la Okcidentajn potencojn. Kiom el tio havas sencon? Kiom da mono tenas bankoj nuntempe? Oni diras, ke 97% de la mono en la ekonomio estas nur cifereca mono. Ĉu ili skuas la bankajn komputilojn, tiel ke elfalas ĉiuj ciferoj en iliajn ŝtelaĵ-sakojn? Kompreneble, ili povus rabi bankojn en la teritorioj kiujn ili regas, kiel povas fari iu ajn registaro, sed kial ili dezirus? Ili simple uzus la bankojn.

Ĉu havas sencon, ke la pli malforta partio provokus la pli fortan, tiel ke ili risku esti disbombataj? Aŭ ĉu havas pli da senco pensi, ke ili eble estas la pli forta partio, financata de iu centra banko kiu havas la potencon krei monon, kaj ke ili eble strebas provizi pretekston por plua invado, konforme kun la raporto 'Clean Break' [Rekta rompo] de 1996, komisiita de Binyamin Netanyahu kaj verkita de usonaj Novkonservativuloj ([https://en.wikipedia.org/wiki/A\\_Clean\\_Break:\\_A\\_New\\_Strategy\\_for\\_Securing\\_the\\_Realm](https://en.wikipedia.org/wiki/A_Clean_Break:_A_New_Strategy_for_Securing_the_Realm))?

Tony Cartalucci, verkante en Global Research, skeptikas pri la asertoj de bank-rabado. Li sekvas la 'usonon kaŝan

reinvasion de Irako [sub titolo: America's Covert Re-Invasion of Iraq], kaj atentigas: "Se flugaparatoj kaj laborantoj de CIA kiuj aktivis en la teritorio de ISIS ne sufiĉis por detekti la tujan invadon, eble CIA devus esti simple preninta gazeton en la manojn" (<http://landdestroyer.blogspot.ca/2014/06/americas-covert-re-invasion-of-iraq.html>).

Estis raportoj en la Mez-Oriento, ke la estro de ISIS, Abu Bakr al-Baghdadi, estas Mossad-trejnita agento, kies vera nomo estas Simon Elliott, kaj ke tiu informo venis de NSA-dokumentoj malkaŝitaj de Edward Snowden (<http://www.veteranstopday.com/2014/08/04/french-report-isis-leader-mossad/>). Mi ne sukcesis spuri la dokumentojn, sed al la ideo donis kredindecon la periodaĵo The News Statesman, kiu metis tiun ideon en la saman kategorion kiel aliajn 'konspiriteoriojn', kiel la ideon, ke 9-11 ne estis plenumita de arabaj membroj de Alkaido, aŭ ke Osama bin Laden ne estis mortigita de usonaj special-trupoj de SEAL sur pakistana tereno la dan de majo 2011 (<http://www.newstatesman.com/politics/2014/09/inside-jobs-and-israeli-stooges-why-muslim-world-thrall-conspiracy-theories>). Gordon Duff, en la irana televidkanalo Press TV, skizis la "malhelan tagordon", dirante, ke ISIS sekvas modelon establitan de la usonaj 'neokonaj' [novkonservativaj] ekstremistoj post 9-11. "Ili batalas kontraŭ la malamikojn de Israelo", li diris (<http://www.veteranstopday.com/2014/07/26/isis-follows-israelicia-agenda-video/>).

Verkante en Veterans Today [Veteranoj Hodiaŭ], John Kimber sugestas, "ISIS estas Alkaido 2.0 de CIA" (<http://www.veteranstopday.com/2014/09/07/isis-signals-nuclear-terrorism-predicting-911-dirty-bomb-false-flag-attack>). Li titolis sian artikolon, "ISIS signalas nuklean terorismen, prognozante 911-stilan falsflagan atakon per malpura bombo", kaj li donas siajn plej altajn dek kialojn por tion prognozi, kaj tiel por helpi malvenki novan falsflagan atakon. Ĉu aŭ ne tio okazos la 11an de septembro [hodiaŭ jam!], kiel li prognozis, la rezonado kaj kompilado de faktoj estas interesaj. Li inkluzivas filmeton de parolado de David Cameron, en kiu li elŝutas la kutimajn aferojn de Policy Exchange, kaj anoncas pliigon de la minacnivelo kaj pluajn registarajn rimedojn. Tiu parolado pensigas min pri tiu farita de Papo Urbano la Dua en 1095 ĉe la Konsilio de Clermond, kiu iniciatis la Unuan Krucmiliton ([https://en.wikipedia.org/wiki/Council\\_of\\_Clermont](https://en.wikipedia.org/wiki/Council_of_Clermont)). Post 1019 jaroj funkcias ankoraŭ la samaj teknikoj.

Vaste disvastiĝis raporto en Der Spiegel, ke ISIS-teroristoj estis trejnitaj de Usono (<http://www.wnd.com/2014/06/officials-u-s-trained-isis-at-secret-base-in-jordan/>), kvankam mi ne povis trovi ajnan ligan al la origina artikolo. Politika analizisto Michel Chossudovsky de Global Research asertas, ke ISIS estas kreaĵo de Usono, kaj citas kiel pruvojn la kapitulacion de Mosul: "Estis laŭraporte en Mosul ĉirkaŭ 30 000 registaraj armeanoj kontraste kun 1 000 da ISIS-ribejoj. La iraka armeo decidis ne interveni. La amaskomunikilaj raportoj klarigis, sen pruvo, ke la decido de la irakaj armeaj fortoj ne interveni estis spontana, karakterizita de amasaj transir-dizertoj". Li plue citas el The Guardian: "Irakaj oficialuloj diris al The Guardian, ke du divizioj da irakaj soldatoj – ĉirkaŭ 30 000 viroj – simple turniĝis kaj kuris alfrontitaj de atakoj de nur 800 batalantoj. Ekstremistoj de ISIS libere ĉirkaŭvagis la stratojn merkredon, tra la stratojn de Mosul, malkaŝe surprizitaj pri la facile per kiu ili prenis la due plej grandan urbegon de Irako, post tri tagoj da sporada batalado". Tio sonas ĝuste kiel Operacio Gladio, amasskale.

\* Ĉu usona milita interveno en Sirio ebligas al Putin interveni en Ukrainio?

Tony Cartalucci provizis serion da analizoj pri Sirio (<http://landdestroyer.blogspot.co.uk/search/label/Syria>). En artikolo titolita "America's Creeping Into Syria Will Hang Itself in Ukraine" [Per ŝtelega eniro en Sirion, Usono sin pendumos en Ukrainio], li atentigas: "Per plenumo de politika strategio 'senkonsidere de landlimoj', Usono ĵus politike pendumis sin en siaj streboj protekti la nov-instalitan reĝimon en Kievo, Ukrainio, kaj malebligi al Rusio interveni kontraŭ laŭvorte batalionoj da Nov-Naziĵaj militemuloj, kiuj operacias laŭ la rusa landlimo kun Ukrainio. Menciis la neceson 'protekti la rusan popolon' resonas pli klare rilate al la laŭrajtaj zorgoj, konsiderante la proksimecon de Ukrainio al rusa teritorio, ol la asertoj de Usono, ke regiono aliflanke de la planedo, kie unu el ties civitanoj voleme decidis endanĝerigi sin per raportado pri daŭra armita konflikto, iel necesigas rektan usonan militan intervenon" (<http://landdestroyer.blogspot.co.uk/2014/08/americas-creeping-into-syria-will-hang.html>).

La demandon, ĉu Putin devus enmarŝi en Orientan Ukrainion mi diskutis kun iuj el miaj rusaj amikoj en Esperanto-lingva retroŝta politika grupo komence de la Ukraina Enlanda Milito. Mi opiniis, ke invado povus ekkauzi pli vastan konflikton, kiu enplektus Usonon kaj Rusion, kaj ke multe pli da homoj mortus ol estus savitaj. Sed nun mi vidas artikolon eĉ de la aŭtoritato de d-ro Paul Craig Roberts, kiu estis Vic-Sekretario pri ekonomiaj aferoj por la usona ministrejo de financo en la reĝimo de Reagan, kaj estas la aŭtoro de multaj libroj, el kiuj la plej lasta estas 'How America Was Lost: From 9/11 to the Police/Warfare State' [Kiel Usono perdiĝis: de 9-11 ĝis la polica/militfara ŝtato]. Li skribis: "La krizo estus malebligita se la rusa registaro estus akceptinta la peton de la provinco esti reunuiginta kun Rusio, kiel en la kazo de Krimeo. Tamen tal rusa registaro decidis eviti ajnan decidon, ke Vaŝingtono povus tion misrepresenti kiel 'invadon kaj aneksadon', pensante, ke Eŭropo vidus la senprovokan konduton de Rusio kiel fidodonan kaj rezisti la premon de Vaŝingtono eniri konflikton kun Rusio. Miaopinio, la rusa registaro supertaksis la potencon de la diplomateco en la Okcidento. Vaŝingtono interesiĝas pri



la kuraĝigo de krizoj, ne en ilia solvado" (<http://www.foreignpolicyjournal.com/2014/08/21/the-ukraine-crisis-continues/>).

Li skribis, ke la akcepto fare de la rusa registaro de la buĉado igas Rusion aspekti malforta, kaj kuraĝigas pli da agresemo kontraŭ Rusio. "Se la rusa registaro intencas solvi siajn problemojn en Ukrainio kaj antaŭeviti la kapablon de Vaŝingtono plue erodi la politikan kaj ekonomian rilaton kun Eŭropo per pli da sankcioj, la rusa registaro devos turni sin al pli perfortaj rimedoj", li skribis, sugestante, ke ili eble devus doni ultimaton al EU-gvidantoj, por ke ili forrompu sin de sia subteno de Vaŝingtono.

La ukraina Prezidento Poroŝenko diris al eksterlandaj ministroj de EU antaŭ nelonge, ke lia lando "estas proksime al la punkto de nereveno – plenskala milito" (<http://www.bbc.co.uk/news/world-europe-28997946>). Kvankam klare tio elmetas la komencan negocan pozicion, tia implica minaco estas ege danĝera. Laŭ nia scio, povus esti spickapuloj en Vaŝingtono kaj Londono, kiuj efektive deziras mondmiliton, kiel estis en Londono antaŭ cent jaroj. Parolo pri aliĝo de Ukrainio al NATO povus eĉ provoki anticipan frapon fare de Rusio, ĉar tuj kiam Ukrainio aliĝos al NATO ajna interveno fare de Rusio, ĉu vera, ĉu imagita, povus enigi la tuton de NATO en militon kontraŭ Rusio.

### \* Ŝoko pri Gazao: silento pri Ukrainio

La ukraina enlanda milito kaj la bombado de Gazao havas ion komunan. Kiam mi ekaŭskultas RT (la televidkanalo Rusio Hodiaŭ, kiu nun translokiĝis la kanalo 135 de Freeview en Britio), mi often ne povas tuj scii, ĉu mi rigardas al Gazao aŭ Orienta Ukrainio. La furiozo de militado estas same ruiniga en ambaŭ landoj. La ĉefaj diferencoj estas en la haŭtkoloro, lingvo kaj religio. La angoro sur la vizaĝoj de tiuj kiuj perdis amatojn estas sama, sed inter la aliaj estas videbla diferenco: la palestinanoj aspektas harditaj, dum la ukrainanoj aspektas mistifikitaj, dirante, "Kiu supozus, ke tia afero povus okazi ĉi tie?". Ĉi tie en Britio estas simila sento, en tio ke la homoj malrapide fariĝas akceptemaj pri la orvela propagando. Kiu estus pensinta, ke tia nazi-stila propagando povus venadi de la registaro, ĉi tie en Britio, la koro de la demokratio? Krom Orwell, kompreneble.

Estas tamen plua ligo: la subigo de la flugmaŝino Malaysian Airlines MH17 okazis la 17an de julio, samtage kiam Israelo ekbombadis Gazaon. Dum iom da tempo MH17 kroĉas la ĉefliniojn, donante al Israelo okazon sekvi siajn celojn en Gazao preskaŭ nerimarkite de la monda gazetaro. Sed poste, dum oni metis demandojn pri tio, kio vere okazis al MH17, la ĉefflumo moviĝis al Gazao, kaj la sorto de Ukrainio foriris de la ĉeflinioj. Apud mia letero en The Newbury Weekly News estis bonega letero, titolita 'Another appalling situation' [Alia ŝoka situacio] de Roy Tubb, iama urbestro de Thatcham, kiun mi konis depost mi aliĝis al la Esperanto-Grupo de Reading kiel studento en 1964. Ĝi tekstis:

"Dum nia loka parlamentano Richard Benyon meritas laŭdon, ke li vokis la kunvenon pri la eventoj en Gazao, alia egale ŝoka situacio en Ukrainio estis plejparte ignorita de la britaj amaskomunikiloj (ĝis la pasinta semajno).

"Ni estis inunditaj de la naciaj amaskomunikiloj per detaloj kaj bildoj de la terurigaj eventoj en Gazao, kaj nun Irako, sed kial neniuj similaj detaloj de Ukrainio? Laŭ fidintaj taksoj, almenaŭ 1 500 estis mortigitaj, kaj pli ol 3 500 vunditaj en Orienta Ukrainio depost aprilo, inkluzive de virinoj kaj infanoj. La ukraina armeo uzis nedirektitajn raketojn kontraŭ civilulajn regionojn de Donetsk, kiu nun havas nenian akvon aŭ elektron. Ĉirkaŭ kvarono de ties unumiliona populacio estas formovita. Nia reago? Trudu pli da sankcioj al Rusio!

"Krimeo estis kontraŭleĝe donita al Ukrainio fare de Ĥruŝĉev en 1954, antaŭ ĝuste 60 jaroj. Alfrontite de la plenumaĵo de Ĥruŝĉov, la sovetia registaro konsentis al transigo de la lando – laŭ kondiĉo de referendumo okazigota en Krimeo.

"Neniu oficiala referendumo okazis en Krimeo ĝis ĉi-jare, kaj tiu malkaŝis, ke la plimulto deziris realiĝi al Rusio. Tio ne estis surpriza, ĉar ĉirkaŭ 60% de sia populacio estas rus[parolant]a. Nia registaro faris grandan furoron pri la detaletoj de la krimea referendumo kaj poste vokis por sankcioj kontraŭ Rusio.

"La plimulto de la eŭropaj landoj malvole sekvis, kaj la rezulto de tio preskaŭ certe ĥaosigos iliajn jam malfortigitajn ekonomiojn, ĉar Rusio jam reagis per antaŭvideblaj reciprokaĵoj. La hungara ĉefministro aludis al la sankcioj kontraŭ Rusio kiel "pafi sin en la piedo". Venis protestoj ankaŭ de Ĉeĥio, Solvakio, Aŭstrio kaj Finnlando.

"Certe jam tempo estas, ke ni diru al la ukraina registaro, ke ili ĉesu mortigi la proprajn civitanojn, kaj ke ili parol al la 'separatistoj', alie ĝi ne ricevus eĉ unu pencon pli da nia mono".

### \* Duobla parolo de NATO riskas MondoMiliton 3

Ekxa analizisto de CIA, Ray McGovern, estis intervjuita de Afshin Rattani en la tago antaŭ la pintokonferenco de NATO en Newport, Kimrio, en 'Going Underground' [Iri subteren] de RT (<http://rt.com/shows/going-underground/184676-nato-drone-education-system/> - second half, from 21:41). Demandite, kion li opinias, ke CIA nun konsilus al la Prezidento, li diris, "En la malnovaj tagoj ni dirus al la Prezidento la veron". Li iom detaligis pri la rolo de NATO post la Malvarma Milito, dirante, "Ni perfidis grandskale pri la interkonsento kun Gorbaĉov". Gorbaĉov siaparte eliris ĉiujn 25 000 trupojn el Orienta Germanio. Rilate al la nuna Ĝenerala Sekretario de NATO, Anders Fogh Rasmussen, li diris, "Liajn paroladojn oni verkas en Vaŝingtono".

La rezulto de la NATO-pintokonferenco estis anonci novan rapid-reagan forton 'Spearhead' [lancpinto] "por doni fidon al orientaj membroj maltrankviligitaj de la agoj de Rusio en Ukrainio" (<http://www.bbc.co.uk/news/world-europe-29086180>). Laŭ RT, "La baltaj ŝtatoj estis inter la plej voĉemaj rekomendantoj de la plifortigo de NATO en la regiono, sed la organizaĵo estas limigita per interkonsento de 1997 kun Rusio, kiu malpermesas, ke ĝi metu konstantajn bazojn en Litovion, Latvion aŭ Estonion. Tion ili povas ĉirkaŭiri per okazigo de konstantaj rotacioj de 'ekzercoj', kiuj povas en la praktiko esti ekvivalentaj al la sama afero" (<http://www.rt.com/news/185444-nato-rasmussen-spearhead-force>). La 6an de septembro RT raportis, "NATO okazigas amasajn milit-ekzercojn en Latvio" (<http://www.rt.com/news/185692-nato-military-drills>).

Tony Gosling, en intervjuo en RT, atentigis: "Iu ajn militserva persono sciis, ke 'spearhead force' [lancopinta forto] estas atak-forto. NATO ŝanĝis sin de defenda organizaĵo – almenaŭ tiel ĝi estis starigita post la Dua Mond-Milito – al ofensiva organizaĵo. Kaj cetere ni vidas la kreon, malrapide, de armeo de NATO. Nun, tio vere maltrankviligas min, ĉar NATO ne estas demokratia organizaĵo. Kiel tio estos organizita? Ĉu ĉiu individua parlamento devos esti petita ĉiufoje kiam NATO deziras ion fari? Okazas, ke ni havas kion supozeble oni povus nomo 'misio-vastiĝo' – ke NATO ekfaras la decidojn. Ordinara politikistoj kaj demokratie elektitaj reprezentantoj – tiu decidoj fordrivas for de ili. Kaj do ni vere havas danĝeran forton, kiu ĉi tie kreskas, kiu estas dezajnita por postlasi ajnan veran demokratian region. Kaj la uzo de la vorto 'spearhead' estas laŭ mi vere, vere signifa. Ni ne ŝajnu, ke tiu estas defenda forto; 'spearhead' estas atako" (<http://silveristhenew.com/2014/05/nato-spearhead-force-shows-turn-from-defense-to-offense>).

Historiisto Webster Tarpley la 5an de septembro rigardis la "konkludon de la pintokonferenco de NATO – monstran festivalon de milit-psikozo, militema retoriko, fare de bando da senkreditigitaj, ĉionriskemaj demagogoj, gvidataj de eble la plej senkreditigita demagogo el ĉiuj, Hollande, markante la kompletan soros-igon de la socialista internacio, Hollande nun banas sin en 13%-a populareco, kaj ne longe malantaŭ li en la konkurso ĝis la fundo, Cameron, Kolonelo Blimp [stereotipa angla kolonelo imperiisma], personigo de la 'perfida Albiono', kaj lia amiko Clegg, kiu kompreneble estas pli-malpli mortanta, kun la Liberal-Demokratoj. ... Granda demando por Usono: La britoj entiris vin en la Unuan Mondomiliton; la britoj entiris vin en la Duan Mondomiliton – tio estis iomete pli kompleksa – sed nun, vi lasos al la britoj entiri vin en la Trian Mondomiliton, ĉu? Perfido, ne!" (<http://youtube.com/watch?v=5awkwDycFis>). He gives more background to NATO's 'spearhead' force.

Intertempe la militĉeson en Ukrainio, anoncita en Minsk, negocita de Rusio, bonvenigis EU per anonco de pluj sankcioj kontraŭ Rusio (<http://rt.com/news/186148-eu-adopt-sanctions-russia/>), kvankam tio povus esti prokrastita. Por mi estas defio anticipi la rusajn reagojn, ĉar ili ĉiam estas tiom bone trapensitaj. Kiel povas Rusio reagi al io ajn el tiu ĉi sen esti bildigita kiel la agresanto? Eble unu maniero estus anticipi plenumi la precizajn sankciojn kiujn EU minacas kontraŭ Rusio; tiuj frapus EU kiel ankaŭ Rusion, kaj pelus EU-landojn, kiuj jam malvolonte subiĝas al Usona premo, meti pli da blua akvo inter sin mem kaj Usonon. Kaj Rusio apenaŭ povus esti kulpigita pro tio.

Mi vidas, ke Miĥaelo Gorbaĉov estas ĵus publikigonta siajn memuarojn sub titolo "Post Kremlo". En epilogo li kulpigas pro la nuna ukraina krizo la hastan kaj senpensan disrompon de USSR en 1991 (<http://rt.com/politics/185308-gorbachev-ukraine-crisis-dialogue>). Mi interesiĝos vidi, kion li skribas pri enplektiĝo de CIA en tio, kaj la negoco kun NATO, kiam ĝi eldoniĝos.

#### \* 9-11: la fasado diseriĝas

"La fasado diseriĝas ĉirkaŭ 9-11 – Kial?" skribis Jeffrey Berwick en The Dollar Vigilante Blog [La blogo de la dolar-milicio] (<http://dollarvigilante.com/blog/2014/8/5/the-walls-are-crumbling-down-around-911-why.html>). "Okazas absolute monumenta ŝanĝo, kiun la plimulto ankoraŭ ne rekonis. La vero, aŭ almenaŭ iom de la vero, estas montrota al la usonaj amasoj rilate al 9-11", li asertas. Li raportas pri 40-minuta intervjuo kaj altelefonado kun la gvidanto de 'Architects and Engineers for 9/11 Truth' [Arĥitektoj kaj Inĝenieroj por 911-vero], Richard Gage, en C-SPAN, kiu riceveblas en 100 milionoj da hejmoj en Usono. Tiu ĉi estas la unua okazo, ke 9-11 estis tiamaniere prezentita en uson-bazita reto, kun signifa areo kovrata, li diras. La sola alia okazo, kiam estis prezentita la vero pri 9-11 en usona televido en tia lumo estis de RT, kiu disradiiĝas en 644 milionojn da hejmoj mondscale kaj ĉirkaŭ 85 milionojn da hejmoj en Usono, kiam ili dissendis la veron pri 9-11 en septembro 8a, li skribis.

Aperis simila raporto la 6an de septembro en Storyleak [Rakonto-liko] titolita 'Unprecedented 9/11 C-Span video: 9/11 Truth finally appears in the mainstream media' [Senprecedenca filmeto pri 9-11 en C-Span: 911-vero fine aperas en tradiciaj amaskomunikiloj] (<http://storyleak.com/over-2200-architects-and-engineers-destroy-the-official-911-commission-report>).

La 13an datrevenon de 9-11 ĉi-jare No Lies Radio [Senmensoga Radio] planas Film-Festivalon "Exposing the Greatest Fraud on Earth" [Malkaŝante la plej grandan trompon surtere] (<http://noliesradio/filmfestival>). Tiu inkluzivos novan filmon "The Anatomy of a Great Deception" [La anatomio de granda miskredigo] de David Hooper. Tiun filmon entuziasme subtenas Architects and Engineers for 9/11 Truth [Arĥitektoj kaj Inĝenieroj por 911-Vero]. Richard Gage komentis, ke tio "estis la plej bona ŝanco ĝis nun por antaŭenpuŝi la debaton pri 9-11 en la tradiciajn amaskomunikilojn. Ĝi estas prezentita en maniero, kun kiu homoj povas vere konektiĝi" (<http://www.ae911truth.org/en/news-section/41-articles/896-the-anatomy-of-a-great-deception.html>). Ruĝtapiŝan lanĉon oni planis por la 5a de septembro, kaj DVD-oj povas nun esti menditaj de ilia retejo (<http://www.anatomyofagreatdeception.com>).

En Londono, la teatraĵo de Peter Neathey, Seven Seconds, denove prezentiĝis ĉe la teatro Et Cetera en Camden de la 5a ĝis la 7a de septembro (<http://etceteratheatre.com>) kaj tion oni raportis tute simpatie en Camden New Journal la 4an de septembro (<http://www.camdennewjournal.com/barefoot-former-spook-david-shayler-treads-boards-camden-town>). Pluajn prezentojn oni planas por la 10a kaj 11a de septembro ĉe la tenisklubo Elmwood en Holland Road, NW10 5AJ.

Estas bone vidi, ke mia novaĵletero de junio-majo estis reproduktita en la retejo Inquiring Minds (<http://inquiringminds.cc/uk-911-truth-keep-talking-berkshire-911-truth-newsletter-for-june-july-2014-ian-fantom>). Dismetu tiujn ĉi aferojn. Paroladu pri kiel ili militas per miskredigo. Estas nekredible, sed tio estas la tuta afero de miskredigo. Brita propagando iam estis bazita sur la ideo, ke la homoj eĉ ne suspektus ke ĝi ekzistas, kaj la brita miskredigo estis la plej bona en la mondo. Sed tion transprenis la miskredigo de Likud-Novkonservativuloj, kiu estas tiom meĥanika, ke ĝi estas ridinda. Ili tutsimple sekvas la regulojn kiel marionetoj. La hodiaŭa anonco de Obama (2014-09-11) ke Usono kun aliaj bombos Sirion, signifas, ke en tiu batalo venkis AIPAC kaj la Likud-Novkonservativuloj. Sed tio alportos grandegajn dividojn en la usona Establaĵo kaj inter la usonanoj, ĉar nun multaj komprenas pli bone la ludon. Jam tiu divido malfermiĝas en Londono; la ministro pri defendo anoncis, ke Britio ne partoprenos, sed estis tuj superregata de la novkonservativa ĉefministro Cameron. La fasado diseriĝas antaŭ niaj okuloj.

Amuziĝu dum vi elpensas la miskredigon, kaj ja daŭrigu la paroladon.

Salutas Ian  
Keep Talking  
[ian@fantom.org.uk](mailto:ian@fantom.org.uk)

## Aplikado de Esperanto en la scienco kaj tekniko

Se vi ŝatus ekkoni konatajn (*kaj rekonatajn*) esperantistojn, interesiĝantajn pri aplikado de scienco kaj tekniko de Esperanto – samtempe kiuj ŝatas bonetose pasigi la tempon – indas partopreni la Esperanto-aranĝon "KAEST" en Slovakio.

Jam de longe estas tradicie, ke kelkdeko de pli seriozaj esperantistoj, interesiĝantaj pri la faka aplikado de Esperanto kaj pri la kunligitaj terminologiaj problemoj kunvenas en ĉiu dua jaro en aparta renkontiĝo nomata "KAEST – Konferenco pri Aplikado de Esperanto en Scienco kaj Tekniko" ie en Slovakio, en mezo

de Eŭropo.

Kutime ni kunvenas en 60-80 persona societo el manpleno da landoj ekde vespero de ĵaŭdo ĝis tagmezo de dimanĉo, ni aŭskultas 30-40 minutajn prelegojn pri diversaj interesaj sciencaj kaj teknikaj temoj, kaj ni babilas, diskutas pri la kunligitaj terminologio, fakaj esprimoj kaj fakaj vortaroj.



En ĉiu jaro oni havas iun ĉeftemon, kiu ne estas ekskluziva, ĝi ĉefe nur orientigas la temo-elekton de la prelegantoj. Materialoj kaj prelegotekstoj de pluraj malnovaj KAEST-oj estas troveblaj en la Scienc-Teknika Esperanto-Biblioteko, STEB ĉe [www.eventoj.hu/steb/](http://www.eventoj.hu/steb/) kaj prelegoj de la lastaj jaroj haveblas ankaŭ libroforme.

---

La ĉi-jara kunveno okazos inter 13-16. de novembro en Slovakio, en universitata urbeto Mŭdra Harmonia, je 40 km-a proksimeco de Bratislava. La organizanto estas la firmao/societo E@I, kun gvido de Peter Baláž. Ni kolektiĝas ĵaŭde vespere, ni kunestas dum la longa semajnfino, kaj dimanĉe tagmeze ĉiuj reveturas hejmen.

La partopreno ne estas ligita al membreco en iu asocio, kaj ne estas ligita al iu aĝo, kutime la plejmulto estas inter 25 kaj 45 jaroj. Oni bonvenigas vin ankaŭ tiam, se vi ne estas specialisto en iu teknika fakoj, se vi ne volas prelegi, nur aŭkuskulti la aliajn.

Pli detalajn informojn kaj aliĝilon vi trovas en la retejo <http://kaest.ikso.net/>. Ĝis la 10-a de aŭgusto vi povas aliĝi al la kunveno eĉ per speciala frualiĝa rabato... :-)

Volonte mi renkontus vin ankaŭ persone en KAEST! Ĉu ni renkontiĝos tie?

Kun salutoj,

Szilvási László

*Lingvo-Studio, L.S.*

[www.eventoj.hu](http://www.eventoj.hu)

## Nova Esperanta Libro pri Radiestezo

Eble iuj el vi jam konas min per retpostoj de tempo al tempo alsendita, sed por tiuj kiuj ne konas min, mia nomo estas José Roberto, mi logas en Brazilo, en la urbo de Ribeirão Preto - San Paulo.

Mia unua kontakto kun Esperanto estis en mia adoleskanteo tra foldfolio, kiu venis al mia mano, sed mi ne havis oportunecon tiam partopreni. En 2004, mi havis novan kontakton, kaj ekde ci tiu jaro gis nun Esperanto akompanas min, sed mi estas pli divastiganto ol vera praktikanto.

Hodiau, emerita ingeniero, inter la diversaj agadoj kiujn mi ciutage faras, mi instruas kursojn pri radiestezo. En mia esploro en la interreto mi trovis malmulte pri tiu temo en Esperanto, kaj trovis nur uno libron, eldonita en 1938. Tiu arto estas praktikata ekde antaŭhistorio gis hodiau je diversaj areoj (geologio, medicino, kriminala, homaj rimedoj, ktp) tial ĝi devas havi sian lokon inter la libroj eldonitaj en Esperanto.

Tio kuragigis min traduki mian kurson al Esperanto. Ci tiu laboro estis nur ebla danke al la helpo de pluraj personoj - esperantistoj kaj ne esperantistoj, kaj inter ili elstaras Anna Maria Molero (Hispanio), Roland Rotsaert (Belgio) kaj Rodrigo de Carvalho Mendonça (Brazilo).

La libro ne celas elcerpi la temon, sed samtempe instruas cion, kio estas necesaj por la praktiko de la radiestezo, kaj ankaŭ montras, ke ĝi estas scienco, kiu bedaurinde estis mistifikita de iuj homoj en la paso de ĝia ekzisto.

La libro pritraktas uzadon kaj instruadon cefe de la pendolo en la radiestezo. Kiel cefaj temoj de la libro ni reliefigas: La Radiestezan Sistemon, Radiestezon kaj Teleradiestezon, Geobiologion, kaj Konduton de la Radiestezisto. Ero senpage de la libro estas disponebla por legi ce:

<http://www.alumiar.com/1511-librokursodepraktikaradiestezo>

La cefa celo de ci tiu libro estas igi la personojn kapablaj lerni radiestezon, kaj per simplaj metodoj identigi malprofitajn anomaliojn kiuj influas la homan, vegetalan kaj bestan sanojn, povante kauzi la "kuracadon".

Mi petas vin sciigi inter viajn kontaktojn la ekziston de tiu ci libro. Ĝi povas esti acetata per Amazon retejoj - [www.amazon.com](http://www.amazon.com), Amazon Europo - (Ekz. [www.amazon.co.uk](http://www.amazon.co.uk), ktp).

Mi dankas vian atenton kaj mi estas je via dispono por ia ajn demandoj.

Brakumojn  
José Roberto Ruiz  
[www.alumiar.com](http://www.alumiar.com)  
Brazilo

## Jen kelkaj statistikaĵoj pri la Tutmonda Futbalkokalo de 2014:

(Scivolemaĵo)

Nombro da ludoj = 64

Nombro da stadionoj = 12

Nombro da selektitaroj = 32

Kiom da fojoj ĉiu selektitaro ludis:

Alĝerio = 4

Anglio = 3

Argentino = 7

Aŭstralio = 3

Belgio = 5

Bosnio-Hercegovino = 3

Brazilo = 7

Ĉilio = 4

Ebur-bordo = 3

Ekvatoro = 3

Francio = 5

Ganao = 3

Germanio = 7

Grekio = 4

Hispanio = 3

Honduro = 3

Irano = 3

Italio = 3

Japanio = 3

Kamerunio = 3

Kolombio = 5

Kostariko = 5

Kroatio = 3

Meksikio = 4

Nederlando = 7

Niĝerio = 4

Portugaliao = 3

Rusio = 3

Sudkoreio = 3

Svisio = 4

Urugvajo = 4

Usono = 4

Poentaro de ĉiu ludo:

Brazilo 3 X 1 Kroatio

Meksikio 1 X 0 Kamerunio

Hispanio 1 X 5 Nederlando

Ĉilio 3 X 1 Aŭstralio

Kolombio 3 X 0 Grekio

Urugvajo 1 X 3 Kostariko

Anglio 1 X 2 Italio

Ebur-bordo 2 X 1 Japanio

Svisio 2 X 1 Ekvatoro

Francio 3 X 0 Honduro

Argentino 2 X 1 Bosnio-Hercegovino

Germanio 4 X 0 Portugaliao

Irano 0 X 0 Niĝerio

Ganao 1 X 2 Usono

Belgio 2 X 1 Alĝerio

Brazilo 0 X 0 Meksikio  
Rusio 1 X 1 Sudkoreio  
Aŭstralio 2 X 3 Nederlando  
Hispanio 0 X 2 Ĉilio  
Kamerunio 0 X 4 Kroatio  
Kolombio 2 X 1 Ebur-bordo  
Urugvajo 2 X 1 Anglio  
Japanio 0 X 0 Grekio  
Italio 0 X 1 Kostariko  
Svisio 2 X 5 Francio  
Honduro 1 X 2 Ekvatoro  
Argentino 1 X 0 Irano  
Germanio 2 X 2 Ganao  
Niĝerio 1 X 0 Bosnio-Hercegovino  
Belgio 1 X 0 Rusio  
Sudkoreio 2 X 4 Alĝerio  
Usono 2 X 2 Portugalio  
Aŭstralio 0 X 3 Hispanio  
Nederlando 2 X 0 Ĉilio  
Kroatio 1 X 3 Meksikio  
Kamerunio 1 X 4 Brazilo  
Kostariko 0 X 0 Anglio  
Italio 0 X 1 Urugvajo  
Japanio 1 X 4 Kolombio  
Grekio 2 X 1 Ebur-bordo

Niĝerio 2 X 3 Argentino  
Bosnio-Hercegovino 3 X 1 Irano  
Honduro 0 X 3 Svisio  
Ekvatoro 0 X 0 Francio  
Portugalio 2 X 1 Ganao  
Usono 0 X 1 Germanio  
Alĝerio 1 X 1 Rusio  
Sudkoreio 0 X 1 Belgio  
Brazilo 4 X 3 Ĉilio  
Kolombio 2 X 0 Urugvajo  
Nederlando 2 X 1 Meksikio  
Kostariko 5 X 3 Grekio  
Francio 2 X 0 Niĝerio  
Germanio 2 X 1 Alĝerio  
Belgio 2 X 1 Usono  
Argentino 1 X 0 Svisio  
Brazilo 2 X 1 Kolombio  
Francio 0 X 1 Germanio  
Argentino 1 X 0 Belgio  
Nederlando 4 X 3 Kostariko  
Brazilo 1 X 7 Germanio  
Nederlando 2 X 4 Argentino  
Brazilo 0 X 3 Nederlando  
Germanio 1 X 0 Argentino

### **Informajxoj**

### **Itala Kongreso de Esperanto**

Gesinjoroj, Honoraj gastoj!

Mi kore dankas al la organizantoj de la 81a Itala Kongreso de



Esperanto pro la invito partopreni, gvidi seminarion pri Aktivula Maturigo, kaj plie, nome de Universala Esperanto-Asocio (UEA) prezenti la nunan festparolon.

Tra kvardeko da jaroj mi ne sukcesis partopreni italan kongreson – sed ĝia renomo tra la lastaj

jaroj ja atingis min. Efektive, la kongreso, kiun mi ja partoprenis, okazis en 1973, ĝuste ĉi tie en

Trento. En la sama regiono kelkajn jarojn poste, en urbeto *Levico* okazis la unua Internacia Junulara Festivalo, ankaŭ tion mi – kiel junulo – partoprenis kun belaj rememoroj.

Estante mem novzelandano – en la koro, eĉ se ne laŭpasporte, ne surprizos vin, ke mi amegas regionojn kun montegoj, alpoj kaj serioze pura aero. Do, dankon al la organizintoj pro la invito,

kaj pro ilia grandega laboro realigi nian nunan kongreson.

Tiu kongreso havas temon – ‘Esperanto kaj novaj teknologioj’. Multaj el la sesioj rekte traktos

tiun temon. Certe en nia seminario pri Aktivula Maturigo (tio estas AMO) ni tuŝos ĝin ripete: kiuj komunikiloj estas kaj ekestos je nia dispono, kiel ni efike majstru kaj mastrumu ilin, kaj kiujn mesaĝojn ni per ili volas transdoni?

Mia ĉefa festparola temo rilatas al tiu lasta demando: kiuj estas, por ni esperantistoj, la kernaj mesaĝoj, kiujn ni volas porti al la mondo? Multaj kandidataj mesaĝoj ekzistas; el tiuj, mi proponas nur tri.

Ili estas nek longaj, nek komplikaj. Ĉiuj tri kune ampleksas nur dek vortojn. Jen la unua:

### **Esperanto estas justa lingvo**

Tio formas la kernon de la argumentado kaj filozofio de UEA de jardekoj. Ĝi centras en la Manifesto de Prago, kiu kreiĝis antaŭ preskaŭ dudek jaroj – en 1996. Ĝi fakte ekzistas dekomence. Zamenhof mem kreis la lingvon por mildigi la tensiojn inter nacioj, ofertante al ili

pli efikan, pli universale alireblan komunikilon.

Tio praktike signifas, ke neniua nacio – naciaro – kulturo - ekonomio - ĝuas nejustan avantaĝon

pro la fakto, ke ĝia lingvo funkcias kiel transnacia komunikilo. Pro la relativa facileco de la lingvo, ĝi ja estas alirebla, lernebla kaj uzebla de praktike ĉiu, pere de simila elspezo de tempo

kaj mono, sekve ĝi proponas demokratian solvon al internaciaj komunik-bezonoj.

Implico de tio estas, ke la plimulto de esperantistoj favoras multlingvan kaj multkulturan mondon. Ekologoj ĉagreniĝas pro la perdado de bio-diverseco – specioj pereas ĉiusemajne.

Esperantistoj – kaj multaj aliaj - ĉagreniĝas pro la perdado de lingva kaj kultura diverseco.

Parolantoj kaj defendantoj de pli etaj kaj minacataj lingvoj devas vidi en la Esperanto-movado

ne minacon aŭ konkurencon, sed aliancon.

Jen la argumento pri la justeco de nia lingvo – esence temas pri idealismo. Necesas demandi

–

kiaj estas la homoj, ĉe kiuj tiu argumentado estos konvinka, kaj kioma proporcio el la monda popolo falas en tiun kategorion?

Nu, pac-batalantoj ĉiuspecaj estos allogataj – homoj, kiuj volas vidi solvojn por militoj kaj konfliktoj per intertraktado kaj dialogado prefere al apliko de pafiloj. Temos pri subtenantoj de

Unuiĝintaj Nacioj, Unesko kaj la svarmo da homrajtaj kaj similaj organizaĵoj, homoj aktivaj pri

elcentaĵoj – mi proponas dudek elcentojn. Iuj estos forte kaj tuje kaptitaj de tiu idealisma

Tamen, ja indas evoluigi kaj uzadi la idealismajn argumentojn, ĉar ĉe tiu 20% ili povas havi



bonegajn rezultojn. Emocie engaĝitaj homoj emas fariĝi aktivaj kunlaborantoj – eĉ ‘movadanoj’

verdajn flagojn -- kaj pluiros pergajni sian vivon, amuziĝi, deprimiĝi, akiri kunulon, perdi kunulon, umi per sia portebla komunikilo, malfruiĝi por rendevuo – kio ajn alia, kio rolas aŭ gravas en ilia vivo. Nia idealisma mesaĝo, eĉ se ripetita (laŭ iu teorio) sepfoje, ĉe la granda Do, kion pri aliaj mesaĝoj, kiuj havus ŝanĉon penetri tiun indiferenton? Jen la dua, same konciza

### **Esperanto estas fascina lingvo**

Surprize multaj el la parolantoj de nia lingvo, deklaras, ke ili estis logitaj de ĝia klara, logika strukturo – efektive, ĝi laŭ tiu orda, planita aliro estas tre malsimila al naciaj lingvoj – eĉ malsimila al la itala, kiu el vortproviza kaj aliaj vidpunktoj tre similas. Ili scivolos, ĉu lingvo sukcesis malkovri tiun komunumon, ili ofte trovas sian lokon ene de ĝi.

argumentoj, kiujn mi ne taksis kernaj, ja kontribuas al ĉi tiu mesaĝo. La relativa simpleco de la

lingvo kontribuas al ĝia fascineco, kaj la praktikaj uzebloj ene de ĝia komunumo – kvankam iom

specifaj aŭ niĉaj – ankaŭ helpas. Mi preferas ne aludi tro forte al la ‘simpleco’ de Esperanto, ĉar

ju pli oni progresas, des pli oni konstatas ĝian kompleksecon kaj nesimplecon. Se tiom simpla ĝi

pri ĝi? Prefere en niaj prezentaĵoj ni turnu la aferon, kaj emfazu ĝian rapidan uzeblon por La fascineco de Esperanto povas rilati pure al ĝiaj lingvaj unikaĵoj, sed same povas deveni el la

pordoj malfermeblaj per ĝiaj kulturaj, praktikaj aŭ fakaj aplikoj.

en la idealisma kampo. Do, nun ni havas du mesaĝojn konvenaj por ĉ. 40% de la homoj sur la tero. Evidente malmultaj el tiuj 40% fine fariĝos esperantistoj, sed ili plejparte havos ian simpatian por la lingvo kaj ĝiaj celoj.

Tio portas nin al nia tria mesaĝo. Kion pri la restanta 60% de la homaro? Ni bezonas mesaĝon

ankaŭ por ili. Jen ĝi ... eĉ pli konciza, konsistanta el nur tri vortoj:

### **Esperanto estas ...lingvo**

Nome, ĝi estas vivanta, evoluanta lingvo, kun solida parol-komunumo, kun plena ekzistorajto inter la familio de lingvoj. Jen nia mesaĝo por 100% de la homoj sur la tero.

Tiun mesaĝon, kontraste al la aliaj, plejparte ne estas perebla per flugfolioj, varbiloj, verdasaj steloj kaj statuoj de Zamenhof en parkoj. Tiun mesaĝon oni plej bone komunikas per praktika semado.

En ĉiam pli da lokoj kie servo aŭ varo estas proponenda diverslingve, aperu Esperanto ene de la

oferto. Tiu vojo multe pli konvinkos ol luktado por akiri – kaj poste pene defendadi -- dekretojn

de akademioj aŭ edukaj instancoj. Ni lasu al la faktoj paroli por si mem.

Multaj unuopuloj kaj grupoj jam malkovris la gravecon de tiu ‘politiko de ĉeesto’ – estas tempo,

ke ankaŭ UEA akceptu la valoron de tiu minimuma mesaĝo kaj kunlaboru kun tiuj grupoj – ene

de kaj ekster la formala strukturo de la asocio.

Evidente, en multaj kazoj estos tre malfacile konvinki la koncernajn instancojn aŭ kompaniojn akcepti aldonon de Esperanto, precipe kie oni devas montri klaran finanĉan avantaĝon el tio.

Sed

abundas miloj da ‘facilaj’ celservoj -- sukcesoj ĉe Wikipedio, ĉe agado en la Esperanto-urbo

Herzberg montras, kiel ofte diris Humphey Tonkin, “ekzistas por ni multe pli da malfermitaj pordoj ol ni kapablas trapasi.”

Solida kampanjo por ‘krei faktojn’ kapablas ene de unu generacio liveri nin al pozicio en kiu oni

ne plu dubas pri la ekzisto kaj la ekzisto-rajto de Esperanto, kune kun ĉiaj eksdataj ideoj de ĝia

manko de kultura fono.

En nia varba laboro, ni malpli ofte komencu per referencado al Ludoviko Zamenhof kaj la originoj de la lingvo, kaj pli forte emfazu la nunan parolkomunumon kaj ĝiaj agadoj. Estas du ĉefaj sintenoj, kiujn ni devas dementi:

“Esperanto – kio estas tio?” Do, plena nescio – kaj, nur unu gradon pli pozitive:

“Esperanto – jes, mi aŭdis pri ĝi – sed ĉu ĝi ne delonge mortis?”

Pri tiu 60% ni ne havu iluziojn, ili ne volos lerni aŭ uzi la lingvon, ili ne volas multon pri ĝi scii.

Sed almenaŭ ili konsciu pri ĝia ekzisto, kredu, ke ĝi ja estas vera lingvo, kaj laŭeble havu minimume pozitivan bildon pri ĝi.

### **Mesaĝoj por iuj, mesaĝoj por ĉiuj**

Mi provis iel skizi per simpla diagramo mian percepton, kiel tiuj tri celgrupoj interrilatas. Unue, nia mesaĝo por ĉiu entenas la ceterajn du grupojn.

La idealistoj kaj fascinatoj iugrade koincidas. La popoloj en la grupoj povas migri. Idealisto povas poste malkovri praktikajn utilojn por la lingvo.

Fascinato povas post-malkovri kaj ekŝati la ‘internan ideon’.

Kelkaj homoj el la 60%, konvinkitaj iom post iom, ke la lingvo vivas kaj rajtas vivi, povos malkovri ĝian fascinan aŭ ĝian idealisman flankojn, kaj eĉ eklerni ĝin. Inverse, Kabeistoj troveblas en ambaŭ el la pli engaĝitaj grupoj.

Mi volas fermi ĉi tiun teman esploron per la ofta diro: ‘Ho, en la mondo, ĉiu jam parolas la anglan’. La dirantoj jam trovis solvon por siaj internaciaj komunik-bezonoj, por ili Esperanto jam ne utilas. Kun kreskanta instruado de lingvoj ekde frua aĝo, kaj kelkloke pli efikaj instruteknikoj, plioftiĝos la aŭdado de tia opinio.

Evidente, la aserto estas falsa – ĉiu en la mondo definitive kaj pruveble ne parolas la anglan. La

denaska popolo de anglalingvanoj ne kreskas, la kresko venas el ĝia vasta instruado, kaj el enmigrintoj al angle-parolantaj landoj. Delonge, la proporcio de ĝiaj parolantoj en la mondo restas je ĉ. 20%.

Sed la dirintoj de tiu fama frazo ne mensogas. Por ili, veras la aserto! Necesas nur iomete precizigi la vortumon. Kion ili fakte volas diri estas: “Ĉiu eksterlandano kun kiu mi volas rilati,

ja parolas la anglan.” Kaj tio estas multkaze vera. Unuopulo kapablas trakti ne pli ol kelkmil amikojn, konatojn, kolegojn kaj kontraŭulojn – eĉ se ni aldonas ‘amikojn’ de *Facebook*.

La dirintoj eĉ ne konscias, ke per tiu sinteno, ili kondamnas 80 elcentojn de la monda loĝantaro

al neglekto – kvazaŭ aro da nekoninduloj.

Paradokse, tiu sama fenomeno uzeblas por konkludi, ke Esperanto jam sukcesis. La nombro da

parolantoj de la lingvo jam superas la kvanton da personoj, kiun unu averaĝa homo kapablas

mense prizorgi. Simple ekzistas pli da esperantistoj ol oni povas en unu modesta vivo renkonti.

Simile ekzistas pli da renkontiĝoj ol oni povas partopreni, pli da libroj kaj revuoj ol oni kapablas

legi, pli da radio-programoj ol oni povas aŭskulti, pli da retfilmetoj ol oni povas rigardi kaj pli

da retejoj ol oni povas viziti.

Jen do, mia tri-mesaĝa tezo: tre eble diversaj el vi ne konsentos kun mi, kaj mi antaŭĝojas diskuti kun vi pri tio tra la kongresaj tagoj.

Resume kaj fine, jen miaj proponoj por niaj kernaj mesaĝoj al la mondo:

**Esperanto – justa lingvo, fascina lingvo, kaj ...lingvo.**

Festparolo de la vicprezidanto de UEA al la 81a Itala Kongreso de Esperanto en Fai della Paganella, Italio, en la 24a de aŭgusto, 2014.

Sub: \0UEA\Landaj Asocioj\ IT festparolo SMG kaj IT Diagramo la tri celgrupoj.doc

### **Landa kongreso kun granda internacieco**

Vicoj da spirhaltige imponaj rokkolonoj kadre de dolomita montoĉeno formis la scenejan fonon por la 81a Itala Kongreso de Esperanto, hodiaŭ inaŭgurita en la norditala urbeto Fai della Paganella. Tiu kongreso altiris 211 aliĝintojn el dudek-kvino da landoj – elstara atingo el inter la eŭropaj landaj asocioj de UEA. La kongresa urbeto troviĝas sur montara altebenaĵo, kiu cetere ne estas tro ebena kaj certe ne larĝa, atingebla per nur unu serpentuma kaj dekliva vojo. Banderoloj tra la tuta urbeto zorgas, ke neniu lokano povas ne scii pri la ege internacia invado kiu daŭros tutan semajnon.

La ĉefa gasto de la inaŭgura ceremonio estis la vicurbestrino de Fai, s-ino Maria Pia Tonidandel, kiu aldone al bonvenigaj vortoj, aprezis la humanecajn kaj hom-prokisisimigajn aspektojn de nia lingvo. Ĉeestis kaj salutis trio da pliaj reprezentantoj de la regiono Trentino, en kiu situas Fai della Paganella.

Reĝisoris la prezentaĵon s-ro Aldo Grassini, por LKK parolis Laura Brazzabeni, por la itala junularo Emanuele Regano, por TEJO Michael Boris Mandirola, kaj por UEA ĝia vic-prezidanto Stefan MacGill, kiu plenumis ankaŭ la festparolon, kies teksto estas alkroĉita. Sekvis salutoj de deko da fakaj asocioj kaj dudeko da landaj asocioj. Nicola Minnaja prizorgis superrigardon de la kursoj kaj seminarioj – unu pri interlingvistiko, alia pri Aktivula Maturigo (AMO), atendeblaj tra la semajno.

Sekvos pliaj komunikoj pri la daŭrigo de la kongreso kaj ĝia enkuŝanta seminario pri AMO.

**Stefan MacGill**  
Vicprezidanto de UEA  
Komisiito de ILEI pri la retkurso 'Esperanto Etape'.

**Internacia Festivalo > internacia : renoma : alloga**

---

**BONVENON AL NIA ADIAŬA 31-A IF - JARFINE EN JÜLICH**

---

*Karaj geamikoj,*

Koran bonvenon al nia 31-a IF en Jülich! La klerigejo - komforta porfamilia hotelo, novkonstruita en 2013 - gastigas vin kun luksaj ĉambroj, ĉiuj kun duŝo kaj necesej, kun duŝtukoj kaj TV . La domo disponas pri saŭno, kiun ni ofertas al vi (senkoste) ĉiun duan tagon. Apudas urba parko (senkosta eniro por IF-anoj) i.a. kun Napoleonaj fortikaĵoj.

Niaj kotizoj inkludas tri manĝojn tage, la loĝigon en komfortaj ĉambroj, la tradiciajn silvestrajn bufedon kaj balon kaj novjaran brunĉon. Dulitaj ĉambroj por plenkotizantoj, por subvenciitoj parte trilitaj. Unulitaj nur laŭ disponeblo en decembro.

Bv. atenti: La sekva limdato finiĝos je 30 septembro. Utiligu fruan aliĝon, ni ĝojas pri via nunjara partopreno!

[Varbilo/informilo](#) (kun koloraj fotoj pri Jülich kaj la tuttaga ekskurso al Köln) estas elŝutebla en nia interreta (start-)paĝo sub "Dua Informilo". Ĝi aperas en PDF-formato kaj estas laŭplaĉe printebla, same ankaŭ la papera versio de la (flava) [aliĝilo/informilo](#). Bonvolu disdoni kaj informi viajn geamikojn kaj konatojn!

Ni preparas interesan programon: partopreno dumtage en prelegoj pri kadra kaj aliaj temoj - aŭ paralele en kursoj kaj promenoj. Ni antaŭvidas variajn distrajn ofertojn, i.a. lumbildajn prelegojn kaj vesperajn koncertojn. En nia tuttaga ekskurso (fakultative, 30 dec 2014) ni vizitos aŭtobuse la proksiman Köln (Kolonjo). Tagmanĝo en la malnova urba centro (menuo inkl. en la biletprezon); konatiĝu kun la konata katedralo kaj la mondfama Kolonja Akvo (471 l Eau de Cologne).

Nia IF-gastejo *Knajpo* atendos vian ĉiutagan (kaj noktan) viziton, ĝuu niajn lokajn bierojn, vinojn kaj koktelojn, kapuĉinon, kafon kaj kukon ... plus nian konatan IF-etoson. Dum multaj jaroj nia IF-bistrot akompanis vin kun profesieca oferto kaj garantiis bonhumoran komunecon; ĝi estas je via dispono ankaŭ dumtage por interamikaj babiladoj! Plilongiga tago: ni antaŭvidas matene prelegon, posttagmeze viziton al najbara Aachen, kun promenoj kaj vizito al kafejo. Bonvenon!

Alveno Jülich: Najbaraj flughavenoj estas Düsseldorf (DUS) kaj Köln-Bonn (CGN). Aŭto-veturantoj ĝuos (senkoston) parkumejon antaŭ la domo. Trajnveturantoj: Veturu per interurbaj trajnoj (tra Köln resp. Aachen) al proksima *Düren* kaj daŭrigu per regiona trajno al Jülich. Informiĝu ĉe [www.bahn.de](http://www.bahn.de) aŭ petu de ni konvenan rekomendon! Pliaj detaloj (kun multaj rekomendoj) en nia interreta subpaĝo [rekomendoj](#) (atingebla el la startpaĝo).

Vizitu niajn interretajn paĝojn, legu pliajn detalojn kaj aktualajn informojn: [www.internacia-festivalo.de](http://www.internacia-festivalo.de)


*Karaj geamikoj, dum pli ol 30 jaroj ni ofertis al vi renoman kaj allogan seminarion, evidente nun indas pensi al ĝia fino. Bonvenon al nia adiaŭa IF en Jülich!*

*Utiligu la rabatitajn kotizojn ĝis 30 septembro, [aliĝu](#) jam nun!*

*Festu novjare kun ni, ĝuu la IF-etoson - lastfoje kun ni!*

Aliĝintoj ricevos la Trian Informilon en novembro, kun pliaj rekomendoj pri alveno kaj restado.

Salutas vin elkore kaj ĝojas pri (re)vido,  
HDP / Hans-Dieter Platz (organizanto)



## Artikoloj

Fatbardha Demi

## Ĝoka<sup>1</sup> atestas

*“Dum miloj da jaroj albanoj apenaŭ povis forgesi sian Pelazgan devenon”*

*Eduardo Ŝnajder*

### 1. La Pelazgaj<sup>2</sup> simboloj ĉe la vestoj de la albanoj

Unu el la plej konataj humanistoj kaj la plej poeteca voĉo de Eŭropo el XIX jc, Georgo Bajrono, en sia letero al lia patrino, sendita el Osmana Imperio, skribis: “La naciaj albanaj kostumoj, ĉirkaŭ 130 specaj, estas potenca fenomeno de la estetikaj valoroj de la popola kulturo. Aparta aperaĵo estas la Fustanelo<sup>3</sup>. Tiu vira vesto (blanka robo fald-falda, longa ĝis la genuoj) estas kompletiĝonta, kiam oni

---

<sup>1</sup> Supra vesto, dika el kamloto, por viroj kaj virinoj, sen manika aŭ kun duonmanikoj, aŭ kun longaj manikoj ĵetitaj malantaŭen, longa ĝiszone, portante kutime bendoparton kiun oni surĵetas kapen. Estas blanka (nigra) ĝoko, ĝoko kun bendoj (kun hupoj) ka.

<sup>2</sup> Pelazgoj- antikva granda popolo ŭxtoktona eŭropa loĝinta en vasta teritorio de Eŭskio ĝis Malgranda Azio, antaŭ la Helenoj kaj Iliroj

<sup>3</sup> Parto de la nacia albana kostumo por viroj, jupo el blanka tolo kun multaj faldoj, heredita ankaŭ de grekoj

ligas ĝin per larĝa zono, kiam portas silahojn<sup>4</sup>, lanajn ŝtrumpetojn kaj kalcojn<sup>5</sup>, mokasenojn kun hupoj ĉepinte, takiojn<sup>6</sup>, subjakon kun manikoj kaj ĝamadanon<sup>7</sup>, ĉiuj broditaj per oro kaj arĝento” (1)



(a) Pentraĵo de Bajrono, vestite albane. (b) La subjako, la zono kaj la armiloj, partoj de la vesto kun fustanelo en la Suda Albanio. (2)

Tamen, la tradicia vesto de la albanoj, krom multvariecon regionan, riĉan juvelaron, armilaron, oron kaj arĝenton, kovrantan ilin, posedas ankaŭ “trezoroaĵojn” aliajn, nekonatajn ankoraŭ hodiaŭ- tiujn de la Mitoj de la Pelazga Dikredo.

En la legendo pri la Kreiĝo de la Mondo, kiun rakontadis la albanoj de la XIX jc, oni diras ke Dio, kreinte la akvon kaj ebenan teron, ekvidis ke lia verko estis nekompleta kaj la naturo monotoneca. Por kontentigi la homojn kreatajn, Li survojiĝis por plibeligi la Mondon. Kiam alvenis tie kie loĝis la albanoj, la sako lia eskapis disde la manoj kaj la montoj kaj montetoj troviĝintaj ene de ĝi, kovris la landon. (3)

Eble, la ĉioscianta Dio, elĵetis intence multajn montojn sur la landon de la malnovaj albanoj, por ke lia unua “portreto” kaj la memoro pri la genezaj mitoj, neniam plu perdiĝu. La franca esploristo Eduardo Ŝnajder kiu “manĝis panon” dum longaj jaroj en la Norda Albanio, konfesas ke: La plej strangaj

<sup>4</sup> Larĝa leda zono, ofte ornamita per oraj brodaĵoj, servinta por porti la zonajn fajroarmilojn kaj la ties ekipaĵojn.

<sup>5</sup> Alia vestoelemento

<sup>6</sup> Speco de ĉapo kun malvasta pinto, el blanka duobla tolo, batita per maŝinkudrilo portata de kamparanoj de Myzeqe; ĉapo kun ebena pinto, el ruĝa tolo, plenigita per lano kaj trikita kiel vatkovrilo, kiun portis la kamparanoj de Mirdita kaj Shkodra.

<sup>7</sup> Supra vesto el kamloto por viroj kaj virinoj, kvazaŭ subjakon kun galonoj, kutime sen manikoj kaj malferma antaŭe.



aventuroj de Ulikso, ĉu antaŭ Troja, ĉu dum lia reveno, rakontatas en ĉiuj hejmoj de la albanaj montaranoj, kiam ili kunvenas dum la vesperoj ĉirkaŭ la fajro”. (4)


En la koro de ĉi tiuj montoj de Albanio ankoraŭ hodiaŭ, dum geedziĝfestoj aŭ aliaj, la loĝantoj vestas la tradiciajn vestojn, ornamitaj per Pelazgaj Simboloj.

La ornamiĝo de la korpo en antikveco per tatuoj, juvelaro, armilaro, de la vesto ĝenerale kaj de ĉiuj objektoj ĉirkaŭantaj la homon en sia ĉiutaga vivo, per la dikredaj simboloj, havis nur unu celon: “Protekton kontraŭ la morton, malsanojn, murdojn pro la aliaj gentoj aŭ atakojn fare de la bestioj, pro naturaj katastrofoj, ks.

La homo dum la tuta sia historio, antikva kaj moderna, sentis la bezonon de “Dia mano” kaj tiucele ĉirkaŭigis sin per la ties kultaj simboloj.

En ĉi tiu materialo, mi koncentriĝos nur ĉe unu figuro en la vesto de la virino de Mirdita<sup>8</sup> (Montaro de la Norda Albanio). Laŭ mia opinio, la tuta vesto estas dediĉita al ĉi tiu figuro kaj la ties kulto, nomata hodiaŭ kiel “:Egipta kruco”.

En la malsupra foto, kie oni donas pli fidele la historian formon, ni vidas ke la brodistino dediĉis la centran lokon, kovrante preskaŭ tute la dorson de la virino. Ĉiuj aliaj ornamaĵoj en la ĝubleta<sup>9</sup>, estas simboloj montrantaj la dikredon kiun ĉi tiu figuro reprezentas.



Se ni observas atente ĝin, havos la impreson pri stiligita formo de la homa korpo. La esploristoj de la arto de la grotoj, facile malkovros “ la memportreton” de la ties loĝantoj.

Ĉi malsupre estas du artaj verkoj de la homo de Paleolito, koincidantaj je grafika aspekto al la figuro de Mirdita ĝubleta. Dum en la unua (fig.a) la homo tenas la manojn malsupren kaj evidentiĝas “la vosto”, en la dua la manoj estas alten levitaj, sed li estas sen “vosto”.

<sup>8</sup> Vasta region en Norda Albanio

<sup>9</sup> Vesto el nigra kamloto, dika kaj firma, sen manikoj, kun malvasta talio kaj larĝa fundo kvazaŭ ondiĝantan kampanon, kiun vestas kutime la virinoj de Granda Montaro kaj Dukaĝin. (Du grandaj nordaj regionoj)



(5)

La diferenco inter ili konsistas en tion ke (fig.a) ni havas simplan “fotografiigon” de la homoj vestitaj per la bestaj feloj, protektantaj ilin kontraŭ la malvarmon, kie certe enestis ankaŭ la vosto, kiel tio prezentiĝas en la fig.c el tempoperiodo pli malfrua.

Spurojn el ĉi tiu “memoro” estas jam trovinta Franc Nopĉa ĉe la dikredo, ke ekzistas homoj kun vosto. Tion li estas malkovrinta ĉe la loĝantaro en Albanio, Grekio, Malgranda Azio kaj Dalmatio. Dum en la dua foto (fig.b) la pratempa “artista” estas espriminta tre gravan momenton: la plenumiĝon de rito dediĉita al Dio en la ĉielo.

M. Eliade, esploristo de la pratempaj dikredoj, konfesas ke: “Se ni konsiderus Paleantropojn, ‘komplete homojn’, sekvas ke ili posedis ankaŭ ian dikredon kaj praktikis ritojn (...). El la arkeologiaj materialoj oni atestas ke la dikredo de la paleolitika ĉasisto ekaperas en la arto de la grotoj ekde 30 000 jarojn antaŭe”. (6).

Sur la fotoj malsupre, en la arkeologiaj materialoj estas prezentitaj la samaj pozicioj de la manoj, esprimantaj la saman ideon: la homo preĝanta al Dio.



(a) La preĝanto, eble la Gentokapo, (la ŝamano) kaj la Kreinto (la cirklo kun punkto en la centro estas la universala simbolo de la prezentigo de Dio). (b) la mortinta virino preĝas al la Luno, laŭ la



dikredo de Pelazgoj, por ke ĝi bonvenigu ŝin en la ties diina mondo. (El-Hofra. jc.III antaŭ.Kristo. Costantina, Musée National Cirta Algeria) (7)

En multaj pentraĵoj de la grotoj aŭ en la arkeologiaj objektoj kiel ĉi tiu amuleto (fig.c) nomumita “La Antaŭhistoria Venero”, ni trovas la homon en la grafika formo same kiel ĉe la tradicia vesto de Mirditanino.

La tenado de la manoj, direktitaj al Dio, estas transvivinta en la pentroarto ĝis la tempoperiodo de Mezepoko kaj Eŭropa Renesanco. Difinita kaj ripetita pozicio kontinuece de la manoj, de la piedoj aŭ de la korpo, estas ja simboloj konsistigantaj historiajn atestaĵojn, kiujn oni devas “legi” ĉe la arkeologiaj materialoj, samkiel en la skribitaj dokumentoj. Ili donas nin gravajn donitaĵojn pri la dikredo, agnoskon de la mitikaj figuroj kaj la historian periodon de loĝantaro en la antikveco.

### **La unua konkludo:**

Je grafika flanko ni povas konfirmi ke en la Mirdita ĝubleta estas esprimita homa figure, konjektita al la antaŭhistoria dikredo. En la studaĵo de L. Dano “La Diino Ateno kaj la aliaj kosmogoniaj simboloj”, dediĉitaj al la vesto de la montarana virino de la Norda Albanio, la aŭtorino estas dedektinta stilizitajn figurojn ligitaj al la Pelazgaj mitoj, kiel la busto de Ateno kun noktuj okuloj, ornamaĵoj de la kulto de Meduzo, la svastiko, la drako, la Osirisia okulo, la serpento, la kruco, la skorpio, ka. (8)

Ankaŭ, ĉi tiu homa figuro de la Mirdita ĝubleta, enpensigas nin ke ĝi prezentas miton el la dikredo de la Pelazga Eŭropo. Sed kies Miton portas surdorse la albana montaranino?

## **II. La Diino Birdo aŭ la Granda Diino**

La psikologiisto Karl Jang konfesas ke “La pratempa historio de la homo, en la hodiaŭaj tagoj, riveliĝas tra la simbolecaj aspektoj kaj la mitoj, kiuj transvivis ekde la pratempa homo. (...). Ne estas la eventoj de la historia pasinto tiuj, kiuj ebligas al ni eklerni (pri la pasinto- mia noto), sed la statuoj, desegnaĵoj, la temploj kaj la lingvoj, kiuj kondukas ĉe nin la pratempajn dikredojn”. (9)

Ankaŭ en ĉi tiu materialo, ni neniam havus la eblecon por ekkoni la “vizaĝon” de ĉi tiu portreto kaj la miton kiun ĝi reprezentas, se ne helpus nin la arkeologiaj materialoj, tiuj de la dikredo kaj de la tradicia kulturo.

La plej malfacila parto, kiu malhelpas nin distingi la homan aspekton ĉe la figuro sur la ĝubleta estas ĝuste la parto de la kapo, kiu havas formon preskaŭ triangulan, plilongiĝinta sur la malsupra parto. Kvankam stilizita por brodado sur la vesto, tie evidentiĝas pro la kapa formo, la linioj kaj la diversaj uzitaj koloroj, ke ĝi similas al la arkeologiaj objektoj de la skulptaĵoj de la homo kun birda kapo. En la kapa parto, la foto sube (fig.a) ni vidas tri liniojn kiuj kuniĝas apud la kola parto. La tri verdaj linioj kaj la oranĝkoloro en la renkontiĝa punkto ilia, donas la ideon pri la beko, de la birdoj, translokita antaŭen. Tiu prezentaĵo estas proksima al la vizaĝo de la birda kapo en la skulptaĵo de la virino ĉe Sumeroj (Mesopotamio) (fig.b) kaj ĉe la statuoj de la pratempa Eŭropo, en la studaĵo de M. Gimbutas “Il linguaggio della Dea » kiujn ŝi nomas Diino Birdo.

---

En la foto (fig.c) ni havas la statuon (je 6000 jarojn antaŭ Kristo) el bakita tero kun birda kapo malkovrita en Bardhosh (Prishtina) de Kosovo, je karakterizaĵoj proksimaj homaj. (10)



Ke en la Mirdita ĝubleta temas pri la figuro de virino, tion atestas la geometriaj figuroj kovrantaj ŝian korpon. (ni rakontos pri tio pli sube), samkiel la fakto ke ĝi troviĝas nur en la vesto de la virino kaj ne en la aliaj simboloj de la dikredo, prezentitaj en la vestoj de ambaŭ genroj. La pozicio de la manoj surventre en la skulptaĵoj (fig.b-c)el montras pri la pli malfrua tempo ol la virino kun birda kapo ĉe la ĝubleta. Ili elmontras pri la periodo, kiam la virino diiniĝis kiel “kreanto” de la homo, kio laŭ mia opinio apartenas al la periodo de Mezolito (la fino de la periodo de glaĉeroj ĉirkaŭ la jaro 8000 antaŭ Kristo), en la tempo de la dresado kaj la bredado de la bestoj kaj komenciĝo de la agrokulturo.

Dum la Diino de la ĝubleta ne reprezentas la “kreantan” virinon, sed ĝi estas la Orakolo, diiniĝinta ĉirkaŭ 15 000 jarojn antaŭ la ekuzado de agrokulturo, kaj laŭ la Pelazga dikredo, reprezentas mem la Kreinton surtere. (11)

Ni same ne forgesu ke la unua Kreanta Dio estis la Luno (pli ĝuste la luna Lumo, tial ankaŭ la dikredo de la Pelazgoj estis luneca), kiu ŝanĝis sian formon samkiel la korpo de la virino kiam ŝi estas graveda. Tiel, ĉe la antaŭhistoria homo, kreiĝis la konvinko ke la Luno estis la “naskintinta” virino de la naturo ĉirkaŭanta.

En la antikvaj tekstoj, oni kantis al la Diino Sellena, reprezentanta la Lunon:

“Patrino de la Dioj / de la homoj, de la naturo, patrino de ĉiuj kozoĵ” (12)

Sekve ankaŭ sia reprezentantino surtere, simila al ŝi, estis virino. Ŝi konsideriĝis la perantino inter la homo sur la Tero kaj Dio en la ĉielo. La historio atestas ke la unuaj Orakoloj en la dikredo estis virinoj. Ni rememoru pri Kasandra, la Trojan junulinon sortodivenantinon, filinon de la reĝo Priam, antaŭvidinta la detruigon de Troja.

Johan G.von Hahn rakontas ke la spurojn de tiu tempoperiodo antaŭhistoria, ni trovas ĉe la albanaj virinoj kiuj kredas ke la trian tagon post la nasko, alvenas tri virinoj, nevideblaj, ĉe la beba lulilo kaj difinas la ties sorton. Ĉi tiuj virinoj nomiĝas Fatitoj<sup>10</sup>. (13)

M.Gimbutas, la esploristino de la antaŭhistoria arto konfesas ke: “la statuoj de la maskloj estis nur 2 ĝis 3 % de la arkeologia materialo de la Antikva Eŭropo (...). En neniuj periodo de Paleolitiko troviĝas spuroj de iu kreanta maskla figuro (gepatro). La kreiva forto de la homo, ŝajnas kvazaŭ estas dediĉita nur al la virino, tial tio adoriĝis ankaŭ kiel Granda Diino”. (14)

Ankaŭ la esploristino de la pratempaj dikredoj, Mircea Eliade, konfesas ke la virino okupis centran lokon ankaŭ en la dikredoj de Azio. “la Diinoj, okupas la plejparton ankaŭ en la Panteono de la Dioj de la pratempa Hindio kaj estas sigifoplena la dominanteco de la Granda Diino, en la hinduista dikredo”. (15)...

El la studado de la arkeologia material, kolektita de M. Gimbutas, rimarkeblas ke La “arto” de la unua periodo de la primitiva homo, ampleksanta milojn da jaroj, estas dediĉita preskaŭ tute al la dieciĝo de la virino, kiel la surtera reprezentantino de Dio. “Por la antaŭhistoria periodo mi antaŭŝatas la ties nomumiĝon kiel “Granda Diino”- konfesas la esploristino, ĉar tio priskribas pli klare ŝian absolutan potencon, ŝiajn kreivajn, detruajn kaj regenerigajn fortojn”.

La Pelazgaj mitoj (nomumitaj nejuste grekaj), kiujn ni konas hodiaŭ, ne konfirmas ĉi tiun fakton, kiun ja atestas la arkeologio. Tio montras ke ili estas pli malfruaj mitoj, adaptitaj al la fruaj mitoj, al la maskla figuro, pro la bezonoj de la socio jam ŝanĝinta sian strukturon.

La tradicio de la sanktiĝo de la virino dum la antaŭhistorio estas heredita ĉe la albanoj ĝis la malfruaj tempoj. En la severaj leĝoj de la Kanuno de la Montoj<sup>11</sup> (de Lek Dukagjini) pri la sangovenĝo (la tria libro, la geedziĝo, nodo 23), oni skribas:

Ĉi tiu Kanuno ne ampleksas la virinon, ĉar se eĉ ŝi mortigus kelkiun, “la virino ne kulpas pro sangovenĝo” (ŝi ne mortiĝas, kiel tion ordonas la leĝo pri la sangovenĝo- mia noto). Ĉi tiuj leĝoj estas funkciintaj ĝis la XX jc ĉe la albanoj de la Montaro.

### **III. La simbolo, la malkovro de la antaŭhistoria homo**

La antaŭhistoria homo konis sin kaj la naturon helpe de la komparado de ĉio li vidis kaj aŭdis. Sen ĉi tiu “analizo” pri la diferencoj kaj similaĵoj en la ĉirkaŭanta mondo, estus neeble ekaperi ĉe niaj antaŭintoj la fenomeno de la pensado. Se ne estus apude la aliaj koloroj, sin esprimas la sciencistoj, ni havus neniam la blankan koloron, sen aŭdinte la tondron ni apenaŭ komprenus la silenton. – Do, sen analizinte la diferencojn kaj la similaĵojn aperantaj en la ĉirkaŭanta mondo, la homo plurestus indiferenta al ĝi kaj ne scipovus paroli, sed ellasus nur interjekciojn (la emocia stado de la esprimado), kiel fakte agas ankaŭ hodiaŭ la bestoj.

La vortoj (la nomoj) kreiĝis sekve de la bezono por difini ĉion diversan aŭ similan, troviĝanta en la naturo.

---

<sup>10</sup> Fati- ĉiu el la tri figuroj de la popolaj fabeloj, imagitaj kiel virinoj, kiuj kvazaŭ alvenis ĉe la lulilon de la bebo la trian nokton post la naskiĝo kaj difinis la sorton kaj la futuron de la bebo.

<sup>11</sup> Malnova neskribita leĝaro popola albana, kolektita kaj skribita de Patro Ŝtjefen Ĝeĉovi, komence de XX jc.

Preter la klopodoj por nomumi per interjekcioj aŭ songrupoj la ĉirkaŭantan mondon, je instinktiva maniero, li klopodis sin esprimi kopiante la objekton, imitante la ties formon en la naturo. Do, la figuron ni povas konsideri senerare “lingvon”, esprimanta samkiel la vorto. Ĝuste tiu “lingvo” (per la figuroj) estis decidiga en la materialoj pri la Pelazga dikredo kaj irado de la pensada evoluo de la homo, ekde antaŭhistorio ĝis hodiaŭa tempo. Tio, ĉar la historiaj periodoj estis eksterordinare longdaŭraj kompare al la periodo de skribado kaj multaj arkeologiaj objektoj de la pratempo, estas rezistinta al la tempo, neŝanĝiĝinte.

Ĉi tiu “figureca lingvo” estas la inico de la simboloj t.e. la primitiva homo eklernis distingi la detalon, doninta evidentela esencan karakterizon de la figuro, sed samtempe ankaŭ la ideon ligitan al tiu figuro. Desegnante la mamon, tio esprimis la virinon kaj la ties vivdonan funkcion, farante ondiĝantan linion, li elmontris la serpenton kaj la ideon de regeneriĝo,ka.

Laŭ Cirlot: “La analogio estas eble la fundamenta ŝtono de la tuta simboleca konstruaĵo...La analogio kiel proceso unuiganta kaj ordiganta, aperas kontinue en la arto, en la mitoj kaj en la poezio”. (17)

Kiom da tempo estis bezonita por atingi al la uzado de la simbolo, kiu estas la plej praktika rimedo de la scienco, de la arto kaj de ĉiu alia homa agado hodiaŭ, ni nur povas supozi. La simbolo fariĝis la plej grava rimedo de la inica dikredo. Ĉu la Simbolo kreis la Dikredon kaj la Vorton aŭ la Vorto estis la unua Kreinto, kiel oni diras en la sanktaj libroj, tion ni apenaŭ povas scii. Ili povus esti ankaŭ samtempaj, instigante la evoluon de unu la alia.

La esploristoj de la mitologio kaj dikredo, sed ankaŭ la historiistoj de la lingvistiko, dediĉas tre malmulte da atento al la studado de ĉi tiu esprimiva rimedo (simbolo) de la unua homo eŭropa. “La simbolismo estas antaŭeninto de la lingvo aŭ gesto. Ĝi permesas, se ne la prezentiĝon, almenaŭ la proksimiĝon kaj la difinon de la naturo de la kozoj”. (18)

La esploristo de la simboloj en la lingvo, dikredo kaj modernaj sciencoj, Petro Zhei <sup>12</sup>, konfesas: “La simbolo estas la lingvo per kiu Dio sin esprimas”. (19)

Tio restanta nediskutebla fakto estas ke: La malkovro de la simbolo, de la Dikredo kaj de la Vorto estas verko de la homo kun “vosto” el antaŭhistorio!..

---

<sup>12</sup> Albana esploristo



(a) La geometriaj figuroj de la arkeologiaj objektoj de la kulturo Vinka (5200-4000 jaroj antaŭ Kristo) (b) Geometriaj figuroj atestantaj ke la statuo estis virino, la kvara miljaro. (c) La Diino Birdo, la kulturo Vinka- 4500 jarojn antaŭ Kristo (paĝo 8-12, M.Gimbutas)

En la libro de M. Gimbutas la “Lingvo de la diino” (Il linguaggio della Dea) sur la geometriaj figuroj en la arkeologiaj objektoj de Eŭropo de la Praa Neolito (7000- 3500 jaroj antaŭ Kristo) la aŭtorino riveligas kion do esprimis la praaj simboloj kaj la ties interrilaton unu al la alia. Unuafoje estas faktita, ke ĉi tiuj geometriaj figuroj esprimas la plej praan Diinon el la unuaj Mitoj, nekonataj ĝis hodiaŭ.

Se ni observas la geometriajn figurojn kovrantaj la “korpon” de la Diino – Birdo (la figuro (a)sube), ni distingas la zig-zakon donanta la ideon de la rombo, triangulojn je diversaj koloroj kaj la krucon en la centro, formita de du V kunigitaj en la angulo inter ili. Pli sube la floron / stelon (du krucojn rektangulajn interkrucigitajn) en la kies centro troviĝas bulo, simbolo de memj la Kreinto.

La zig-zako estas ja ripetado kontinue de la geometria figuro V, kaj laŭ la esploristoj, estas la geometria figuro plej malnova ĝis nun malkovrita. La homo de Neandertalo estas uzinta ĝin antaŭ 40 000 jaroj. (20)




a



b

c



(a) La geometriaj simboloj de la kulto de Diino- virino ene de la figuro brodita kiuj ripetiĝas ankaŭ en la aliaj partoj de la ĝubleto. (b) Parto de la arĝentaj ornamaĵoj kie oni povas distingi la saman floron kiel ĉe la ĝubleto, luno kaj zig-zako kiel framon de la cirklo malsupre de la luno.


La geometriaj figuroj, konfesas M. Gimbutas, kolektitaj el centoj da arkeologiaj objektoj, apartenantaj al la kulturoj Kukuteni (Cucuten), Karanovo, Tisza, Bük kaj Vinka, kie V prezentiĝas en la diversaj pozicioj (sole aŭ en la formo de la linio zig-zak, rombo, triangulo, X, M ka.) ŝajnas servi al ununura celo: Speguliĝo de la Diino. (21)

En la Mirdita ĝubleto, en la foto supre (fig.c), ĉe la kapoparto ni havas denove liniojn kunigitaj en la centro ĉe la beko), en la kvadrato (esprimanta la terecan) ene de kiu troviĝas la svastika kaj pli sube ni havas krucon. Ambaŭ tiuj geometriaj figuroj, renkontiĝas ekde la lasta glaĉera periodo, kiel simboloj, esprimintaj la virinon.

En la tempo kiam la masklo- Reĝo aŭ Ĉefpastro- eksidis sur la trono de la Diino antaŭhistoria (en la periodo de patriarĥeco), li ricevis multajn ŝiajn geometriajn figurojn de ŝia kulto. Kiel ekzemplo servas la simbolo de svastika, kies nomon ni ne scias dum la periodo de la inica dikredo Pelazga, kiam ŝi reprezentis la Diinon Birdo. Sed en la periodo de la diina familio de Alban (Alpan) de Ĉamerio<sup>13</sup>, la patro de Zeus, la nomo donita al tiu simbolo respegulis la masklon. (Zeu + estas- Ka, Zeu asht Ka, albane) kaj fariĝis lia simbolo en la mltoj. Tiu ŝanĝiĝo de la “propietuloj” de la simboloj de dikredo, forgesigis ilian unuan sencon kaj ili sin adaptigis al la novaj propietuloj.

<sup>13</sup> Regiono loĝata kompakte de etnaj albanoj nordokcidente de Grekio, apud la landlimo kun Albanio

Tamen, la simboloj kaj la sanktaj virinaj figuroj de la Praa Eŭropo- konfesas M. Eliade- ankoraŭ ne elradikiĝis complete. Ili estis alfiksitaj tiom profunde en la psiko de la homoj, kaj povus malaperi nur post la totala neniigo de la virina loĝantaro. (22)



Sur la foto (fig.a) en la blazono de Arbëreshoj<sup>14</sup> de Italio (1910), super la kapo de la aglino ni havas la simbolon antaŭhistorian V (de la virino), atestanta pri la heredeco de la Luna dikredo Pelazga ĉe la albanoj de la XX jc. Dekstre (fig.b) estas la antaŭhistoria simbolo de la virino -Zig-zako, sur la subjako de la viroj. (Kostumo el Shkodra, P. Marubi 1895-1900) (23)

Pere de la simboloj la primitiva homo estas espriminta la karakterizaĵojn de la Dioj en la Pelazgaj mitoj, kiuj helpis ankaŭ nin por malkovri la antaŭhistorian Diinon ĉe la Mirdita ĝubleta.

### La dua konkludo:

La Diino- Birdo estas la Virino, la unua surtera homo adorita en la inica dikredo antaŭ 30 aŭ 50 mil jaroj. Sed se ni prikonsiderus ke la plej praa “dokumento” pri la uzado de la fajro estas ĉirkaŭ 600 mil jara, malkovrite de Chou-Kou- Tien (24), ni povus diri ke la dikredo aĝas tre pli.

Ĉi tiu Diino, ne menciita en la studoj pri la homa historio, estis la Virino- Birdo komparita al la ĉiela Kreinto, kiu estas ludinta la rolon de la Reĝino, Orakolo kaj La Viva Fonto homa. Mem la dikredo de la Pelazgoj baziĝis ĉe la ina figuro kaj tio esprimiĝas ne nur en la studaĵo de M.

<sup>14</sup> Albanoj fuĝintajn en Italion dum la XV jarcento kaj fondintaj tie kompaktan firman komunumon

Gimbutas, sed ankaŭ en la albana lingvo (pritraktota en alia materialo). Ŝi estis la diino de la montoj, de la ŝtonoj, de la akvo, de la arbaroj kaj de la bestoj, personiĝo de la misteraj fortoj de la naturo (25) kaj estis la unua figuro de la Pelazga dikredo, kreita je homa korpo.

#### **IV- La renkontiĝo kun Dio**

Ĉi tiu sento estas skuinta ĉiam la modernan homon, kiam li eniras la preĝejon, moskeon aŭ aliajn kultajn objektojn. Ĉi tiu deziro estas naskiĝinta ekde dekoj aŭ centoj miloj da jaroj, kiam la homo “kun vosto” ekkredis al supernatura ĉiela Estaĵo, kreinta la naturon kaj lian genton kaj provizanta lin per lumo kaj akvo, kiu vivigis ĉiujn vivaĵojn surtere.

E. Ŝnajder konfesas ke “Pelazgoj kredis ke ĉio okazanta ĉirkaŭ ili, rilatis al la natura forto, ke ilia primitiva menso, ne donis iun materian formon, kiun ili povus nomumi aŭ formigi”. (26)

Iamfoje, per la ĉiela fajro (fulmoj) kaj tiu tera (vulkanoj) kaj la terura akvo (diluvoj), Li neniigis ĉion. La primitiva homo decidis alproksimiĝi kaj “alparoli” al la nevideblulo, alpreĝi por ke Li protektu kaj prizorgu pri lia vivo.

Mi opinias ke antaŭ ol kreiĝu la ideo por ludi la rolon de la “peranto” kun la Kreinto, la senpova homo, lasis tiun taskon (en la mitoj) al la ĉielaj birdoj. Mi kredas ke ĉi tie elfontas ankaŭ la tradicio ege populara ĉe la albanoj, por “legi” sian sorton ĉe la ostetoj aŭ abdomeno de la birdoj. Ismail Qemali<sup>15</sup>, la fondinto de la albana ŝtato en la jaro 1912, estis same bona konanto de la “signoj” ĉe la birdoj. Do ni devas akcepti ke kiel simbolojn, en la Pelazga dikredo servis ne nur la geometriaj figuroj, sed ankaŭ la figuroj el la herba kaj besta mondo.

La esploristoj de la dikredo konfesas ke dum la tuta periodo de la evoluo de la homa socio, kelkaj sanktaj simboloj en la dikredo, estas restintaj senŝanĝoj ĝis la hodiaŭaj tagoj. M. Gimbutas: “Tio kiu mirigas nin, ne estas la ŝanĝiĝo dum miloj da jaroj de la simboloj, kontraŭe ilia kontinueco ekde la periodo de Paleolitiko”. (27)

Tio atestiĝas ankaŭ por la birdo uzita de la praa homo kiam li “kreis” la Diinon- Birdo. Naskiĝas la demando, kiu birdo diiniĝis kaj daŭre estas sankta Simbolo de la Dikredo ankoraŭ hodiaŭ?

Ĉar ni parolas pri la antaŭhistorio, ni baziĝos en la intuicio kaj logika analizo de la faktoj kaj aparte ĉe la rilato al la arkeologiaj objektoj de la pli malfruaj periodoj. Dum la tuta tempo de la praeco, ni konstatas multajn birdojn adoritajn, spegulitajn en la objektoj de la ceramiko kaj surmuraj pentraĵoj kiel: cignon, kolombon, anason, cikonion, pavon, aglinon, ka.

Sed neniu detalo de la kapo de la Diino de la Antikva Eŭropo helpas nin difini, al kiu birdo la prauloj konfidis ĉi tiun rolon.

El la simboloj uzitaj sur la arkeologiaj objektoj, evidentiĝas ke la primitiva “esploristo” rigardis la virinon kiel fonton de la “viva akvo”. M. Gimbutas, bazita sur ĉi tiu fakto, la vizaĝon de la Diino konsideras luitan de iu “akva birdo”, sed ne difinante ĝin per nomo. Ĉar la dikredo rilatas al la Kreinto troviĝanta en la ĉielo, mi pensas ke ne temas pri akva birdo kaj kiel sciite, la kronon de la “reĝino” de la montoj kaj de la grandaj altecoj, tenas nur la Aglino.

---

<sup>15</sup> La unua ĉefministro de la Sendependa Albanio 1912-1913



La nomo de la aglino kaj ne de iu ajn alia birdo, okupas lokon en la Pelazgaj ĉielaj mitoj. Ipero (Ipe= aglino en la subdialekto Ĉama) havas filinojn la Lunon, la Sunon kaj la Aŭroron. Multaj dioj de Olimpo, kiel Zeŭso aŭ Ateno, ofte turniĝas al aglinoj super la batalejoj. Estas raraj la skulptaĵoj de Zeŭso kie li ne havas apude la aglinon, la birdon kiu en la Pelazga dikredo, reprezentas la Animon de la Kreinto surtere.

Same en la vortaro Teosofika de Helena P. Blavatski (H.P. Blavatsky..), oni skribas ke la Aglino estas unu el la plej praaĵaj simboloj. De Helenoj ĝi traktiĝis kiel sankta emblemo de Zeŭso kaj estis la plej alta Dio de Druidoj. Fillone (...) skribis en "Quaestiones et Solutiones in Genesis", ke AIN estas la "Dua Dio kaj lia Saĝeco" (Ain estas la nomo de la Aglino en la subdialekto de Arbereŝoj, albanoj de Italio). (28)

En la unuaj skulptaĵoj de la Dioj (inoj kaj maskloj) de la Pratempo, ĉiuj posedas flugilojn aŭ prezentiĝas kiel aglinoj.

Ni devas prikonsideri ke la dikredo de la Pelazgoj estis Luneca kaj ĉiuj dioj je karakterizaĵoj de aglino, estis Lunecaj Dioj. Ni akceptas kontinue ĉi tiun fakton, ĉar tio ne menciatas en la studaĵoj pri la dikredo en la Pratempo. La germana albanologo Hahn sin esprimas ke Enea estis la reprezentanto de koloniizado Tireno-Pelazga kaj kie ajn li okupis lokon, li disvastigis la kulton pri la Luno. (29)


Dum E. Ŝnajder rakontas ke la Pelazgoj "verŝajne adoradis pli la Lunon ol la Sunon, kontraŭ kiun ili alĵetis siajn sagojn." (30)

Franc Nopĉa: "Ni ne disponas pli multe da donitaĵoj, ke en la iama Albanio la Suno konsideriĝis sankta estaĵo". (31)

Do la "perantino" kun Dio, antaŭ ol ĉi tiun taskon plenumi la homo, estis la Aglino kaj en la pli malfruaj periodoj, la Virino je birda masko (dum la paleolitika periodo), kio estas la unua imago pri Dio je homa korpo. Ĝis hodiaŭ, ni ne konas iun nomumon por ĉi tiu unua Diino de la antaŭhistorio. Mi nomumos ĝin "La Diino Aglino", nomo kiu respondas al ŝia portreto en la inica dikredo eŭropa.

En la pli malfruaj periodoj, ni konstatas ke ĉi tiu Diino, havas la kapon de la virino dum la korpon je formo de la birdo. (figuroj a,b, c sube)

Ĉi tiu detalo esprimas la periodon, kiam en la dikredo oni diinigis la homan kapon (cerbon) kiel la lokon kie troviĝis la senmortebla "spirito".



(32) Perfekta kopio de la Diino Aglino de la historia periodo de la Pratempo, estas la Diino Sellena el la templo de Samotrako (fig.c). Al ĉi tiu luneca Diino oni dediĉis ankaŭ la templon de Dodona. La romianoj, kiuj ne konis la pratempajn mitojn pelazgajn, alportis ĉi tiun skulptaĵon en Romon je la nomo “Viktoiri”, kiel simbolon de ilia venko. Dum la periodo de Justiniano, oni produktis multaj monerojn kie speguliĝis la Diino kun la aglinaj flugiloj, kaj kie oni skribis VICTOIRI (venko).


Per la aglinaj flugiloj, per la ŝia kapo aŭ ungegoj, oni vestis en la praaĵ skulptaĵoj ne nur la figurojn homajn, sed ankaŭ la bestojn, aparte la leonon kaj la ĉevalon. Ni rememoru la ĉiujaran vojaĝon de Apolono en la teron de Ipe- Borealoj. Lia ĉaro tiriĝis de ĉevaloj kun flugiloj aŭ grifonoj (aglinoj / leonoj).



(a) La tablo de Napoleono Bonaparti kun la grifono (aglino-leono). (b) Detalo el arkeologia objekto dediĉita al Dio Marduk, de Babilonio. (33)

Preter la evoluiĝo de la homa socio, kiu alportis la laŭgradan anstataŭiĝon, sed ne entute, de la matriarkata sistemo per tiu patriarkata, la Dioj masklaj (reĝoj, pastroj, leĝdonantoj kaj armeaj komandantoj), same sin “vestis” per la vesto de la aglino, reprezentanto de la ĉiela Kreinto (nun Dio- masklo).

Sur la fotoj sube estas envicigitaj (de maldekstre- dekstren) la Dio Horos de Egiptio, de Sumeroj, Viŝnu de Budhismo kaj de azteka arto per la “kostumo” de la aglino. (34)



Ĉi tiu galerio de la Dioj- la Aglino, atestas pri la ekzisto de Unu inica dikredo, tiu Pelazga, kiu disvastiĝis en ĉiujn kontinentojn, por adptiĝi pli malfrue al la novaj mitoj.

La esploristo Petro Zhei (“la Albana kaj la Sanskrita”) sin esprimas ke la mitika Pensado estas la pensado de la filozofoj kaj de praaj eklezioj kaj estis la sama por la tuta praa kaj prapraa Mondo, samtiel la scienca pensado estas hodiaŭ la sama por ĉiuj popoloj de la Mondo, almenaŭ por la plejparto de ĝi. (35)

### **VL -La Kruco kaj la aglino, la simboloj antaŭhistoriaj en la kristana Eŭropo**

La Kristanismo, post jarcentoj da reformiĝo kaj konstruiĝo kiel novan dikredon, post persekvado de Apostoloj (disvastigantoj) kaj ties subtenantoj, finfine venkis. La imperiestro Teodoso la Unua per la edikto de Tesaloniko (jaro 380) estis proklaminta la Kristanismon kiel novan dikredon de la Ŝtato kaj hodiaŭ ĝi estas la ĉefa dikredo en Eŭropo.

La esploristoj evidentigas ke por popularizi la novan dikredon, en la mitoj kaj la objektoj de la arto, li ekspluatis la simbolojn kaj la figurojn de la Dioj de la praa dikredo Pelazga. Ĉi tiun fenomenon konfesas ankaŭ E. Ŝnajder: “Se la albanoj de ĉiu dikredo respektas fanatikece la altaron de la Preĝejo de la kristanaro, ili faras tion ĉar oni diris ilin ke la altaro de la oferado estas diina, ĉar tie troviĝas sankta ŝtono rememoriganta la adoritan tradicion, la plej gravan kaj plej sanktan ĵuradon”. (La ĵuradon sur la ŝtono- mia noto) (36)

En la legendoj rakontataj de la albanoj, la ŝtonoj estas la ripoj de la Patrino- Tero, el kiuj kreiĝis la homoj.

En la ikonoj mezepokaj prezentiĝas la Sanktuloj kun maskloj kun aglinaj flugiloj, kiuj akiris la aspekton de Diino - Aglino kaj la lunecaj Dioj de la pratempo.






(a) Ikono el la albana Mezepoko. (b) Sur kesteta kovrilo el 13-a jc, ni vidas la simbolojn de la Pelazga dikredo: la aglinon, du grifonojn (leono / aglino) kaj unu el la sanktuloj, kun la aglinaj flugiloj. (37)

Centre troviĝas Kristo kun la libro enmane, esprimanta la fakton ĉar temas pri la dikredo lernita per la libro, diference de tiu Pelazga, kiu estis Natura dikredo, t.e. neskribita, akirita dum la historia evoluo de la homa socio.

Mem la ĉefa simbolo de la kristana dikredo, la Kruco, (du V, kunigitaj je kontraŭaj flankoj) estas la plej praa geometria figuro esprimanta la virinon en Antaŭhistorio kaj pli malfrue la Kreinton. La Aglino kaj la Kruco (du V), kiuj en la antaŭhistoria arto esprimis la Diinon- Aglinon, daŭre estas la ĉefaj simboloj de la dikredo kaj de la socio de Eŭropo en la 21-a jc kaj pli vaste.



(a) La altaro en la ortodoksa preĝejo de Kalabrio, Italio. (b) La Kruco surbruste formita per du V, kunigitaj ĉe la kulmino kaj tri V sube, atestantaj ke ni havas statuon dediĉita al la virino. La kulturo Kukuteni, el la kvina miljaro, M. Gimbutas. (c) La preĝejo Santa Maria Asunta- Fornovo (Pr), Italio. (38)

### **La tria konkludo:**

La plej arĥaika prezentiĝo hodiaŭ de la Diino- Aglino, de la unua homa Orakolo en la dikredo de la praa Eŭropo, troviĝas en la ĝubleto de la virino el la Montaro de Mirdita (Albanio). Ĉi tiu vesto elmontras neigitan miton, kvankam ĝiaj simboloj estas dominantaj ankoraŭ hodiaŭ. Ĉi tiu Diino antaŭhistoria sur la vestoj de la albanoj, elmontras per sia simboleca lingvo al la esploristoj de la historio, ke en la vejnoj de ĉi tiu popolo fluas la sango de iliaj antaŭintoj Pelazgaj, kreintoj de la praa “scienco” de la transvivado: Dikredo.

Fatbardha Demi

[fatbardha\\_demi@yahoo.com](mailto:fatbardha_demi@yahoo.com)

9.08.2014

P.s. Ne ĉiuj Mirditaj ĝubletoj konservas la historian formon. Ne konante la signifon de la simboloj, la brodistoj estas ŝanĝintaj la modelon de la figuro, iamfoje ankaŭ mem la simbolojn.

Notoj:

1- f.122, 126 Afrim Karagjozi “Xhorxh Bajron”Plejad,Tiranë 2010)

2- (a)<http://gazetadielli.com/bajroni-per-shqipërinë-dhë-shqiptarët-sipas-andrë-moruasë/#sthash.vcYvpjj7.dpuf>

(b) Kostumet popullore shqiptare (Albanaj naciaj kostumoj)

3- f.78 Eduar Shnaider « Pellazgët e pasardhësit e tyre » (Pelazgoj kaj iliaj posteuloj) Tiranë, 2009

4- f.104 E.Shnaider po aty

5- (a) ISTORIA DI SICILIA: LA SICILIA PREISTORICA - ARTE NEEL PALEOLITICO E NEL MESOLITICO [www.lasiciliainrete.it](http://www.lasiciliainrete.it) (b) Archivio notizie - Valle Camonica Distretto Culturale [www.vallecamoniacultura.it](http://www.vallecamoniacultura.it) (c) <http://en.wikipedia.org/wiki/Geryon>

6- f.15,17 Mircea Eliade « Storia delle credenze e delle idee religiose. Dall'eta della pietra ai misteri eleusini »Bur Saggi, Milano, 2013

7- (a) WWMM - Breve storia dell'arte rupestre camuna 6/30 [www.wmwm.org](http://www.wmwm.org)

(b) Stele votiva del tofet di El-Hofra. III sec.a.C. Costantina, Musée National Cirta Algeria. Inaugura la mostra &quot; I Fenici in Algeria&quot; notizie.antika.it (c) LA MIA PREISTORIA: VENERI PREISTORICHE [lamiapreistoria.blogspot.com](http://lamiapreistoria.blogspot.com)

---

- 8- Luljeta Dino « Perëndesha Athina dhe simbole të tjera Kozmogonike » , (La Diino Ateno kaj aliaj kosmogoniaj simboloj) botmet Tre Mariat, Tiranë, 2007
- 9- f. 91 Carl Jang « L'uomo e i suoi simboli » TEA, Milano, 2011
- 10- (b) <http://www.dinosoria.com/mesopotamie.html>(c) Dea-zog Prishtinë/Kosovë,terakotë 6000 pk ([www.balkanweb.com/.../rikthehet-nga-gjermania-hyj...](http://www.balkanweb.com/.../rikthehet-nga-gjermania-hyj...))
- 11- f.3 Marija Gimbutas « Il linguaggio della Dea » VĚNĚXA, Roma, 2008
- 12- Maria Rita “I milli volti della Dea”[www.lucyinthesky.it](http://www.lucyinthesky.it)
- 13- f. 207 Hahn Dr. Johan George von Hahn “Studime shqiptare” (Albanesische studien, Jena 1854) IDK.
- 14- f.176 , 316 Marija Gimbutas po aty
- 15- f.219 Mircea Eliade po aty
- 16- f.316 Marija Gimbutas, po aty
- 17- f.75 P.Zhei “Shqipja dhe Sanskritishtja (la Albana kaj la Sanskrita) (pjesa e dyte)”,Tirane, Tertiumdatur, 2006
- 18-f.39 George Dumézil “La religione romana arcaica Miti, leggende, realta” BUR Rizzoli, SAGGI, 2011
- 19- f.58 Petro Zhei po aty
- 20- f.19 M. Gimbutas po aty
- 21- f.11 M.Gimbutas po aty
- 22- f.318 M.Eliade po aty
- 23- Alfred Dalipi “Shqipëria dhe shqiptarët” (Albanio kaj la albanoj) Gent Grafik ,Tiranë.
- 24- f.14 M.Eliadë po aty
- 25- f.111 M.Gimbutas po aty
- 26- f.54 E.Shnaidër po aty
- 27- XIX M.Gimbutas po aty
- 28- Colana Cintamani. Il Glossario Teosofico di Helena Petrovna Blavatsky,Roma
- 29- f.364 J.G. von Hahn po aty
- 30- f.143 E.Shnaider po aty
- 31- f.79 Franc Nopça « Pikpamjet fetare, doket dhe zakonet e Malcise se Madhe” (La religiaj vidpunktoj, la moroj kaj la kutimot de la Granda Montaro) Botimet « Eneas » , Tirane, 2012)
-

- 32- (a) Hyjnesha-Shqiponjë, Antigone Shqipëri( La Diino Aglino, Antigone, Albanio) (b) La tombe d'Inherkhâ - La Vallée des Morts à Thèbes - Loÿor ouest  
<http://www.paperblog.fr/4094866/la-tombe-d-inherkha-la-vallee-des-morts-a-thebes-loÿor-ouest-partie-16/> (c) Perëndesha Sellena. Muzeu i Luvrit
- 33- [Tablets of Destiny](http://en.wikipedia.org/wiki/Marduk). <http://en.wikipedia.org/wiki/Marduk>
- 34- (a) Busti i Horosit, bronz F.231, muzeu i Luvrit, « Egypte Romaine »,Marseille, musée d'Arcéologie méditerranéenne, 1997 .
- (b) Perëndi me kokë shqiponje (Dioj je aglina kapo) “arti sumer”.
- (c) statue in [Bangkok](#), [Thailand](#) depicting Vishnu mounted on his [vahana](#) Garuda, the eagle<http://en.wikipedia.org/wiki/Vishnu>
- (d) <http://www.index.hr/indexforum/postovi/336/meksiko-ljudi-i-ono-oko-njiih/6>
- 35- f.21 P.Zhei po aty
- 36- f.83 E .Shnaider po aty
- 37- (a) Një ikonë e mesjetës shqiptare. <http://www.arte.it/calendario-arte/torino/mostra-tesori-del-patrimonio-culturale-albanese-2604> (b)  
[http://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/thumb/7/7c/CLUNY-Coffret\\_Christ\\_1.JPG/640px-CLUNY-Coffret\\_Christ\\_1.JPG?uselang=it](http://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/thumb/7/7c/CLUNY-Coffret_Christ_1.JPG/640px-CLUNY-Coffret_Christ_1.JPG?uselang=it) Couvercle d'un coffret en ivoire d'éléphant portant la représentation du Christ en Majesté entre les quatre évangélistes. Cologne, première moitié du XIIIe s. Ivoire. Musée\_National\_du\_Moyen\_Âge\_(Cluny)-fr|Anonyme
- (38) (a) [www.calabriaortodossa.it](http://www.calabriaortodossa.it) (b)Kisha Santa Maria Asunta – Fornovo (Pr), Itali  
[http://www.luoghimisteriosi.it/emilia\\_fornovo.html](http://www.luoghimisteriosi.it/emilia_fornovo.html)
- 

## **Artikolo de s-ro Paivo Netto pri internacia tago de muziko**

*La kosmo estas muziko*

<http://www.paivanetto.com.br/index.php/esp/artigo?cm=98724&cs=100>





José de Paiva Netto\*, ĵurnalisto, radiokronikisto kaj verkisto. Li estas direktoro-prezidanto de LBV.

La monatoj oktobro kaj novembro enhavas datojn, kiuj igas nin rememori la geniecon de du el la plej famaj brazilaj komponistoj: Heitor Villa-Lobos kaj Claudio Santoro.

Ĉar je la 1-a de oktobro oni celebras la Internacian Tagon de Muziko. Kaj en la monato novembro, je la 17-a tago, en la jaro 1959, foriris al la Granda Spirita Patrujo la rekonata, naskita en Rio-de-Janeiro, Villa-Lobos. En la 220-a eldono de la revuo *Bona Volo*, mi omaĝis lian memoron. Ankoraŭ en novembro, je la 23-a tago, sed en la jaro 1919, naskiĝis en la urbo Manaus Claudio Santoro, kies "Simfonio de Paco" — kiun oni sonregistris sub lia direktado, fare de Ŝtata Orkestro kaj Koruso Stepanov, en Moskvo, Rusujo — malfermas mian predikadon pri la Evangelio de Jesuo per Supera Reto Bona Volo de Komunikado.

Kiel admiranto de la geniuloj de tutmonda kulturo kaj rekonante ĉe muziko transcendan rolon por plialtigo de la homo, ĉiam kiam eble mi uzas la melodiotrezoron por starigi analogion inter tiu kaj la diaj aŭguroj, kaj tiel mi faciligas la komprenon de la popolo koncerne la ŝajne nedeĉifreblan kodon de la Apokalipso de Jesuo. La verkisto kaj literaturkritikisto José Geraldo Nogueira Moutinho, en la verko "Musicália" klarigas, ke "muziko ensorbas kaj ordigas la ĥaoson".

En la verko *Apokalipso sen Timo* (1999), ĉapitro Apokalipso kaj universalismo, mi komentis, ke Arturo Toscanini instruadis, *mutatis mutandis*, ke aŭskulti muzikon ne estas aŭskulti muziknotojn. Fakte, ĉar ĝui la grandan arton de Verdi, Tchaikovsky, Wagner, Borodin, Schumann, Debussy, Ravel, Grieg, Sibelius, Irving Berlin, Gershwin, Grofé, Chiquinha Gonzaga, Noel, Cartola, Caymmi, Jobim, João Gilberto, Caetano, Gil, Chico Buarque, Toquinho, Guerra Peixe, Carlos Gomes, Pastro José Maurício, Francisco Braga, Lorenzo Fernandez, Augusto kaj Alberto Nepomuceno, Guerra Vicente kaj multaj aliaj, estas integriĝi en la senton de la melodia mesaĝo, kiun la komponisto deziris transdoni al la aŭskultontoj.

Tiel estas rilate la Apokalipson, ĝia sciigo ne troviĝas ĉe la literoj, "*kiuj mortigas*", sed ĉe la spirito de savado, kiu, per la amo de Tiu, kiu fratece admonas, malsuprenvenas de la Kreanto al la kreitoj.

### **Por kio ekzistas la Dia Mesaĝo**

Kion mi klopodas elstarigi, okaze de la ekumena predikado pri la Evangelio-Apokalipso, tio estas la ero de Dio kiu estas en ĉiu homo, sendepende de tio, ĉu li

estas religiema aŭ ateisto; flava, blanka, nigra aŭ mestiza; civila aŭ militista; analfabeta aŭ klera; politike maldekstrema, dekstrema aŭ centra, aŭ eĉ senpartia.

Se la homo ne serĉos solidarecon ĉe lia privata aŭ kolektiva kunvivado, do kien ni iros?

La kosmo estas muziko, kiu, laŭ la difino de Paul Claudel (1868-1955), *"estas la animo de geometrio"*. Sekve, ni devas trovi tiujn sonojn, kiuj per universala atingopovo kunfratigu nin. Por tio ekzistas la Mesaĝo de Dio, kiu fronte kontraŭas la nepardoneblan maltoleremon.

### **Trumpetoj kaj komponistoj**

Ankoraŭ en tiu menciita verko, en la ĉapitro "Trumpetoj kaj komponistoj", mi atentigas, ke ĝis nun ekzistas homoj, kiuj ekkrias: "Apokalipso estas malamo de Dio al la Homaro!". Ĉu ili pravas? Ni konstatos, ke ne.

Ni iru iom post iom: kion diras antikva saĝo? *"La penso estas tajloro de la destino"*.

Per niaj ideoj kaj agoj, ni fine senvualigas nian intimecon. Jesuo, la Ekumena Kristo, tio estas, Universala, Dia Ŝtatestro, deklaras ĉi tion en la Evangelio laŭ Luko, 6:45: *"Bona homo el la bona trezorejo de sia koro liveras bonon, kaj malbona homo el la malbona trezorejo liveras malbonon; ĉar el la abundo de la koro parolas lia buŝo"*.

Fronte al tio, kiam la Anĝeloj de Sep Trumpetoj, kiuj, laŭ simpla analizo, signifas politikajn kaj militemajn-politikajn faktojn, sonigas ilin, ili ne faras tion senkriterie. Ili esprimas tion, kion la Sep Sigeloj (Apokalipso, ĉapitroj 6 kaj 8) elmontris rilate nian senton, esprimitan per muzikpartituro, kiun ni komponis per niaj agoj. Ni produktis la melodion tragikan, aŭ belan, kiun la Anĝeloj sonigos. Apokalipson do ni mem verkas, kiam ni respektas aŭ malrespektas la normojn de la Kreanto.

En la verko *La Dia Komedio* — Paradizo, Kanto XXII —, Dante Alighieri (1265-1321) poezie ilustras la justecon de Dio: *"Neniam hastas la ĉiela glavo, / nek malfruas, krom laŭ la opinio / de tiu, kiu ĝin elvokas aŭ timas"*.

Siavice, la ĵurnalisto, radikomunikanto kaj poeto Alziro Zarur (1914-1979), fondinto de Legio de Bona Volo, deklaris: *"La Dia Leĝo juĝas la pasintecon de homoj, popoloj kaj nacioj, kaj determinas ilian estontecon."*

### **Rajtoj, devoj kaj Apokalipso**

Se ni pensas nur pri rajtoj kaj forgesas devojn, morgaŭ oni postulos de ni repagon pro devoj kaj oni forgesos niajn rajtojn.

Ni ne volu, ke la Ĉiela Patro traktu nin kiel infanojn, kiam ni postulas la staton de plenaĝuloj. Jen ĉi tie estas oportune rememori la penson de la franca verkisto Martin Du Gard (1881-1958): *"Ne eblas vera ordo sen Justeco"*.

Memkompreneble, koncerne la dignajn agojn, kiujn ni faros, la Apokalipso proponos belegajn komponaĵojn por tiuj, kiuj meritos ian pli bonan mondon en la jarmiloj, kiujn ni konos estontece. Ni ĉiam vivos, ĉar la eterneco estas reala kaj la leĝo de sinsekvaj vivoj estas dia ordono. Zarur esprimis la jenan koncepton: *"Reenkarniĝo"*

*estas la ŝlosilo de profetado".*

Necesas do harmoniigi la korojn de la popoloj kun la agordo de Dio.

---

**\*José de Paiva Netto**, verkisto, ĵurnalisto, radikomunikanto, komponisto kaj poeto, naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Ĵanejro, RJ, Brazilo. Li estas Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI Inter), de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Beletra Akademio en Centra Brazilo, de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj en Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Verkistoj en Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Radikomunikistoj en Rio-de-Ĵanejro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).

## Diplomato kaj verkisto

### *Mallonga rigardo al la albana kazo*



La ideo por priesplori la albanan kazon de diplomato-verkisto aŭ verkisto – diplomato, naskiĝis ĉe mi ne nur ĉar en la internacia praktiko tia fenomeno estas jam turniĝinta en regulon preskaŭ instituciigintan, sed ankaŭ ĉar enlande mankis tia studaĵo.

Kio do reprezentas la albana kazo ? Alivorte, kiel ni povus kompreni la reciprokan influon de la politika kulturo kaj verkada spirito sub la prismo de la diversaj politikaj reĝimoj en Albanio, ĉu dum monarĥio (je antaŭeco la nacian aferon), dum komunismo (uniformigita, monolita kaj totalisma pensado), hodiaŭ, dum parlamenteca respubliko (disiĝo de la kultura diplomatio disde la propagando, ks).

La temo meritas plurplanan studadon, historian, sociologian, kulturen ĝis tiu « genealogian ». Se ni referiĝas al la ekzemploj historiaj, nin okupigus per subjekto retrorigarda sed ankaŭ antaŭnrigarda, ĉar ankaŭ mem la tipologio de la verkisto- diplomato estas vasta, do ne ekzistas unika portreto. Pli multe temas pri retuŝitaj siluetoj, elstariĝintaj el la pintoj de la monda beletra de kalibroj Nobelo, tiaj kiaj Chatobrian, Stendal, Saint John Perse, Romain Gary, Paul Morand, Paul Claudel, Malaparte, Seferis, Ivo Andriĉ, Neruda, Migel Anhel

Asturias, Czeslav Milosz, Carlos Fuentes, Roberto Echeverria, Gabriela Mistral, Octavio Paz...

Ne malpli gravaj por la nacia kulturo estis la personecoj de la albana kultura korpuso invititaj por fariĝi parto de la diplomatia trupo de la albana ŝtato ekde la ties naskiĝo, komencante kun Faik Konica (la profeto de la albana diplomato..), Eqrem Vlora, Jusuf Vrioni, Misto Treska, Javer Malo, ĝis la hodiaŭaj tagoj kiel Teodor Laço, Besnik Mustafaj, Neritan Ceka, Luan Rama, Agim Isaku, ka.

La fenomeno verkisto- diplomato konis siajn evoluojn kun la paso de la tempo, kio helpas por kompreni la ideologiajn kuntekstojn, la interplektiĝon de la historio de la albana beletro kun la internaciaj rilatoj, praktikoj kondiĉitaj de la la antaŭecoj de la albana diplomatio dum la mallonga historio de la ŝtato (antaŭeco al la nacia afero, tiu ideologia, ekonomia, kultura aŭ de la imaĝo..)

Tio ankaŭ pro la fakto ke la periodoj de la profundaj ŝanĝiĝoj de la strukturoj de la sistemo kaj de la internaciaj rilatoj inkluzive de la politiko de la homaj resursoj surkampe de la diplomatio estis akompanitaj per notindaj ŝanĝiĝoj de la praktikoj kaj de la diplomatia aparato je ŝanĝiĝanta rapideco je reago. Sekve, tiel kiel ie ajn, en diversaj tempo kaj landoj tiu tendenco estas difinita de la specifaj antaŭecoj de ĉiu lando, do se la imaĝo de la certa lando sin apogas en la kulturo aŭ politiko, ĉar oni akceptas ke la diplomatio estas ne nur la protektado de la strategiaj interesoj aŭ komerca akcio, sed ankaŭ vektoro de la reprezentado de si mem, de certa sistemo je valoroj kaj de iu imaĝo.

Kion subkomprenas la etiketigo verkisto- diplomato? Kiam kaj kiel oni uzis tiun terminon unuafoje? Ĉu ekzistas la statuso verkisto- diplomato?

Rilate ĉi lastan, irante iutage tra Parizo sur la strato kie loĝis la nobelista diplomato Romain Gary, la Urbodomo de Parizo estis algluinta sur la ties pordo rememorigan platon kie, preter la nomo, tago de naskiĝo kaj la morto, estis skribite "Verkisto- Diplomato".

Sed en la diplomatiaj traktaĵoj ne ekzistas ia oficiala statuso diplomato- verkisto.

Oni akceptas ke la karia diplomato scipovas gvidi internacian dialogon respektante la procedurojn kaj la solenaĵojn. Li scipovas gardi la ŝtatan sekreton. Diference de li, la verkisto klopodas plaĉi al vasta publiko kvankam ofte sin trovas kontestante, malgraŭ prudente, la establitan socian ordon.

La kontraŭdiraj restriktajoj de ambaŭ tendencoj, pli konkuremaj ol konvergemaj, konkordiĝas en la momento kiam la etoso de la verkisto koncentriĝas sur la originaleco, dum tiu de diplomato sur profesieco. La sperto atestis ke la verkisto- diplomato akiras la legitimecon de la diplomato nur kiam li proprigas al si la diplomatiajn praktikojn, do ne pro la superpozado de la identecoj, sed maskante la ceterajn identecojn.

« Mi scias ke diplomatio estas scienco, sed mi klopodis praktiki ĝin kiel arton »- skribas la verkisto- diplomato Paul Morand (En *veillant Philippe Bethelot*, Editions du ond des Champs *Elysée*, p. 194)

Kia ajn estu la termino diplomato- verkisto aŭ verkisto- diplomato, la kunmetado de ĉi tiuj profesioj (aŭ vokacioj) estis jam objekto de disputadoj en la internaciaj kancelerioj. Malgraŭ la diferencoj (la verkisto je rajto de emocioj, diplomato imunigita de ĉi tiu sentimento, aŭ diplomato ema por moderigi kaj kompromisi, dum la beletro kiel libera agado de la spirito), la monda sperto estas elmontrinta ke la diplomato kaj la verkisto povas kunekzisti harmonie,

en kunmiksaĵo dukapa agnoskante kaj respektante la reciprokajn funkciojn, ĉar ili havas komunan taskon : atesti. La verkisto- diplomato kiel engaĝita atestanto, dum la kariera diplomato disigita atestanto.

Ekde ĝia origino la praktiko de ampleksiĝo de la kulturaj personeculoj en la diplomatio renkontis kontraŭstarojn kiel flanke de la administrantaj institucioj tiel de mem la speco de la verkistoj.

Kariera diplomato bone scias kie estas sia loko, dum la verkisto- diplomato balanciĝas inter sendependeco de la pensado aŭ subiĝado al la hierarĥio kiu estis difininta lin.

Ni ne scias ĉu bone imagis sian lokon tiaj personeculoj kiel Faik Konica aŭ Eqrem Çabej<sup>16</sup>, dum multaj konatajn verkiston « trafis malbono » pro la diplomatia kariero, kiel la italon Malaparte, kiu kuraĝis kontraŭstari al Mussolini, ĉi lasta maldungis lin ene de 24 horoj, aŭ la laŭreato de la premio Goncour, Jean- Victor Ruffy, ambasadoro de Francio en Senegalio, kiu ne konsentis sekvi la oficialan linion de sia lando kaj kvankam ege preferita kaj proponita de la prezidento Sarkozy, lin la sistemo de la franca administrantaro ne hezitis forĵeti, same, de lia posteno.

Laŭ grandparto de kontestantaj opinioj, temas pli multe pri “orgojleco kaj mitika pozado, de kvazaŭ nekonformisma mitologia kreanto, je kondutoj de verkisto, kiu pretendas sin prezenti kiel aparta figuro en la moderna socio, sed fakte estas ja individuoj je duobla personeco kiuj ne trovas aŭ ne povas difini sian rolon en la vivo”. (*Gisele Sapiro, 2001/1, « De l’usage des categories de droite et de gauche dans le champ litteraire, « Societes et representations, p.19-53)*

Por la turka nobelisto Orhan Pamuk : « La verkisto devas stari separate disde la burokratia vivo, eviti la instituciojn, la ŝtaton, iun ajn ordinaran familian vivon, rigardi al la sukceso kaj beletra famo suspekte. (*Konferenco en la universitato de Ruen, 17-an de marto 2009).*

Aliflanke, ne mankas ankaŭ la atakoj aŭ « seniluziigoj » de mem protagonistoj verkistoj- diplomatoj pro sia diplomatia kariero.

### *La albana kazo*

Inter tri kategorioj de la diplomato- verkisto, aŭ rigardite laŭ tri koncentrigaj cirkloj: diplomatoj skribantaj kaj publikigantaj beletrajn verkojn, tiuj inspiritaj en siaj verkaĵoj de la landoj kie ili deĵoras kiel diplomatoj, kaj tiuj kiuj en la sino de ĉi lastaj skribas pri la diplomatia akcio en si mem, Albanio ofertas aŭ sin distingas en ĉiuj tri kazoj.

La demandoj naskiĝantaj post ĉi tiu mallonga eksponado estas multaj.

Ĉu Albanio havas kontinuan tradicion de la kunmiksaĵo verkisto- diplomato, do ĉu oni povas konstrui genealogion de la albana kazo ? Se jes, kiam tio estis pli evidenta ? Kiaj estas la logikoj kaj cirkonstancoj dominintaj en la numumado de la ambasadoroj el la kampo de la kulturo : interna promociigo de la kariero, oportunista dungado, ekstera simboleco aŭ enkarniĝo de politika simbolo ?

Kiel estis la raporto de la politikaj motivoj kun tiuj kulturaj de ĉi tiuj nomumoj dum la diversaj epokoj ? Ĉu la proponoj alvenis de la Prezidentejo- Konsilio de Ministroj aŭ de la Ministerio de la Eksteraj Aferoj ? Kiel estas reaginta la diplomatia klasika trupo pro ĉi tiuj nomumoj (provizora, fremda trupo, eksterleĝa geedziĝo ?). La sperto atestis ke por la

---

<sup>16</sup> Albanaj eminentuloj

diplomatia institucio, ofte la nomumo de la verkisto kaŭzas internajn tensiojn. « La Ministerio de la Internaj Aferoj malamas la gloron ekster la oficejoj »- diris Stendal. Estas akceptite ke la ideala funkciulo surkampe de diplomatio estas tiu kiu scipovas enkarnigi samtempe la politikan potencon kun tiu administra, alivorte tiu kiu sin distingas de eksterordinara senso de la publika intereso. Sekve naskiĝas la demand, ĉu mem la verkistoj aŭ la albanaj personecoj de la kulturo estis ampleksitaj en la diplomatio kiel membroj de la kultura elito, aŭ kiel komforta vivstilo, kiel gusto de konado de la mondo, allogo al ekzotiko aŭ kiel privilegiaj aktoroj de la globala historio? Alidirite, la bezono por estis finance sendependaj, aŭ por doni al la kariero beletran kolorigon?

(“Ne ĉiuj ambasadoroj fariĝas verkistoj sukcesantaj publikigi kaj ne ĉiuj diplomatoj publikigantaj estas ambasadoroj”- skribas Rummelhardt).

Kiuj estas la konvergoj kaj divergoj de la plenumado de la misio flanke de tiu diplomata tavolo? Kiuj estas la kazoj kiam la verkisto kaj la diplomato estas kunvivintaj en perfekta harmonio ne intermiksinte la respektivajn funkciojn, kiam oni agnoskas ke la klasika diplomato donas vuzion, taksadon, siajn rekomendojn transpasante la pasiojn kaj emociojn per neŭtrala stilo, sen artifikoj kaj beletraj ornamigoj samkiel proponas pozicion je la nomo de la ŝtato kaj sia lando.

Kiom estas profitinta aŭ estas “trouzinta” la tavolo de la diplomatoj- verkistoj per la tiel nomata sendependeco de la pensado aŭ reputacio eskter la diplomatiaj oficejoj en la ambaŭvalora raporto kun la kariero, laŭ tio kio nomiĝas “komplekso- kameleono”?

La diplomatia historio riĉas je negativaj kulminoj tiurilate. La nobelista diplomato Ivo Andriĉ dum la renkontiĝo kun la grafo Ĉiano<sup>17</sup> proponis al li, pli malpli la disdividon de Albanio inter Italio kaj Jugoslavio kaj la translokiĝon de la islamaj albanoj al Turkio. (*Bogdan krizman: 1977, L'analyse du Dr Ivo Andriç sur l'albanie de l'anne 1939, vol 2, Zagreb, P.77-89*)

La supraj demandoj konsistigas inviton al la serĉado kaj profundaj esploroj pri ĉi tiu fenomeno, pri kiu oni akceptas same ke ekzistis notinda komunika defecito.

Por skizi la tipologion de la albana kazo, en ĉi tiu publikaĵo estis konsiderita ke pli da intereso estus ekrigardi al la apartaj kazoj kun la karakterizaĵoj kaj spertaĵoj el la dungado de la verkistoj en diplomatio ol kontraŭe, tio estas kiom da diplomatoj de la kariero estas skribintaj memoraĵojn, vojaĝnotojn aŭ historiajn studaĵojn surkampe de diplomatio. Kun la ideo ke la individuaj apartecoj riĉigas malrekte la diversajn paĝojn de la diplomatia albana prismo. Prikonsiderinte la mallongan historion de la ŝtato rezultiĝas ke la bilanco aŭ la albana kazo apenaŭ postrestas tiun eŭropan aŭ tutmondan. Kvankam ne firmita kiel institucia tradicio, la albana diplomatio estas koninta plurajn sukcesajn historiojn, kiam la kreiveca arto, la verkado okupis lokon en la mondo de negociadoj diplomatiaj, kiel en la nivelo multflanka tiel en tiu duflanka.

Ekde la fondiĝo de la albana ŝtato la kunekzistado inter du « metioj » estis kontinua establinte harmonian interrilaton inter la lingvo kaj la realo, transforminte ĝin en tradicion preskaŭ instituciigitan.

Pli ol afero de konjunkturoj, politikaj bezonoj aŭ politikaj nomumoj, ĝi evoluis aŭ estis firmigita kiel speco de regeneriĝo de la diplomatia trupo, do kiel afero de strukturo de la

---

<sup>17</sup> La ministro pri la eksteraj aferoj de Mussolini

diplomatia aŭ vidita simple kiel praktiko de la kultura politiko. Alidirite, pli ol regulon, ol escepton.

Oni povas diri same ke la ampleksiĝo de la verkistoj en la albana diplomatia ne celis kompensi iun mankon de kompetentoj aŭ estas kontribuinta en la transformiĝo de la diplomatia trupo. Eble la kontraŭo estas vera : la kultura dimensio estas plifortiginta la memamon de la diplomatia trupo kaj estas ilustrinta la simolan dimension de la politika akcio. Ĝenerale, la kompromiso estas farita en tiuj kazoj kiam antaŭe la kultura diplomatia.

Tamen oni devas diri ke plejfoje la numumado estas farita surbaze de la individuo kaj ne laŭ projekto kaj ke la kriterio de la konjukturo dominantas al la klasika praktiko de la administra strukturo.

La observita fenomeno kun siaj regulecoj kaj nuancoj, permesas al ni rigardi amason de miksitaj praktikoj ĝis tiu grado ke la internaj dividlinioj ne malhelpas la identigon de la ekzisto de grupo praviganta la miton pri la ora aĝo de la verkistoj- diplomatiaj, kiel okazis dum la jaroj 90 kiam oni ampleksigis ondon de beletraj talentuloj kaj elstaraj personecoj kulturaj kiel V. Zhiti, V. Muçi, I. Zhupa ka.

Tiel kiel en la mondo, la albana fenomeno sin apogas sur la apartaj kazoj kiuj estas invititaj aŭ estas aplikintaj konforme al la politikaj konjukturoj aŭ diplomatiaj prioritatoj.

Konsiderante kazon post kazo por ĉiu el ĉi tiuj nomumoj, la terminoj kaj la praktikoj estis ŝanĝiĝeblaj unu de la alia.

Kiel tion ni vidos ankaŭ en ĉi tiu publikaĵo, se realiĝus sociologia enketo kial verkisto, historiisto aŭ esploristo albana estas preferinta sin engaĝi en la diplomatiaj funkcioj : pro motivoj klasikaj diplomatiaj, aŭ honorigo pal la diplomatiaj institucioj, rezultiĝas ke ĉiu individuo havas sian recepton.

Kaj pli konkrete, el la empiria esplorado de la dokumentaro rezultiĝas ke pli multe ol la duono de la albanaj diplomatiaj dum la tempo estas publikiginta po unu libro, el kiuj dekono apartenas al beletraj verkoj kaj ke la albanaj eksteraj ministroj ne estis malamikaj al tiu emo. Sufiĉas ke ni referiĝu al la toleremo al antikonformismo de Konica preferinta iun modelon diferencajn je la vivmaniero, sen konfuzecon de ambaŭ aktivecoj, sen timante pro la distingeco inter la kolegoj, vivmaniero, kutimoj, sendependeco de la personeco.

Laste, oni povas supozi ke inter la antinomo : akcio- kreado, por la verkantaj albanaj ambasadoroj la diplomatia estas perceptita pli multe kiel akcion, ol kiel observadon, karakterizaĵo ĉi tio por la karieraj diplomatiaj.

En la hodiaŭa tempo de la publika diplomatia kiam ambasadoro ne plu estas aktoro de la mondan akceptoj aŭ de la politika informado, sed subtenanto de la ekonomiaj entreprenoj kaj faktoro de la disvolviĝo de la kultura ĉeestado naskiĝas la demando ĉu kontinuos la heroo de la diplomatia- verkisto survivi en la digiteca erao ?

Laŭ Stanisslas Jeanesson, « La teknologiaj revolucioj povas servi kiel salttabuloj novaj de la diplomatia vorto, kiu devas entrepreni la unuan funkcion de la komunikiĝado. Aliflanke « Wikileaks aŭ la Valizo de La Hispana ambasadoro » elmontras nin ke kelkaj beletraj aspektoj estas rifuĝantaj en la diplomatia korespondo, certigante rekordojn en la vendado. Disvastiĝo amase de la sekretoj, manipulado de la onidiraĵoj, falsaj konfidentaĵoj rezultiĝas hodiaŭ en la mondo kiel fontoj de inspirado por la beletro bazita sur la realo, aŭtenteco. La diplomatia estas tiom ligita al la evoluoj, trompoj, dramoj kaj esperoj kiuj daŭre provizos



homan kontingenton de la paperoj. Oni suspektigas mem la epokon de la suspektado.  
(*Stanisslas Jeanesson, 2009 Diplomaties en renouvellement. Cahiers de l'IRICE, nr 3, p.129*).  
Sendepende de tio, hodiaŭ oni povas diri ke la perspektivo de la diplomatio kaj la novecoj de la albana diplomatio pri la plilarĝigo de ĝia kampo en la diplomatioj kultura, ekonomia, multilatera, publika, estad diktante ankaŭ la bezonon ke la beletro kaj diplomatio plifirmigu la terminojn de la interrilatoj novaj permesantaj kontinui la aktivan partoprenon en mondo rekompostata.

Ylljet ALIÇKA  
Eksa diplomato- aŭtoro

### **Afrore Shaipi**



## **La Beno de Papo**

La Papo povus elekti iun ajn okcidentan ĉefcentron je katolika plimulto, sed ne! Li decidis alveni en la "landon de la agloj"! Li elektis Albanion, la unuan landon vizitota, pro la ties suferinta komunisma pasinto kaj pro la brila konekzistado interreligia.

Tiel oni prezentis la novaĵon pri la alveno de Papo Franĉesko en Tirana kaj ĉe albanoj eksplodis la entuziasmo!

Tre baldaŭe oni komencis la rekonstruiĝon de la placo "Patrino Tereza", la bonordigon de la stratoj "videblaj" de la ĉefurbo, la polico transpasis en la speciala pretpreteco ofertante pli da sekureco, ankaŭ la sanservo ...tian entuziasmon delonge oni ne rimarkis en Albanio. Tio des pli veras ke mirinde, unuafoje, tio unuigis la politikon enlandan. Registaro kaj opozicio, klopodadis ke dum kelkaj tagoj, honore al Papo Franĉesko, igi Albanion tiel kiel ne faris dum unu jaro la ties civitanoj.

La alveno de Papo rekompencis la civitanojn! Albanio, kvankam eta lando, malriĉa kaj suferinta sukcesis realigi majestatan akcepton al homo de granda aŭtoritateco!

Tirana aspektis tiun tagon pli bela ol iam ajn, kun tiuj centoj da miloj da civitanoj sur la bulvarado "La Martiroj de la Nacio".

Ili aspektis pli noblaj, pli malavaraj, pli gastamaj kaj pli civilizitaj ol neniam antaŭe. Albanio aspektis forta kaj stoika kun la portretoj de 40 ekleziuloj-martiroj pafmortigitaj de komunistoj kies grandaj fotoj pendis sur la banderoloj super la bulvarado. La interreligia kunekzistado estis viva, tuŝebla kaj impresema kiam oni vidis la estrojn de islamanoj, ortodoksuloj kaj bektaŝioj alvenintaj okaze de la Meso de la katolika Papo.

Kaj dum ĉi tiu historia Meso, okulfrapis ankaŭ politikistoj, sidantaj unu apud la alia, sendepende de iliaj konvinkoj kaj partioj. Kvankam falsaj kaj hipokritaj en la okuloj de la mondo, estis bone ke ni vidis ilin tie, kune. Estis arĝintaj ĉiuj por aŭskulti kion eldirus Papo.



Ni esperu ke la paroloj kaj preĝoj de Papo estu kortuŝintaj kaj konscienciigintaj ĝuste la korojn kaj mensojn de tiuj sidantaj sur la unuaj vicoj, politikistoj kaj poste ankaŭ de la ceteraj.

Kiom bone estus se ni komprenus ke tia interreligia kunlaboro devus sekvati ankaŭ de politika kunlaboro! Tiam ni ne bezonus la "vizitojn" de Papoj por ekvidi la restaŭradon de la placoj kaj stratoj, bonajn servojn de la polico kaj sanservo, sed tiun pecon de Albanio, kiel ĝi prezentiĝis surekrane la 21-an de septembro, la civitanoj devus senti ĉiutage.

La majesteco de tiu historia vizito konsistis en la paroloj de Papo. Li aprecis la "solidarecon, toleremecon kaj interreligian harmonion" ĉe albanoj. Same li esprimis respekton por la viktimoj de diktaturo kaj suferoj de albanoj dum la pasinto. Lia konsilo por la albanaj gejunuloj, plektita tiel bele kun la simbolo de nia nacia flago, estis tre signifoplena: "La aglo flugas alte, sed neniam ĝi forgesas sian neston". Poste lia bonaŭguro por paco al nia nacio, ege varmigus la korojn de albanoj. Liaj konsideroj por nia popolo "nobla kaj martira", ŝajne estis plej belaj kaj sinceraj iam diritaj de iu alta fremda personeculo. Tial ĉiuj albanoj, sen religiaj distingo, estas dankema al Li! Albanoj delonge akiris malbonan reputacion ĉe la fremdaj medioj. Ĉi lastaj sin fokusigis plie en la "pliigo de la altaj sekurecrimedoj, pro granda danĝero" kaj en la esprimo de Papo ke "oni ne devas mortigi je la nomo de Dio", per kio Li subkomprenis la teroristajn grupojn enmonde.

Cetere la medioj publikigis fotojn kie aperis kristanoj kaj islamanoj atendante Papon, sloganoj "Mi volas Biblion kaj Koranon, ĉar mi estas albanoj", esprimantaj la interreligian toleremon ĉe albanoj. Fakte Papo konsideris tion pli ol toleremo, frateco.

Ege gravas ke ĉiuj mondaj medioj koncentriĝis en Albanio almenaŭ dum unu tago! Revenante en Italion, Papo deklaris al la ĵurnalistoj en la aviadilo: "Albanio estas eŭropeca lando, kvankam ke islama plimulto. Estas ĝi eŭropeca pro ĝia kulturo kaj pro la kulturo de interreligia kunekzistado jam heredita" Tio certe estas la plej bona aprecaĵo farita iam ajn por albanoj. Tio elmontras nian identecon, kiun oni devas prezenti al la mondo, kaj kion niaj politikistoj ne faras.

Eble la plej bona beno de Papo por Albanio estis tiu bela panoramo pri Albanio dum la 21-a de septembro!

(La aŭtorino estas studento en la Universitato de Priština- Kosovo)



Papo renkontiĝas kun la estroj de la islama, ordodoksa beктаŝia, katolika eklezioj en Albanio





Papa akceptiĝas varme de albanoj

## Ni kondolencas

### Forpasis s-ro Andrzej Grzebowski



Dum la UK Bonawero



Novaĵo malĝoja venis tra Fejsbuk-o hodiaŭ, kiam s-ro Nejn Bronstein anoncis ke li atestas pri la morto de Andrzej Grzebowski en la sonĝo en hotelo en Bonaero, kie ili ambaŭ partoprenis la UK ĉijare.

Andreo estas, ekde longe, tre konata en nia movado. Finstudinte pri historio, li ekde junaĝo sin okupis pri Esperanto. En la jaro 1991 li fondis privatan altlernejon ISKT (Internacia Studumo pri Kulturo kaj Turismo). Mi eksciis pri ĝi pli poste, ĉirkaŭ la jaro 1996, kaj tuj varbis dekojn da albanaj studentoj al tiu lernejo, des pli ke tiam (la jaro 1997) Albanio trapasis malfacilan periodon kaj ankoraŭ la

liberaliziĝo de vizoj ne efektiviĝis. Jaron poste, Andreo venigis en Albanion grupon de poloj kaj renkontiĝis persone kun la gepatroj de la niaj gestudentoj. Mi mem, tiun septembron, akompanis grupon de gestudentoj al Bydgoszcz kie Andreo faris plejeblon por akcepti nin digne. Ĉikaze ankaŭ mi, dum semajno, prelegis pri Albanio antaŭ la polaj gestudentoj. Mi vizitis Bydgoszcz duan fojon en la jaro 2007, denove ĝuante la gastamon de Andreo mem kaj de liaj kunlaborantoj.



Grupo de la albanaj gestudentoj en aeroporto de Tirana antaŭ vojaĝi al Pollando (jaro 1998)

Aliajn fojojn mi renkontiĝis kun Andreo okaze de UK en Florenco (2006), UK en Roterdamo (2008), sed nia korespondo daŭris preskaŭ seninterompe.



Kun la polaj gestudentoj antaŭ ISTK domo en Bydgoszcz (jaro 1998)

Mi havis la okazon konatiĝi deapude kun tiu aktiva esperantisto, famiĝinta en la tuta nia monda esperanto- movado ankaŭ pro lia entrepreno turisma per kiuj multaj homoj vojaĝis tra la mondo.

Per lia agado surkampe de edukado kaj turismado Andreo kontribuis notinde en la opinio ĝenerala ke Esperanto funkcias kaj povas estis utila en la vivo.

La neatendita morto disigis lin disde la movado sed ne disde nia memoro. Ĉikaze ni sendas elkorajn kondolencojn al lia honorinda edzino litova Regina, al ambaŭ filoj kaj la ties familioj, al ĉiuj polaj samideanoj kaj pli vaste.

Tutrespekte

Bardhyl Selimi

ILEI sekciestro, Albanio

08/08/2014

Estimataj Samideanoj kaj Amikoj!

Ni kore dankas pro kondolencoj kaj sinceraj vortoj, kiuj venis el 44 landoj kaj de 158 personoj kaj organizajtoj.

ASci. mag. Andrzej Grzębowski (71 j.) mortis en Buenos Aires la 4-an de agosto 2014 j.

La Adiaŭa Ceremonio kaj entombigo okazis en Pollando, Tombarejo Bydgoszcz – Bielawki

la 4-an de oktobro 2014 j. sabate, je la 13-a horo

*Li por chiam restos en nia memoro!*

Informas:

*Familio – edzino Regina, filoj Andreo kaj Romeo kun edzinoj kaj sep nepoj kaj*

*Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz*

*Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz*

*Internacia Klubo "Esperantotur" en Bydgoszcz*

*Filio de Pola Esperanto Asocio en Bydgoszcz*



## **El niaj leteroj**

### **Letero de Birgitta Anevik**

- Probable vi legis, ke mi plurfoje informis per facebook pri la albana vespero en nia biblioteko. Tiun vesperon ni aranghis danke al vi kaj Esperanto. Char estis vi, kiu proponis min kontaktighi kun Sokol Demaku en Boros. Do, unue mi estis invitita al la festo en Boros dum la printempo, kaj poste mi helpis al Sokol havi kontakton kun homoj en la biblioteko chi tie. Krome mi helpis lin kun broshuro pri Albanio en la sveda lingvo. Pasintan merkredon Sokol kaj alia viro venis al Lidköping de Boros. Ili montris filmon pri albanaj vestoj - prefere belaj virinoj portis la vestojn! Nu ja, tio estas unu flanko de Albanio - la plej bela, eble. La naturo en Albanio estas ankau ege bela. Sed mi scias, ke multaj homoj ancorau estas tre malrichaj en Albanio. La "svenskalbanska vänskapsföreningen" i Mariestad ekzemple faras vojaghojn al la vilagho Lubonja por helpi la homojn tie per diversaj ajhoj. La bildoj de la organizanto de tiu asocio estis tute

kompreneble. Sed chio havas multajn flankojn.

- Koran dankon kara amiko pro la informo.

Mi esperas ke pro la vojagho al la UK de la venonta jaro mi povos renkonti vin en Europo.

Kun deziron pri paco kaj sano,

Samideane via,

*Paulo César*

[www.bonavolo.com](http://www.bonavolo.com)

- **Saluton! Bonega artikolo pri kunlaboro inter esperantistoj! Gratulon al vi! Sane kaj pace!**

**Elma do Nascimento**

- **Disputo:**

**Estimata s-ro Künzli,**

**unue mi volas danki pro Viaj mesaghoj.**

**Due mi volas esprimi mian bedauron, ke mi ne sufiche detale povas skribi miajn pensojn (se Vi**



entute havus emon legi ilin). Lau miaj travivaĵoj la movado konsistas plejparte el stranguloj, kiuj en la normala vivo ne trovas lokon. Do mi ne plu volas forĵeti mian tempon pro tiuj ridinduloj. Mi nur uzas tion, kion mi bezonas kaj donas helpon al interesitoj, kiuj demandas. En la UEA mi restas pro la CO, kiun mi alte pritaksas, ankau la Delegita Reto ofte helpis al mi. La resto estas fantaziuloj, revistoj, mensogistoj.

Mi tre bedauros, ke la E-istaro pro Via apartmaniera kritiko (mi devas konfesi, ke ghi estas malafablega) kaj pro Via komprenebla emo ne perdi Vian tempon, ne havas la ŝancon, vidi Vin en pozicio, kiu ebligas ŝancon al normaligado de la movado.

Mi ne vidas ian ajn ŝancon por la oficiala E-movado - mi perdis mian esperon, mian intereson. Chu mi nun estas raumisto - eble jes, egalas tute al mi.

Mi nur scias, ke mi havas pere de E-o bonajn kontaktojn kaj interesajn legajhojn surbaze de tre bonega lingvo. Tion ne povas ŝteli iu ajn UEA-stranguleto.

La t.n. movado ne plu interesas min.

Sincere salutas

N.N.

Kara s-ro N.N.

Mi dankas pro via sincera respondo kaj konsentas kun viaj rimarkoj. Mi tute konscias pri la (malafablega) tono de miaj intervenoj. Tio estas intencita. La celo de miaj intervenoj estas fari premon kontraŭ la (UEA-)movado (kiun mi nomas vomado). Sed mi dubas, ke tio estas la sukcesa vojo, car la plimulto de tiuj movadaj funkciuloj estas obstinaj kaj rigide restas sur siaj tradiciaj vidpunktoj kaj pozicioj.

Ghis antaŭ kelkaj jaroj mi ankau subtenis la CO, sed poste konstatis, ke tio havas nenium sencon. Certe, mi utiligas la libroservon, kiu estas la sola sencohava sekcio de UEA, dum cio cetera estas vana kaj neserioza.

Mi deziras al vi cion bonan

A. Künzli

## Reago mia

Kara Andy,

dankante vin pro starigo de la demando envorte kaj leginte la reagojn de diversaj esperantistoj mi juĝas necesa ankaŭ mi respondu:

Laŭ mi esperantistoj ne malplibonas ol la ceteraj homoj ĉirkaŭantaj nin. Ili estas eĉ pli afablaj, helpemaj, kunlaboremaj, respektemaj, bonkomprenemaj, ĉastaj, kleraj kaj utilaj. Dum mia esperantista vivo ekde la jaro 1961 mi konstatis ke nur esceptokaze esperantistoj estas stranguloj, indiferentuloj, fiuloj, mensoguloj ktp. Mi donos ekzemplerojn:

La karmemora forpasinta esperantisto nederlandana Jacques Tuinder dediĉis longajn jarojn ankaŭ al albanoj, esperantistoj kaj ne esperantistoj. Li estis similulo de la granda patrino Tereza.

La eksa prezidanto de UEA prof. Renato Corsetti, kvankam tro okupita per sia oficiala laboro trovis tempon por multnombraj ordinaraĵoj esperantistoj enmondo al kiuj li helpis ĉiamaniere (per konsiloj, perado, ks). Tion li faris ankaŭ kun ni albanoj.

La pola esperantisto Tomasz Chmielik, profesoro de la germana, entreprenis ekde tri jaroj la tradukadon kaj eldonadon de la albana literaturo en Esperanton. Ĝis nun estas aperintaj kvin libroj sed estas jam tradukitaj pli ol 20 romanoj. Ĉion li faras volontule!

Simile agas la franca esperantisto Edmond Ludwig kiu eĉ kontribus per mono kvankam li m,em estas pensiulo! Jarojn antaŭe ege helpis albanojn per libroj kaj instruiloj, eĉ per diversaj aĵoj s-ro William R. Harmon el Usono. S-ino Martha Otto kiu aktuale loĝas en Albanio estis ĉiam aktiva kunlaboranto.

Mi povas mencii dekojn da aliaj individuoj kiujn mi konas persone, inkluzive vin.

Do, mi devas diri ke via rigardado blankenigre ne justas kaj ne pravas.

Amike Bardhyl

## • VOJAGHO EN USONO

Chi-somere mi pasigis 6 semajnojn en Usono pro diversaj kialoj. Unue mi vizitis miajn malnovajn hebreajn amikojn en Chicago, kiuj petis min farighi "Parolanto de Vendredo Vespere". 'Pri kial?', mi demandis. 'Do, parolu pri: Kial vi estas bahaanino, Kion vi faras en Albanio, Kion vi faris dum 9 jaroj en Haifo, kaj Kial vi amas

Esperanton.' Bone, do mi preparis iom da teksto kun bildoj (PPP) kaj prezentis ghin al kvindeko da auskultantoj. Post la prezentado starigis multaj demandoj, precipe pri Esperanto, konata de kelkaj che-estantoj. Tiun prelegon mi ankaŭ prezentis en aliaj lokoj - en Kalifornio kaj Ohio (kie mi vivis antaŭ multaj jaroj) - kaj plezure klarigis la principojn kaj avantaĝojn de Esperanto, ravis pri Universalaj Kongresoj kaj vera lingva justeco pere de la internacia lingvo.

Bedaurinde la E-o grupo en Chicago 'ne [plu] aktivis' laŭ interreto, kaj la adreso en la jarlibro shajnas esti 'morta'. Dum mia lasta vizito antaŭ jaroj mi renkontigis tie kun impona aktivulo, S-ro Kent Jones, en rulseĝo, kiu kolektis lingve kauxatajn akcidentojn, katastrofojn, ktp. Bedaurinde li forpasis.

En Kalifornio mi vizitis filon kun familio kaj pasigis belegajn feriojn. En tiu komunumo vivas amikino Esperantista, do ni klarigis nian 'plej shatatan hobion' al multaj demandantoj dum kunvenoj au privataj vizitoj. Chie ajn mi menciis Esperanton, disdonis materialojn (pro tio mi emas ricevi la Esperanto-revuon papere!), kaj bonshance ekzistas la interreta programo 'lernu'. Nuntempe gejunuloj kaj olduloj preferas memstudi komputile. Kelkaj homoj iam audis pri Esperanto, scias kelkajn vortojn, dum aliaj homoj nenion scis pri ghi. Chie ajn indas varbi, informi pri tiu brila donaco far Ludvig Zamenhof, cele al pli facila kaj rapida unuigo de la homaro.

Heide Martha Otto, septembro 2014

## **Beletraĵoj**

### **Poezio**

Gjergji Gusko



**ERDHI VJESHTA!**

**La aŭtuno alvenis**

Fletët zverdhur zun' e bien.

Erdhi vjeshta, sa trishtim!

Do blerojë prap' lis' i vjetër?

Do këndojë një bilbil?

**La flaviĝintaj arbofolioj ekfalas**

**La aŭtuno alvenis, kiom da tristeco!**

**Ĉu ree verdiĝos la maljuna abio**

**Ĉu ree kantos najtingalo?**

**NË GJI TË PYLLIT VJESHTARAK**

**En la sino de la aŭtuna arbaro**

Në gji të pyllit vjeshtarak,  
Ku gjeth' e fletë u përflak,  
Po fryn një fllad që të freskon,  
Po fryn një fllad që fletët rrëzon.

**En la sino de la aŭtuna arbaro**  
**Kie la arbofolioj forĵetiĝis**  
**Blovas venteto freŝiganta**  
**Blovas venteto la arbofoliojn faliganta**

Një zog diku se ku këlthet.  
Një deg' e thatë diku kërcet.  
Dhe fletët bien pak nga pak  
Prej drurit t'ri, prej lisit plak.

**Birdo ie ekkrias**  
**Seka branĉeto ie krakas**  
**Kaj la arbofolioj iom post iom falas**  
**Disde la juna arbo, de la maljuna abio**

Por, ç' është kjo që po zhurmon?  
Një përrua poshtë po buçet.  
Një shkëmb krenar mbi të qëndron,  
Së larti pyllin përshëndet:

**Sed, kio tio bruiganta estas?**  
**Torento malsupre tondras**  
**Fiera rokego super ĝi staras**  
**El la alteco la arbaron salutas**

Duro, ti pylli vjeshtarak!  
Pranverë vjen, kur dimri shkon,  
Blerimi prapë zë mbulon,  
Si drun' e ri dhe lisiin plak.

**Paciencu, ci aŭtuna arbaro!**  
**Forpasinte la vintro alvenas la printempo**  
**La verdeco denove kovras**  
**La junan arbon, la maljunan abion**

Pogradec, Jollë 1974.

**PYLLI NË VJESHTË**  
**La arbaro aŭtune**

Po ec në shteg plot gjethe shtruar,  
Një shteg i ngushtë plot trishtim.  
Këlthet diku zog' i vetmuar,

Nën këmbët fletët fëshfërijn'

**Paŝas mi sur la per arbofolioj sternita pado  
Plena je tristeco la malvasta pado  
Iu soleca birdo krias  
Sub la piedoj la arbofolioj susuras**

Bishnicë, Nëntor 1983.

**Eseo**

## **La Lago de Pogradec<sup>18</sup>**

(Aŭ la lago de Lyknida)

Ĉu vi jam vidis la lagon de Pogradec? Ĉu ne?! Tamen, ne gravas. Vi vidos ĝin. Tio ne estas malfacile. Jen, vi enrajniĝos kaj ĵus transpasinte la longan tunelon de la Kolo de Thana, antaŭ vi, maldekstre, aperos larĝa akva spaco, miksitaj, je blua- verda koloro, travidebla, kiu surprizigos vin per sia aspekto, plezurigos viajn okulojn, eble laciĝintaj pro la rapida ŝanĝiĝo de la proksimaj kaj malproksimaj vidaĵoj, aperintaj sur la ekrano de via fenestro en la vagona kajuto, de la montoj kun la arbaroj, rokegoj, fostegoj de la alta tensio... Nun vi eksentos apartan plezuron, ia rilaksiĝon, ĝojon, freŝecon. La okuloj alfiksiĝos ien, en iun vidaĵon fore, aŭ via rigardo elglitos sur la tuta spaco de la lago kaj vi eksentos apartan kozon kiun neniam antaŭe travivis, kaŝitan perturbon, ĝojan kaj bedaŭran tremeton, simila al tio, kiam vi vidas junan, belan knabinon, fascinantan, kies aspekto allogis vin ekde la unua rigardo kaj vi sentas ke vi enamiĝos kun ŝi, tiom longe, kiom longe ŝi estos apud vi. Ne, vi amos ankoraŭ pli. Ankaŭ kiam vi estos for, vi sentos la kaŝitan deziron por denove vidi ŝin, por havi ŝin apude, vi sentos bedaŭron ke vi ne konis ŝin antaŭe.


Kaj se vi ne alvenus per trajno, sed per aŭtilo? Ne gravas. La vidaĵo ekaperos ree surpriziga. Ĵus vi estos ĉepinte de la Kolo de Thana, aŭ ĉe Kolo de Ploça, venante de Korça, denove la vidaĵo estos bela, junulineca, altirante ĉiam apud ĝin kaj la sentimentoj estos la samaj, kvankam la vidaĵo estos iel alia.

- Ho, se mi estus pentristo kaj pentrus ĉi tiun lagon en ĉi tiu momenteto!- povas aŭdiĝi voĉo el via sino.

Ĝi estas unu el la plej originalaj lagoj de Balkanio kaj Eŭropo pro ĝia origino kaj formo, samkiel pro hidrologia reĝimo kaj faŭno. La surfaco de tiu lago estas 362. 6 km<sup>2</sup> el kiuj 111. 4 km<sup>2</sup> kuŝas ene de la hodiaŭaj niaj ŝtatlimoj, la cetero troviĝas en Makedonio. Ĝi havas profundecon de 145 m ĝis maksimumo 295 m, fariĝante tiel la plej profunda lago en la Balkana duoninsulo. Kiel ĉefaj fontoj por ĝia nutrado servas la subteraj akvoj, la torento de Ĉerrava en Pogradec kaj la granda kresto de Seka Monto. El tiu lago fontas la rivero de Drini. Tie kreskiĝas multaj specoj de fiŝoj, inter kiuj oni distingas la koranon. La akvoj de tiu lago pro ilia heleco kaj pureco estas registritaj ankaŭ en la Granda Internacia Enciklopedio. Ĉe ĝia bordo estas multaj turismecaj lokoj.

Vi pravas. Pentristo povus elmontradi sur la tolo la belecon de tiu momenteto, samkiel tiujn sentimentojn de tiu momenteto povus esprimi komponisto. Sed vi ne supozu ke tio estas facile por la pentristo. Ne, tio estas eĉ malfacila, same kvazaŭ pozus antaŭ ili petolema knabino, kiu ne povas teni la saman pozon dum tiom da tempo, kiom bezonas la pentristo. Tiel ankaŭ ĉi tiu lago ineca ŝangas la aspekton ne nur en ĉiu sezono de la jaro, sed ankaŭ en ĉiu horo de la tago. Malmultaj estas tiuj pentristoj, kiuj sukcesis doni verajn iliajn bildojn pri ĉi tiu lago.

- Kiel eblas ke la lago ŝanĝas la koloron? Kio povus efiki tion? Ĉu ĝi ne povas resti ĉiam blua-verda?
- Ĝi ja ŝanĝas la koloron. Ni jam diris ke la lago similas al juna knabino. Ĉu vi povas imagi junan kaj belan knabinon, kiu bone scias ke ŝia beleco kaj freŝeco allogas la homojn, je kiu ajn aĝo ili estu? Tiel ankaŭ la lago estas kiel ŝi, ankaŭ ĝi havas internan strangan mondon, ankaŭ ĝi aperas jen kvietita, ŝajnigante sin jen dormetanta kaj jen malkvietita, jen ĝojplena kaj jen melankolia, jen bubececa kaj jen kolerema, ĉar el ĝia brusto eksplodas la sentimentoj per fortaj ondoj, tiom fortaj, kiom ilia kunfrapiĝo al la bordaj rokoj alportos ĉiam la diseriĝon de ĉi tiu lasta.



La fiŝo Koran

Do, tia bubececa knabino, kiu scias ke estas kaj restos ĉiam juna kaj bela, kial ŝi ne priludu kaj primoku ĉiujn? Igu nin ekridi aŭ ekplori, eksenti ĉagrenon aŭ koleron, igu nin kvazaŭ frenezajn pro ĝia pompa beleco, kiel la montoj leviĝantaj super ĝi. Do, por igi nin tiel, kiel ĝi volas, ŝi bezonas ŝanĝi la kolorojn, sian veston, sian aspekton, kiu ŝanĝiĝas ne nur laŭ la sezonoj, sed ankaŭ laŭ la tagaj horoj kaj laŭ ŝia spirita stato. Tiel, kiam ŝi estas kvietita kaj ĉarmoplana, tiam sur ŝia surfaco prezentiĝas la ruĝeta ĝojo de la tago naskiĝanta, la printempa verdeco de la montoj, de la montetoj ĉirkaŭantaj kaj la lazureco de la ĉielo, tiam ĉio ĉirkaŭe estas ĝojplena, kaj vi kaj ŝi, kaj ŝi kaj vi.

Tiam la ondoj elglitas malpeze- malpeze kaj karesas la bordon. Iamfoje, sur la horizonto ĝia koloro aperas travidebla, blu-verda, la ondoj elglitas pli rapide, ekridas alproksimiĝanta la bordon, apertas la flugilojn, kvazaŭ ĉirkaŭbrakante ĝin kaj denove revenas tien, de kie venis. Sed, iamfoje, kiam la koloro de la lago fariĝas malhele blua, dum apud la bordo kafo-flava, la altaj ondoj kunfrapiĝas tutkolere al la bordo, ellasas ŝaŭmon pro la kolero kaj denove retiriĝas, kvazaŭ por rikuperi forton kaj kuraĝon kaj por ellasi la koleron, internan koleron kiu scias pro kio, elanas kaj kunfrapiĝas denove al la bordo la altaj ondoj kaj denove retiriĝas por ripetadi la samon milojn da fojoj, dekmilojn da fojoj, ĝis kiam la nervoj ĝiaj kvietiĝos.

Unufoje, Lasgush, la Pogradeca poeto, estis promenante iun somertagon laŭ la lagobordo kun lia fidela hundo, kiun li tenis ĉiam apude. Iu konato lia, preterpasanta, demandis:

- Sinjoro Llazar, kien vi iras?
- Nu, mi eliris por vidi ĉi tiujn stultajn ondojn- respondis la poeto kaj daŭrigis sian vojon.

Iu alia, ekirinte de ĉi tiu esprimaĵo de Lasgush, verkis kelkajn versojn pri tiuj ondoj.

Ĉi tiuj stultaj ondoj

Elglitas malpeze- malpeze.  
Tuŝas ili la bordon, karesas ĝin  
Kaj revenas tute kviete.

Ĉi tiuj ondoj intrigantaj,  
Ludas kaj ridas kun la bordo mem.  
Etendas ili la brakojn, ĉirkaŭprenas  
Kaj revenas tre rapide.

Ĉi tiuj ondoj koleremaj,  
Tutŝaŭme kaj tutkreste supren  
Puŝas antaŭen ilin la freneza vento  
Kunfrapigas ilin al la forlasa bordo.

La bordo silentas kaj petegas  
La bordo ridas kaj ĝojas  
La bordo malgajas, ĉagreniĝas  
La tuta ties koro dispeciĝas.

Iom pli supre, mi jam diris ke la lago estas kiel la virino. En la albana fakte vorto lago (Liqen) estas je maskla ĝenro. Laŭ gramatiko, vi pravas. Sed ni devas fari ĉi tie escepton aŭ pli bone konsideri eraron faritan iam kaj restinta ĝis hodiaŭ.. La lago de Pogradec estas ina lago, similas al juna kaj bela knabino. Kaj tia ĝi estis ĉiam. Iam, eble, ĝi portis knabinan nomon. Ŝajnas min ke en la pratempo ĝin oni nomis Lyknida. Bela nomo, ĉu ne? Do, la eraro devus okazinta pli malfrue. Eĉ ne eraro. La vorto eraro estas malmulte por diri, mi volus diri ke estus krimo se ni nomus ĝin Lago aŭ pli malbone Marĉo<sup>19</sup>. Nomo kiu sonas simila al la vorto Baseno. Io malgranda, enfermita, malhela, malpura, plene je ŝlimo kaj koto. Tion, kion oni ne sukcesis fari envere, ne detruante la belecon, volis ja rompi, malbeligi ŝanĝante la ĝenron de la nomo kaj la sonon de la nomo, ĉar la unua prezentiĝo por la homo, aŭ objekto kiu estas for kaj vi ne povas vidi ĝin propraokule, estas aŭdi la nomon de la persono aŭ de la objekto.

Kio allogus vin se ni nomus ĝin Marĉo, Baseno? Certe, vi imagus iun monstron, kiu mortigas la homojn. Ankaŭ se vi rigardus ĝin kiel knabino kaj oni dirus la nomon Marĉo, vi ekdubus en ĝian verecon, vi ekpensus ke ŝi estas sorĉistina maljunulino kiu povas ŝanĝiĝi imediate kaj akiri la aspekton de bela knabino, jen de la monstrulo mortiganta la homojn, kiun vokas per la nomo Marĉo, kiel ekzemple la vorto Gogol (timigilo). Pli malfrue oni komencis nomi ĝin ankaŭ Lago, io pli milda ol la unua nomo, sed la krimo restis. La ĝenro restis neŝanĝita. Do, por konkludi ĉi tiun temon, por diri la veron, t. e. ke la Lago ne estas Li sed Ŝi kaj la nomo Lyknida estas la unua nomo de junuleco. Ĉar Ŝi restas ĉiam juna kaj bela ne estas bezono por ŝanĝi la nomon, des pli la ĝenron.

Jen, do, antaŭ ni- Lyknida!

Se vi estas vidinta unu fojon kaj diras ke vi konas ŝin, ne hastu. Vi ankoraŭ ne konis ŝin. Ŝi apenaŭ konatas per unu vido. Kiom longe vi restos en Pogradec, ĉu du semajnojn? Malmulte, vi konos ĝin malmulte. Sed venu ankaŭ la alian jaron! Estus bone ke vi vidu ŝin ankaŭ en alia sezono, ol tiu kiam vi vidis la unuan fojon. Vi konos ŝin tute aliel, sed denove allogan kaj belan, kvazaŭ ŝi estus la sama bela knabino, sed nun vestita aliel, elmontrante aliajn ĉarmojn de ŝia beleco.

---

<sup>19</sup> La lokanoj nomas ĝin Gjöl = marĉo

Fakte, ne estas bezonate ke mi invitu vin alveni. Ŝi tiom allogos vin, kiom vi mem demandos alveni. Se vi demandos denove alveni la alian jaron, tiel kiel agas multaj kaj multaj homoj el tiuj kiuj vizitis ŝin unufoje, vi sciu ke vi jam enamiĝis al la knabino Lyknida. Amo kiu restos la tutan vivon. Ĉu eblas la tutan vivon amo? Kial ne, jen ĝi estas unu el tiuj. Ĉu Lyknida estas envere sorĉistino je knabineca aspekto? Kiu scias, eble jes, ĉar ŝi sorĉas iun ajn kaj iam ajn per sia aspekto.

Kia estas ja ŝia beleco?

Hmmm, estas malfacile diri tion. Ne, estas por mi malfacile diri. Pli bone venu kaj vidu mem. Ĉu vi vidis in sur la kolora foto? Kio do estas la foto? Io mortinta. La foto kaptas nur momenteton kaj fiksas surpapere miksaĵon de la konturoj kaj la koloroj. Ĉu knabino sur la foto estas envere la viva knabino? Neniel. La beleco de la knabino estas ne la foto, ŝia beleco konsistas en la tuta ŝia estaĵo. La beleco ekzistas ne nur je aspekto, por eksenti la belecon devas partopreni la ĉiuj kvin sensoj. Ne, kvin estas malmulte, ŝajnas al mi ke ekzistas ankoraŭ plia senso, la sesa, interna senso, kaŝita, nekomprenebla, sed sentata. Nu, estas bezonataj la ses sensoj por ke vidu, komprenu, travivu kaj ĝuu ŝian belecon.

Ĉu vi pensas ke mi faros la priskribon de Lyknida? Ne, mi ne povas, mi ne kapablas fari tion, estas maleble por mi. Kvankam multaj verkistoj alvenis en Pogradec por feriadi, neniu el ili sukcesis priskribi la belecon de la lago. Malmultaj estas la pentristoj kiuj sukcesis fiksi fidele kaj arte en siaj bildoj la aspektojn de la lago en apartaj momentoj ĝiaj. Kaj tion apenaŭ povas fari ĉiu pentristo. Oni devas naskiĝi kaj kreskiĝi en Pogradec, aŭ devas esti vivinta longan tempon en ĉi tiu urbo rigardante la lagon en ĉiu sezono kaj en ĉiu tempo de la tago, por ke povu prezenti ĝin tiel, kiel ĝi estas, ne simple je malvarma vidaĵo, frostiĝinta, sed je aspekto kune kun la spirito de la lago. Tion sukcesis ja fari la pentristoj Vangjush Mio, Zengo, samkiel la Pogradecaj pentristoj Mato, Lako, Vasili...sed per vortoj ne, estas neeble esprimi vorton pri la beleco de la lago.

Komponisto, tion kion li sentas dum tiuj momentetoj, ne povas esprimi aliel, krom per la sonoj de bela muziko. Mi rememoras parton el "Makar Ĉudra" de Gorkij, kiam la maljunulo Makar parolas pri la beleco de Rada: Ŝia beleco ne povas paroliĝi, ŝia beleco ne povas skribiĝi, ŝia beleco povas ludiĝi per violono, kaj tion povas fari nur tiu, kiu scipovas la violonon same kiel sian spiriton". Kion do povus paroli pli la maljuna cigano, kiu estas malriĉa je vortoj por esprimi la homajn sentojn? Sed por sin esprimi, li bezonis alian lingvon kiu eliĝas ne el la buŝo, sed el la profundo de la spirito kaj tion povus plenumi nur la violonaj dratoj.

Tiel ankaŭ la belecon de Lyknida, se vi mem ne povas senti vivante apud ŝi, vi povas trovi tion spegulitan parte en la verkoj de la poetoj kiaj Lasgush, Pojanaku...sur la pentraĵoj de Mio, Zengo, Mato, Taso, Lako, Vasil...kiuj, enamiĝintaj al Lyknida, venas al ŝiaj bordoj kaj ŝi, kiel noblan knabinon, plenumas ĉiujn ties dezirojn.

Nu, venu! Ŝia amo sufiĉas por ĉiuj. Por ĉiuj ni entute kaj por ĉiuj venontaj pli malfrue. Ni maljuniĝos kaj forlasos ĉi mondon, sed ŝi restos ĉiam bela, ĉiam freŝa, ĉiam aminda, ĉiam nobla, la belulino Lyknida.

**Pogradec, 1984-2005**





La lago de Pogradec- Ohrid

## **Nova libro**

Estimataj gesamideanoj,

Mi kuraĝas skribi al vi tiun ĉi leteron post longa pripensado por peti vian helpon pri eldono de mia memorlibro “BRAKUMI LA MONDON”, kiu jam estas preta en elektrona formato, sed kiun mi ne povus eldoni sen monhelpo de miaj samideanoj.

En la libro mi priskribas mian longan, pli ol duonjarcentan E-aktivadon, dum kiu Esperanto fariĝis lingvo ne nur mia, sed ankaŭ de mia tuta familio. La libro respegulas ankaŭ mian instruistan, tradukistan kaj verkistan E-agadon kaj ankaŭ iujn miajn konceptojn kaj vivon kiel kristano.

En la libro mi priskribas mian konatiĝon kaj kunagadon kun eminentaj eksterlandaj kaj bulgaraj esperantistoj, kiel: Andreo Ĉe, ADA, Nikola Aleksiev, Asen Grigorov, Kunĉo Valev, Violin Oljanov ka, kun kiuj mi havis multajn kaj utilajn E-kontaktojn kaj al kiuj mi ŝuldas mian E-vervon kaj sperton.

Por ilustrati la libron mi sendas al vi malgrandan fragmenton el la libro, por ke vi havu imagon pri ĝia enhavo kaj lingvaĵo.

La libro estas jam redaktita kaj korektita de niaj tre bonaj bulgaraj geesperantistoj Venelin Mitev kaj Mariana Evlogieva, kiuj donis sian pozitivan pritakson pri ĝia legebleco kaj utilo por la monda esperantistaro.

Okaze de la forpaso de mia bona kaj longjara E-amiko, samideano kaj kunaganto prof. Boĵidar Leonov, mi dediĉas ĝian eldonon omaĝe al lia memoro.

Nun pro manko de mono, tiu ĉi libro, same kiel ankaŭ deko da aliaj miaj libroj kaj lernolibroj, ne estas eldonitaj, ĉar mia mizera pensio ne permesas tion.

Mi turnas min al tiuj esperantistoj, kiuj havas eblecon helpi per negrandaj monsumoj la eldonon de la libro kaj eventuale eldonadon de aliaj miaj libroj, ĉar alimaniere ili forirus kune kun mi post mia forpaso.

Mi aldonas ne plenan nomaron de miaj libroj, neeldonitaj ĝis nun pro manko de monrimedoj:

1. „BRAKUMI LA MONDON” – kiun mi finis antaŭ nelonge 200 paĝoj, kun fotoj.
2. „LA REĜINO DE TÂRNOVO” – mia traduko de novelo de la fama bulgara verkisto Emilian Stanev, farita antaŭ pli ol 30 jaroj, kaj kiun mi antaŭ nelonge transportis en elektronan formaton.
3. „ESPERANTO EN LA VIVO” – kolekto de miaj artikoloj, prelegoj kaj traktaĵoj, prezentitaj

dum la internaciaj Simpozioj kaj Seminarioj en Karlovo kaj dum aliaj naciaj kaj internaciaj E-forumoj en la lastaj dek jaroj, proksimume 170 paĝoj.

4. „ELEKTITAJ RAKONTOJ” de Ĉudomir – mia traduko de humoraj rakontoj de nia konata verkisto Ĉudomir, ĉirkaŭ 120 paĝoj.
  5. „ESPERANTO EN DIALOGOJ” – instruhelpilo por progresintoj, kompilita antaŭ 35 jaroj, papere, kiu bezonas aktualigon kaj elektronigon.
  6. „KURSO POR PROGRESINTOJ” – konciza kurso de Esperanto por progresintoj, ĉirkaŭ 60 p.
  7. „EKZERCARO” al la Kurso por progresintoj – gramatikaj ekzercoj, rakontoj, anekdotoj, tekstoj por traduko ka, ĉirkaŭ 40 paĝoj.
  8. „ESPERANTA KANTARO” (kantoj el la tuta mondo) – kolekto de kantoj en E el la tuta mondo kun tekstoj kaj notoj, ĉirkaŭ 160 paĝoj.
  9. „ESPERANTA KANTARETO” (kantoj el la tuta mondo) – konciza kolekto de konataj E-kantoj sen notoj, ĉirkaŭ 30 paĝoj.
  10. „INFANAJ KANTETOJ” – kolekto el tradukitaj de mi en E popularaj bulgaraj infanaj kantoj, ĉirkaŭ 60 paĝoj.
  11. “LA VOJO AL LA ĈIELO” – kolekto de miaj prelegoj, artikoloj, predikoj kaj lekcioj, prezentitaj al kristanoj kaj nekristanoj dum seminarioj, diservoj kaj aliaj kunvenoj en la lastaj dudek jaroj.
  12. KREPUSKIĜO – kolekto de miaj originalaj kaj tradukitaj poemoj kaj rakontoj, ĉirkaŭ 100 p. Mi certigas ĉiujn, kiujn sendus monon, ke mi ne misuzos ĝin, sed ĝi vere estos elspezita nur por eldoni la libron “BRAKUMI LA MONDON” kaj ankoraŭ iujn el la nomaro librojn, kiom suficus la monrimedoj. Mi promesas sendi ekzempleron de la eldonota libro al ĉiu monhelpanto. Mi donas la valutan bankkonton, al kiu oni povus sendi eŭrojn, dolarojn aŭ alia eŭropa valuto: NIKOLA ATANASOV UZUNOV, Bulgario, Jambol, banko DSK:  
IBAN: BG13STSA93000005447764 BIC: STSABGSF
- Mi volonte respondus al ĉiuj, kiuj dezirus ricevi pli da detaloj aŭ havas demandojn al mi. Bonvolu skribi al mia elektrona adreso, aŭ al mia poŝtadreso: Nikola Uzunov, str. “Gen. Vl. Zaimov” 6/A, ap. 2, Jambol, Bulgario.
- Kun plej sinceraj E-salutoj: Nikola UZUNOV

Meri Lalaj

Travivita rakonto

## La Senpekulo

La Senpekulo pasigis la tutan vivon terure, sen iu ajn ĝojo, nur la morton havis li malpezan kaj sen penojn. Mi estis instruinta lin en la kvina grado de la elementa lernejo, kiam mi ĵus estis nomumita instruinstinon unuafoje. Li estis tre ordinara lernanto dum la lecionhoroj, tre ĝentila kaj prudenta kaj mi zorgis pri li ankaŭ ĉar li estis la plej granda filo de la mia kuzino.

Finstudinte la okjaran lernejon, li klopodis sekvi la vesperan gimnazion, sed forlasis ĝin ĉar la familio bezonis lian laboron. La Senpekulo plenumis profesian kurson kaj fariĝis motoristo. Tre juna knabo li komencis la laboron tie, ĉe motorpumpilo apud la barako, konstruita per tabuloj ĉeborde de la lago, kune kun du tri aliaj laboristoj, pli aĝaj ol li. Tiel, per la pumpiloj, dum la somero, ili elĉerpis la akvon el la lago kaj uzadis ĝin por la akvumado, dum vintre por la aliaj bezonoj.

Meze de la barako troviĝis barelego, segita ĉemeze kaj kovrita per leda kovrilo kaj ligita per tuboj, kiu uzatis kiel hejtilo dumvintre, kien oni enĵetis segdefalaĵojn por bruliĝo. Preter tiu barako, estis metitaj du lignaj seĝetoj kie oni sidis por manĝi panon kaj, fronte de la pordo, (kiel ĉie en la oficejoj, lernoklasoj, hejmoĉambroj aŭ alia laborejo) pendis la portreto de la kara gvidanto Enver Hoxha.<sup>20</sup>

Pasis tre malmulte da tempo de kiam la Senpekulo komencis la laboron, tiutempe apenaŭ li estis dekokjara. Kaj estis la tagoj, antaŭ la grandaj festoj de novembro<sup>21</sup>, kiam en la barako krevis la kverelo inter la laboristoj, ĉar la portreto de Enver Hoxha elglitis disde la ligna muro de la barako kaj, tiuj du aliaj laboristoj, troviĝintaj tie, sin ĵetis freneze al la Senpekulo: " Ci defaligis ĝin! Ci defaligis ĝin! Ci faris tion eĉ intence, ĉar ci ne amas la onklo Enver-on!"

Estis rompita nur la vitro de la portreto, damaĝita iomete la framo kaj faldita iel la fotografia papero. Sed la bruo estis tondrema. Post iome, alvenis ilia laborestro. Ĉiu sin ĵetis denove al la Senpekulo: " Li rompis ĝin! Li defaligis ĝin! Li faris tion intence! Sabotaĝo antaŭ la festoj de novembro! La sabotaĝo ne havas, do, kornojn! Li ne amas la Partion! Li ne amas la splendifan gvidanton, la kamaradon Enver, por kiu ni fordonus eĉ nian vivon! Oni alvokos cin al la Departamento de la Internaj Aferoj! Oni enprizonigos vin dek jarojn aŭ pli! Ne, ne, dudek jarojn, kiel perfidulon de la Partio kaj la popolo!..."

Kvin tagojn kaj kvin noktojn la Senpekulo ne manĝis, nek trinkis, nek dormis. Li imagis la longajn jarojn enfermite en la prizono, en la karcero, kune kun grandaj ratoj kaj la gardistoj kiuj piedfrapis lin forte. Li entimigitis ĝismedole, pensante pri tio, kio trafus la patron, la patrinon, la fraton... Poste, lin kaptis terura nerva krizo. La povra patrino pro la filo! La povra patro pro la filo!

Ĉiujn ceteraj vivojarojn la Senpekulo pasigis nur per la medikamentoj. Li suferis tiom multe, portante nur mallumon en sia spirito. Ne plu li kapablis por iu ajn laboro. Li promenis soleca tra la stratoj de la mia urbo kun la cigaredo surbuŝe kaj flaviĝintaj fingroj pro la tabako kaj parolante al si mem. Li neniun incitis, lin neniun agacis. paŝadis li tute soleca, malbone vestita, ofte ne razita, ŝovante la piedojn. La tutan vivon, li havis neniun amikon, la tutan vivon li havis neniun knabinon por ami.

Enirinte en la ĉambro, kie la Senpekulo kuŝis mortinta, ŝajnis kvazaŭ li atendis min. Tie estis nur unu el la liaj parencinoj. Mi kliniĝis kaj kisis lin sur la malvarma frunto. Li aspektis tre

---

<sup>20</sup> La eksa komunisma albana diktatoro

<sup>21</sup> 28-an de novembro 1912 sendependiĝis Albanio, 29-an de novembro ĝi liberigis se faŝistoj.

ĉarma, kvazaŭ novelzon, vestite per bela kostumo brunkolora, sur la lipoj oni estis surmetintaj petalojn de la ruĝa rozo, sur tiuj lipoj kiuj neniam kisis virinon.

Surfingre oni estis surmetinta nuptoringon, en la kies fingroj, kiuj neniam karesis virinon, ĉe tiu viro kiu neniam edziĝis. Tiu, kiu nenion ĝuadis en ĉi tiu vivo kaj nun edziĝas al la morto mem kaj tie, alte en la ĉielo, Dio atendis lin kune kun la anĝeloj, ĉar la Senpekulo estis ja anĝelo de ĉi tiu tero.

Ni ariĝis ĉirkaŭ lia ĉerko kun bruligitaj kandeloj enmane dum la pastro svingis la incensilon kaj legis la evangelion kantante: " Dio nia, pardonu liajn pekojn! Dio nia, pardonu liajn pekojn!" Ĉu la Senpekulo faris iun pekon? Neniam!

Antaŭ ol oni eligu la forpasinton el la hejmo, lia patro sin faligis sur lin veplorante: " Filo mia, filo mia, kial vi foriris!"

Ĉekape de la funebra procesio, kun la bela ĉerko kaj ora kruco sur ĝi, ni direktiĝis al la preĝejo de Sankta Maria. La preĝejo de nia kvartalo. La preĝejo kie mi estas baptita. La preĝejo kie mi iradis dum la dimanĉoj por benado kaj kie mi travivis la mirindan infanecan ĝojon, pro la eĥado de la kampanoj dum la Paskaj noktoj. Dum ni iradas funebre, la preĝejaj kampanoj frapas funebre, ili frapas nur por ci, Senpekulo. Kaj ĉiu kampana sono rememorigas min tiujn mortintajn, tute envane pro la hufo de la diktaturo laŭ la ordono de tiu diablo, Enver Hoxha.

En la pekema jaro 1967<sup>22</sup>, tiu preĝejo fermiĝis kiel ĉiuj aliaj en la tuta socialista Albanio. Tiu preĝejo turniĝis en magazenon kaj riparejon de la aŭtoj. Nun la preĝejo de Sankta Maria estas rekonstruita kun tri kupoloj kaj la kruco ĉekape. Sur la muroj de la interna korto, anstataŭ la emulaciaj tabuloj<sup>23</sup> estas surmetitaj la fotoj de la distriktaj pastroj: jen Patro Llazo, Patro Ndoni, Patro Erazmi Jorgo. Kiom mi memoras, en ĉi tiu preĝejo, iam komence de la jaroj 1920, lia moŝto Fan Noli estas okaziginta politikan kunvenon. La preĝejo, deinterne, estas ornamita per tre belaj pentraĵoj je enhavo el Biblio.

Sub la broganta suno de aŭgusto ni iras al la tombejo, la ĉerko denove malfermiĝas kaj la pastro disŝprucas nin per vino "...Per vino kiam mi fordonas la spiriton benu min/ Per vino lavu min, benu min..." post kiam ni enterigas la

---

<sup>22</sup> Albanio sin deklaris la unua sola ateista lando enmonde dum 25 longaj jaroj

<sup>23</sup> Propagandiloj

forpasinton, ni surĵetas terbuleton per mano. "Pulvoro sur la pulvoro, kuŝita sur la pulvoro" kaj la nova tombo kovriĝas per florkronoj.

Ĉiuj floroj estas ja nur por ci, Senpekulo! Malpeza estus la tero por ci!

20-an de aŭgusto 2014



-----